

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 176 (256)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1980

LA 22-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO EN SIDNEJO

2-a — 9-a de JANUARO, 1980

Senatano C. V. J. Mason malfermis multflankan kaj ĝuplenan kongreson.

Kongresanoj, kiuj alvenis en Sidnejo el ĉiuj ŝtatoj de Aŭstralio, ricevis du agrablajn surprizojn. Multaj timis la kutiman humide varmegan veteron, sed kontraŭe trovis tion komforte milda. Certe, pluvetis kelkfoje, sed tio ne multe gravis en la urbcentro, ŝirmita per strat-verandoj. Ja gravis, ke la suno ne senkompatate brulis. La dua surprizo estis la bonegaj preparlaboroj de la Loka Kongresa Komitato. Lastmomente, ĝi devis trovi novan kongreson kaj loĝlokojn, ĉar pro nesufiĉa aliĝo, ni ne povis uzi la antaŭe planitan Universitatan Kolegion. La "Wesley Centro", en la urbcentro, bonege taŭgis kiel kongresejo. Eleganta teatra salono kaj kelkaj utilaj kromĉambroj estis je nia dispono kaj moderpreza restoracio servis manĝojn dum preskaŭ la tuta tago.

Kongresanoj loĝis en la sama (Pitt) strato, en la "Popola Palaco" de la Sav-Armeo, fakte grandega hotelo. Kvan-kam la ĉambroj estis iom malgrandaj, rekompencis la moderaj prezoj. Plue, la agema L.K.K. sukcesis akiri por ni kroman rabaton: kongresanoj ricevis senkostajn matenmanĝojn en la eleganta manĝosalono.

Sub la inspiriga gvidado de A.E.A.-Prezidanto "Robbie" Robertson, la L.K.K. konsistis el membroj de la Sidneja Esperanto-Societo kaj de la Manlia Esperanto-Klubo. Sur la ŝultroj de

L.K.K.-sekretariino Margaret Chaldecott kaj kasistino Eve Matasin falis la plej peza laboro. Shirley Fanos, Prezidanto de la N.S.K.-Federacio, kaj ties sekretariino, Betty Cleminson, multe helpis, same kiel A.E.A.-sekretario/kasisto Les Scott. Aliflanke, por la sukcesa plenumo de la altnivelaj distraj aranĝoj respondecis Arthur Cocking kaj Marjorie Duncan. Spaco mankas por menciigi ĉiujn, kiuj kontribuis al la sukcesa organizlaboro.

Por la granda plimulto el la aŭstraliaj esperantistoj, la kongresejo estas la sola loko kie ili povas ekzameni la librostokon. Libro-Peranto Tom Elliott daŭrigis sian ĝisnunan bonegan servon, helpate de la kapabla edzino. Ĉirkaŭ ili aĉetantoj svarme zumadis kvazaŭ en abelujo. Rezultis kontentiga libro-vendado por \$826.

La kongreso komenciĝas

Aliĝis al la kongreso 120 gesamideoj, el kiuj fakte ĉeestis 104. Laŭŝtate venis el Nova Sud-Kimrujo 59, el Kvinlando 16, el Viktorio 14, el Tasmanio 5, el Okcidenta Aŭstralio 5, el Canberra 3, el Suda Aŭstralio 1 kaj el Tokio alflugis F-ino Majo Issobe. Tiuj el ni, kiuj konis la 9-jaran Majon, kiam ŝi, antaŭ 12 jaroj, loĝis kun siaj gepatroj en Manly, plezure reenkontis la nun 21-jaran belaspektan universitatan studentinon, kiu regas la anglan lingvon same perfekte kiel Esperanton. Sur-

prize multaj gejunuloj partoprenis kaj kontribuis altkvalite al la programo, kiel ekzemple ankoraŭ ne 16-jara Jacqueline Walker kaj 18-jara Blair Silverlock (Perth), kiuj ambaŭ faris bonajn prelegojn kaj aktorin en la Dramo-Konkurso. Juna studento el Hobart, **Kam Lee** gajnis per violon-ludado, lerta **Manliano Jonathan Cooper** prelegis, kaj la talentaj aktoroj el Brizbano havis inter si kelkajn junajn esperantistojn. Kontribuis al la programo ankaŭ junaj Melburnanoj **Don Rogers** kaj **David Rockell**.

La **Bonveniga Vespere** (merkredo, 2/1) estis gaja komenco, kiu konsistis el komuna kantado, gvidata de **Marjorie Duncan** kaj **Arthur Cocking**, kaj danado, intermiksita kun individuaj eroj.

La **Gazetara Konferenco** (jaŭde, 3/1) ne multe sukcesis, sed pri tio ne kulpas la L.K.K. **Prof. Robertson** kaj **Shirley Fanos** invitis ĵurnalistojn kaj radioreportistojn kaj sendis al ili ĉiujn informojn pri Esperanto kaj la kongreso. Sed fakte venis nur raportisto de "Sydney Morning Herald" kaj juna raportistino de la A.B.C., kiu neniam aŭdis la nomon D-ro **Zamenhof**, nek sciis ion pri Esperanto. S-ro **Ralph Harry**, **Prof. Robertson** kaj **Majo Issobe** detale klarigis ĉion pri la utileco de la Internacia Lingvo, sed neniam raportis aperis poste. Kredeble la kriza situacio transmare pli postulis la atenton de la "Moŝtoj" redaktoroj.

Inaŭguro de la Kongreso

Jaŭde (3/1) okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Prezidanto **R. Robertson** bonvenigis la ĉeestantojn kaj prezentis al la kunveno la honorgaston, Senatanon **C. V. J. Mason**, kiu estas la vicestro de la Aŭstralia Demokrata Partio. Senatano **Mason**, kiu mem lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj de S-ro **Ralph Harry**, emfazis ke Esperanto trege helpas turismon, komercon, diplomation kaj ke aŭstraliaj esperantistoj havas antaŭ si la gravan taskon persvadi la edukajn instancojn enkonduki Esperanton en lernejojn, speciale en kolegiojn por instruistoj. S-ro **Ralph Harry** dankis al la Senatano pro liaj intereso kaj inspiriga parolado. F-ino **Majo Issobe**, vestita en ĉarma kimono, transdonis al la Senatano la "Oksford Bild-Vortaron". Senatano **Mason** dankis pro la donaco kaj respondis en Esperanto finante per la vortoj "Ni bezonas Esperanton".

Post mallonga paŭzo, **Prof. R. Robertson** daŭrigis la inaŭguron per bedaŭresprimoj pri forestantoj. Li petis la kongresanojn observi unu minuton da silento por la geesperantistoj mortintaj dum la pastintaj 2 jaroj: F-inoj **Virginia Cox** (Melbourne), **Amy Godfrey** (Melbourne), **Dorothy Hasluck** (Sydney), **Rose Telfer** (Adelaide); S-inoj **Brenda Cooley** (Manly), **E. Petley** (Toowoomba); S-roj **Victor Bourlin** (Sydney), **Harry Buswell** (Adelaide), **Pastro Cedric Cowling** (Melbourne), **Louis Fekonja** (Sydney), **Paul Schwerin** (Sydney); **Ernest Thompson** (Melbourne).

Sekvis la salutoj de la reprezentantoj de la diversaj organizajoj: **Nome de la junularo de Tokio salutis Majo Issobe**, finante per la vortoj "La estonteco apartenas al ni". **Nome de UEA salutis K. G. Linton**, nome de **SAT. Volo Gueltling**, **Blair Silverlock** (E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio), **R. Felby** (Adelaide), **S. Kanaĉki** (Melbourne E-Societo), **Ann Hearn** (Oakleigh E-Grupo) **Don Pescod** (Esperanto-Federacio de Viktorio kaj Malvern E-Grupo), **Don Rogers** (Waverley E-Grupo), **Marjorie Ellyard** (Canberra), **Clarence Strohnetter** (Launceston) **Jim Harwood** (E-Federacio de N.S.K.), **Tom Elliott** (Sydney E-Societo), **Arthur Cocking** (Manly), **Ivan Maddern** (Morwell), **Magdalena Rozsa** (Orange E-Grupo) **M. Mc Lloyd** (Newcastle); **Ray Ross** (E-Fed. de Kvinslando), **Cathy Sullivan** (Brisbane E-Societo), **Winsome Greenhalgh** (St. Lucia E-Grupo), **Joyce Turner** (Rockhampton kaj Kaprikorna E-Klubo). **Alvenis ankaŭ skribaj salutoj de la Brazilo E-Ligo** (Rio), **Elfriede Ernst** (Bruselo), **Emil Vokal** (Vieno) kaj telegramo de S-ro **du Temple**, nome de la Kanada E-Asocio kaj 2-a Pacifika E-Kongreso.

Finiziis la inaŭguro per la kantado de **La Espero** kaj fobgrafado.

LABOR — KUNSIDOJ

Okazis 4 A.E.A.-kunvenoj kaj po unu U.E.A., SAT., PAPIE kaj ORE-fak-kunveno.

Prof. R. Robertson malfermis (3/1) la A.E.A. **Ĝeneralan Kunvenon**. **Vic-Sekretario** (**Herbert Koppel**) legis la protokolon de la lasta ĝenerala kunveno 1978 en Launceston. (Akceptita).

Raporton pri la agado de A.E.A. dum 1978/79 donis la sekretario, S-ro **Les Scott** (Vidu aliloke) Li ankaŭ prezentis raporton kiel kasisto, kiun legantoj ankaŭ trovas sur alia paĝo de nia

ĈE LA INAŬGURO

Prof. R. G. Robertson alparolas la kongresanaron



De maldekstre dekstren: A.E.A. Sekretario/Kasisto Les Scott (Manly); Majo Isobe (Tokio); Ralph Harry, C.B.E. (Canberra); A.E.A.-Prezidanto R. G. Robertson (Sydney); Senatano C. V. J. Mason; 2-a Sekretario Herbert Koppel (Melbourne).

gazeto. Lia raporto inkludis raporton de la estro de la Korespondkurso Servo (John Moore), kiu ne povis ĉeesti. Sekvis la raporto de la redaktoro (Herbert Koppel), kiun leganto trovas aliloke. Tom Elliott raportis pri la agado de la Libro-Servo. Li dankis la reprezentantojn en la diversaj aŭstraliaj ŝtatoj, sen kies helpo li ne povus efike labori. Li raportis ke la libro-stoko en 1975 estis \$6000, sed tiu kreskis en 1979 ĝis \$10,769. Lia plej granda malfacilaĵo estas ankoraŭ la ĉiama inflacio kaj li petis la ŝtatajn reprezentantojn regule sendi al li liston kaj monon de la venditaj libroj. S-ro K. Linton raportis pri la Zamenhofa Fonduso. Ĝi komenciĝis en 1960 per \$1500. Ĝi pruntis monon al la Ko-operativo en Sidnejo (\$1400), kiun tiu jam repagis kaj investis \$996 en la Melburna Ko-operativo. La nuna kapitalo de la Fonduso konsistas el akcioj en la Melburna E-Ko-operativo (\$996) kaj kreditsaldo en "Statewide Building Society" (2165.80).

S-ro Ralph Harry sugestis ke detaloj pri la Korespondaj Kursoj estu presitaj en "Australian Esperantist". Dum 15 jaroj li servis transmare kaj "A.E." estis lia sola ligilo kun la Aŭstralia Esperanto-movado kaj li miris pri la kvalito de la gazeto. S-ro Marcel Leereveld proponis ke korespondpetoj estu presitaj en "A.E.". Post diskuto oni decidis, ke kiam estas multaj korespondpetoj, ni enmetu en nian organon specialan multobligitan "Bultenon por korespond-petoj".

Sekvis la elekto de la nova Estraro. S-ro V. J. Timmins, kiel Nestoro de la aŭstralia movado, gvidis la elekton por la nova prezidanto. S-ro Leereveld proponis Trevor Steele kiel prezidanton: li ne akceptis. S-ro Alan Towsey proponis V. Gueltling: li ne akceptis. S-ro Ivan Maddern proponis Herbet Koppel: li ne akceptis. Trevor Steele proponis Ray Ross: li ne akceptis. S-ro I. Grahovac proponis Prof. Robertson: li konsentis kandidati. S-ino M. Chaldecott proponis

S-ron Ralph Harry: li ne deziris tuj akcepti, sed estus preta kandidati por la posteno de Vic-Prezidanto por 6 monatoj. Post diskuto estis decidite ke Prof. R. Robertson fariĝu Prezidanto por almenaŭ 6 monatoj, post kiam S-ro Ralph Harry decidus ĉu daŭrigi kiel Prezidanto.

Prof. R. Robertson gvidis nun la elektadon de la aliaj oficistoj. Post diskuto la membraro elektis la sekvantan novan Estraron:

- Prezidanto: Prof. R. Robertson (Sydney) por almenaŭ 6 monatoj
- Vic-Prezidantoj: S-ro Ralph Harry (Canberra)
- S-ro K. G. Linton (Melbourne)
- 1-a Sekretario: S-ron F. J. Fallu (Melbourne)
- 2-a Sekretario kaj Redaktoro: S-ro H. Koppel (Melbourne)
- Kasisto: S-ino Ivy Fallu (Melbourne)
- Libro-Servo: S-ro T. Elliott (Sydney)
- Komisiito por Eksteraj Aferoj: S-ro Ralph Harry.
- Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore (Emu Park, Q'ld.)
- Korespondpetoj: S-ino B. Cleminson (Manly)
- Cef-Ekzamenisto: S-ro K. G. Linton (Melbourne)
- Kas-Kontrolisto: S-ro K. G. Linton.

Oni ŝajne preteratentis elekton de la **Honoriga Komisiono**; ni do povas supozi ke S-roj V. Guelling, V. Timmins (Sydney) kaj S-ro R. Ross (Brisbane) ankoraŭ agos en tiu ofico.

S-ro A. Towsey esprimis dankon al Les Scott pro la duobla tasko kiel sekretario kaj kasisto.

S-ro Wre Chandler proponis honoran membrecon por S-ino Audrey Childs-Mee pro kursoj kaj prelegoj faritaj en Aŭstralio en 1979. Subtenis la proponon S-ino I. Einihovici. Akceptita kun 3 sindetenoj.

S-ro Mac Le Fevre prezentis rezolucion de la Launceston E-Klubo, ke ĝi estus preta doni al A.E.A. \$1500 por starigi daŭran fonduson por Esperanto-stipendio, kondiĉe ke A.E.A. aldonu \$3000 por starigi komencan fonduson de \$4500. Sekvis vigla diskuto, dum kiu Tom Elliott kaj Les Scott kontraŭis la proponon, ĉar la nuna financa stato de A.E.A. ne permesas disponigon de \$3000 por unu sola celo. Aliflanke, S-roj M. Leereveld kaj R. Harry diris ke ni akceptu la kondiĉojn de la Launceston Klubo. Fine, S-ro K. Linton proponis ke ni organizu kampanjon por kolekti la \$3000. S-ro Ralph Harry formulis la jenan proponon: "A.E.A. akceptas kun

plezuro la proponon de la Launceston Klubo kaj provos kolekti \$3000."

Tiu proponon subtenis S-roj M. Le Fevre kaj K. Linton kaj la kunveno akceptis la proponon kun kvar kontraŭaj voĉoj.

W. L. Simpkins Heredaĵo: La kluboj de Brisbane, Melbourne kaj Perth proponis ke la heredaĵo de S-ro Simpkins (\$1578.47, plus kvarjara interezo de \$236.76) konsistigu fonduson memore al S-ro W. L. Simpkins. S-ro H. Koppel klarigis ke la interezo el la fonduso estu uzata por donaci Esperanto-librojn al bibliotekoj kaj lernejoj. Subtenis la proponon D-ro Einihovici kaj S-ro R. Ross. Post diskuto la propono estis akceptita kaj la kunveno elektis tri kuratorojn: S-ron R. Ross (Brisbane), estro; D-ron A. Einihovici, S-ino B. Cleminson (Manly).

F. R. Banham-Fonduso: S-ro A. Towsey raportis ke S-ino Hilda Banham pagis la preskostojn por ĵus eldonita libro ("A Translation Course in Esperanto for advanced students"). S-ro R. Harry proponis ke A.E.A. uzu la fonduson (\$433.02) por aĉeti ekzemplerojn de la libro. Tiu proponon subtenis S-ro Towsey kaj ĝi estis akceptita.

S-ino W. Greenhalgh diris ke ni pripensu la elektadon de 5 viroj kaj 5 virinoj, kiuj ne havas postenon en A.E.A., ke ili planu leteron por akiri monon de diversaj instancoj kaj firmaoj, por diversaj celoj. (Nur pripensu, ne proponu).

S-ro T. Elliott proponis ke ni elektu telefon-numerojn por korespondemuloj. (Listo, kiu helpas en la propagando); akceptita.

S-ro M. Leereveld proponis ke S-ro R. Harry, kiel komisiito por eksteraj aferoj, kontaktu fremdajn landojn (kiel ekzemple Indonezion) por helpi la lokan movadon ĝis \$100. Subtenis S-ro V. Kosef; akceptita.

S-ro S. Kanaĉki diris ke la A.E.A.-kotizo estas tro alta por pensiulo, ĉar ĝi reprezentas 25% de la semajna pensio. Propono estis akceptita, ke Financa Subkomitato diskutu kotizojn kaj la financon situation.

Financa Subkomitato: En la nomo de tiu komitato S-ro Les Scott raportis ke la kotizo restu sama kiel ĝis nun por 1980. Por la jaro 1981 la kotizoj estu: Ordinara membro: \$16.00, Pensiulo kaj plen-tempa studento: \$8.00. La komitato ankaŭ rekomendis ke A.E.A. kontaktu la Impostan Departementon por fariĝi "registrita asocio". Post registrado A.E.A. kontaktu grandajn firmaojn (kiel B.H.P. kaj Utah) por akiri subvenciojn.

S-ro M. Leereveld proponis ke "La ordinara kotizo estu \$16 jare. Senlaboruloj, pensiuloj kaj studentoj rajtas pagi minimume \$8 jare; samfamilianoj povas esti membroj per \$4 jare, sed ili ne ricevos la oficialan gazeton."

Pri tiu propono sekvis vigla diskuto. S-ro L. Scott estis kontraŭ familia kotizo. S-roj V. Gueltling kaj K. Linton ke ni tuj funkciigu la pli altan kotizojn por 1980. Fine okazis voĉdono pri la propono de S-ro Leereveld. S-ro Gueltling subtenis kaj la propono estis akceptita kun kelkaj sindetenoj.

S-ro T. Steele proponis ke ni varbu komencantojn ĉe estontaj kongresoj. Oni aranĝu dumkongrese kurson por komencantoj, kaj vesperon por komencantoj por klarigi al ili kio estas A.E.A. kaj U.E.A.: akceptita. S-ro Elliott proponis, ke ni registru proponojn ĉe ekstera tablo dum venontaj kongresoj. Subtenis A. Towsey: akceptita.

Loko de la 1982-a Kongreso: S-ro Robert Felby proponis ke la kongreso okazu en Adelaide. S-ino I. Einihovici subtenis la proponon. S-ro H. Koppel avertis la ĉeestantojn, ke, dum vizito en oktobro 1979, li konstatis, ke organizita movado tute ne ekzistas en Adelaide, ke la sola entuziasmulo, S-ro Felby, devas pagi el propra poŝo ĉiujn elspezojn por organizi monatajn kunvenojn (kiel luon de kunvenejoj, afrankon, k.t.p.). Li ne nur ricevas nenian financon helpon, sed devas krome transporti per propra aŭtomobilo personojn al la kunveno. Tiujn kunvenojn ĉeestas nur 3-5 personoj. S-ro Koppel tamen emfazis ke Adelaide estas ideala kongres-urbo, se nur ekzistus grupo da laboremaj gesamideanoj.

S-ro R. Harry proponis ke ni akceptu la proponon de S-ro Felby, sed sendu iun al Adelaide por eltrovi la lokan situacion. Subtenis la proponon S-ino W. Greenhalgh. La kunveno akceptis tiun proponon kaj elektis S-ron Harry por viziti Adelaide en marto kaj post vizito raportu al la A.E.A.-Estraro.

S-ro Ray Ross raportis ke la kuratoj de la jus fondita W. L. Simpkins Memoriga Fonduso decidis investi \$1500 je 11% ĉe "Australian Guarantee Corporation". La cetera mono estos distribuata inter la ŝtataj federacioj kaj kluboj. Adelaide ankaŭ ricevos monon, kondiĉe ke formala Esperanto-societo estu starigita.

La U.E.A. Kunvenon gvidis la aŭstralia ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton. Li informis pri la kotizoj por 1980 kaj ke la ĉi-jara Universala Kongreso okazos

en Stokholmo. Li ankaŭ faris apelon ke pli da membroj fariĝu delegitoj, vicdelegitoj aŭ fak-delegitoj por plibonigi la delegitan servon de U.E.A.

La S.A.T. Kunvenon gvidis la aŭstralia peranto, S-ro V. Gueltling. Li klarigis ke SAT ne estas partipolitika, sed nur kultura organizo. Li anoncis ke la 1980-a SAT-kotizo estas \$13.75 kaj la "Sennacieca Revuo" \$2.75. S-ro Vlado Kosef proponis ke la SAT-grupo kontaktu sindikatojn kaj informu ilin pri SAT. Li ankaŭ proponis ke oni eldonu de tempo al tempo cirkuleron. La dek ĉeestantoj faris monkolonon por eldonotaj cirkuleroj.

La O.R.E.-Kunvenon gvidis la prezidanto, S-ro E. W. Chandler. Ses personoj ĉeestis. Li raportis ke en Lucerno li gvidis la ORE-Fakkunsidon ĉe la Universala Kongreso. S-ro Chandler raportis, ke estas urĝe bezonataj kontribuajtoj por "La Mevo". Li ankaŭ anoncis, ke baldaŭ aperos "Komunlingva Nombro de Aŭstraliaj Birdoj".

S-ro Chandler konsilis, ke membroj aliĝu al almenaŭ unu aŭstralia birdstudada organizo kaj li rekomendis "Australian Bird Study Association" aŭ "Bird Observers Club". Li anoncis, ke la jarkotizo por 1980 estas \$6.50 kaj ke oni pagu tiun sumon al S-ino Betty Cleminson.

Dudek unu membroj partoprenis la kunvenon de **P.A.P.I.E.**, kiun gvidis la prezidanto Trevor Steele. La kasisto (Tim O'Grady) raportis, ke la organizo havis 39 membrojn en 1976, 42 en 1977, 56 en 1978 kaj 41 en 1979. La saldo en la banko estas \$445. S-ro Steele informis la ĉeestantojn, ke dum unu jaro li estos for de Aŭstralio kaj, ke oni devos trovi helpantojn por la eldono de "Transoceana". S-ro H. Koppel proponis, ke S-roj A. Towsey kaj R. Ross agu kiel Redakta Komitato. Subtenis S-ro O'Grady: akceptita. S-ro Tom Elliott ofertis sian servon kiel konsentis helpi lin. La ĉeestantoj per aplaŭdo dankis S-ron Elliott pro ties sindediĉo, per kiu li ĝarantios la daŭrigon de la gazeto.

Prelegoj

Okazis kelkaj treege interesaj prelegoj. Spaco mankas por detale raportu pri ĉiu prelego, sed ni esperas represi kelkajn en estontaj eldonoj. Ni nur mallonge menciuj:

Je jaito, 3/1, prelegis **D-ro A. Capell** pri la re-traduko de "La Levidoj", en kiu li speciale atentigis ke tradukado el la hebrea lingvo ne estas facila tasko.

D-ro A. Einihovici parolis pri **"Moderna Medicino"**. Li finis sian interesan prelegon per afurismo de Hipokrato, ke "Via nutraĵo estas via kuracisto".

S-ro Ralph Harry prelegis pri **"Esperanto por neregistaraj organizoj"**. Li citis eldiron de la iama prezidento de Aŭstrio, sperta esperantisto, Franz Jonas, ke "ni ne atendu grandan helpon de ŝtatoj. Persvadu politikistojn!" Ni nepre devos konstrui fortan movadon. Ni bezonas aliancilojn kaj la plej bona kampo estas la ne-registaraj bonfaraj organizoj, eklezioj, servado-klubo, C.W.A. kaj la U.N.O.-Asocio. Li proponis pligi la instruadon de Esperanto, provizi artikolojn pri la lingva problemoj kaj disponigi prelegantojn por neregistaraj organizoj.

S-ro Trevor Steele parolis pri filozofia temo **"Ĉu tro simpla la respondo"**, en kiu li klarigis 4 konceptojn: la agnostikan, ateistan, kristanan kaj plurvivan.

Je lundo, 7/1, prelegis **S-ro Arthur Cocking** pri **"Mi akuzas"** en kiu li prikritikis malfacilajn esprimojn en Esperanto.

S-ro J. Cooper prelegis pri **"Edukado per internacia kompreniĝo"**.

S-ino Ann Gash donis inresegan raporton pri **"Sola en velŝipo ĉirkaŭ la mondo"**. Ŝi priskribis sian aventurriĉan vojaĝon, kiu cetere baldaŭ aperos en libroformo ĉe **"Angus kaj Robertson"**.

Juna s-ro Blair Silverlock prelegis pri **"Esperanto kaj Paco"**. Li estas 18-jara studento.

Clarence Stochmnetter rakontis pri la historio kaj organizo de la **Lignohaka Movado** por kiu li multe laboras.

La ankoraŭ ne 16-jara **Jacqueline Walker** el Perth, parolis pri **"Virinoj en nia socio"**, kiun interesan prelegon ni represos en venonta eldono.

Jonathan Cooper, **Blair Silvercock**, **Jacqueline Walker!** Ĉu vere mankis junuloj?

LA DRAMO-KONKURSO

Elstare sukcesa estis la jam tradicia Dramo-Konkurso. Tiom da trupoj partoprenis, ke **Arthur Cocking**, la organizinto, spertis grandajn malfacilaĵojn aranĝi la programon. Li majstre solvis la problemon per 2 teatraĵ vesperoj. Lunde (7/1) konkursis la grupoj de Brisbane, Canberra, Manly kaj Perth. Marde (8/1) ludis la **Waverley** grupo (el Melbourne), dua grupo el Brisbane, Sydney kaj dua grupo el Perth.

La nivelo de la prezentadoj estis eksterordinare altnivela kaj la juĝantaro havis treege malfacilan taskon.

Dejoris kvin juĝantoj el kvin ŝtatoj: Majo Issobe (Japanujo), Clarence Stochmnetter (Tasmanio), Bob Felby (Suda Aŭstralio), Frank Dunn (N.S.K.) kaj Herbert Koppel (Viktorio).

Lunde, la vespero komenciĝis per **"Kiam birdoj ne scias kanti"**, verkita de Trevor Steele, kaj prezentita de la **Brisbane E-Societo**. La sep roluloj montris bonegan spiriton de kunagado. Trevor Steele, la ĉefrolulo, ludis frenezajn junulon, kiu per (neŝargita) revolvo devigis normalajn homojn obei liajn ordonojn.

Sekvis la **Canberra-grupo** per **"Ĉu vi aŭdas min? Mi parolas al vi"**. Gratulojn al **S-ro Harry** kaj **Ges-roj Ellyard** pro tiu interesa teatraĵo, kiu havis nur unu mankon: ĝi estis iom longa, kio kaŭzis pardon de poentoj, ĉar ju pli longa teatraĵo estas des pli da eraro okazas.

Sekvis la **Manly-grupo** per **"La Hipnotisto"** aŭ **"Kiel kuraci fumantino"**. Eunice Graham ludis la ruzan pacientino kaj Prof. Robertson la malhonesta hipnotiston. Estis tre amuza skeĉo verkita de Prof. Robertson.

"Esperanto kaj Amo" nomiĝis la prezentado de la **Esperanto-Ligo de Perth**. Estis la unua fojo ke Perth konkursis. Ges-roj Einihovici ludis maljunajn geamantojn kaj Blair Silverlock kaj Jacqueline Walker junan paron, kiuj interkonatiĝis per Esperanto.

Marde, la **Waverley-grupo** el Melbourne ludis **"La Avarulo"**, kun Don Rogers en la titol-rolulo, kune kun F-inoj I. Gale kaj E. Trainor.

"Diabla Rakonto" estis la dua teatraĵo prezentita de la **Brisbananoj**. Verkis ĝin **Gaye Phillips**, kiu ankaŭ ludis ĉarman diablinon, same kiel **Cathy Sullivan**, dum **Tom O'Grady**, kiel diablo, ĉef-rolis.

Dua prezentado de la **Pertanoj** estis **"Dialogo ĉe doktoro"**, kun Blair Silverlock kiel la juna doktoro, kiu devas aŭskulti al plendadoj de maljunulo (Dr. A. Einihovici).

"Tempesto en taso da Teo", estis la titolo de skeĉo de la **Sidneja grupo** en kiu ĉefrolis **Tom Elliott** kaj **Arthur Cocking**.

Eksterkonkurse, la **Manly-grupo** prezentis 3 mallongajn skeĉojn, tre lerte plenumitajn de komencantoj. Gratulojn al la instruistino **Marjorie Duncan**.

S-ro H. Koppel, nome de la juĝantaro, anoncis la decidon, kiu estis treege malfacila. La 5 juĝantoj donis 90 poentojn al la **Manly-grupo** kaj 89 poentojn al la **Brisbane-grupo** ("Kiam birdoj ne scias kanti."). Gratulojn al

ambaŭ grupoj pro majstra prezentado kaj dankon al la aliaj 6 grupoj pro ties partopreno en la konkurso.

DISTRA KAJ ARTA VESPEROJ

La **Distran Vesperon** (verdrede, 4/1) gvidis S-ro T. Steele. George Hicks el la Manly-grupo prezentis sin kiel lertan ventroparoliston. Jonathan Cooper kaj tri aliaj dancis, Clarence Strochetter muzikis, Prof Robertson kaj Eunice Graham amuzis per skeĉoj ("Dentoj"). Post la paŭzo Margaret Liston ravis nin per lerta monologo "La Bruema Spirito", Arthur Cocking montris sin en nova rolo kiel "Mensa Divenisto" kaj Ralph Harry legis siajn "Analojn 1979", kiujn ni represos en estonta eldono.

Por la **Arta Vespero** dimanĉe, 6/1) la kluboj el Brisbane, Sydney kaj Melbourne kunigis siajn talentojn por prezenti la farsan operon "**La Mikado**", majstre tradukitan kaj adaptitan de Gaye Phillips. Gaye havas mirindan artisman talenton. Estis preskaŭ 30 geaktoroj sur la scenejo, kun Arthur Cocking kiel KO-KO, la lordoĉefekzekutist'. Ĉiuj kantis kaj aktoris bonege kaj estis neeviteble ke iliaj "japanaj kostumoj" (ĉefe faritaj el kutimaj banrobaj), kaŭzis fortan ridadon ĉe Majo Issobe.

Samvespere ludis 6 muzikistoj de la akordion-societo de S-ino Elsie Brandmann, Ann Gash muzikis per fluto kaj F-inoj I. Gale, E. Traynor kaj S-ro Don Rogers kantis.

En la **Literatura Sesio** (marde, 8/1) Prof. Robertson legis poemojn de Rosetti; S-ro Koppel deklamis poemojn de Schwartz, Baŝhy, Kalocsay kaj Banham; D-ro Einihovici de D-ro Zamenhof kaj Schulhof; Tom Elliott de R. Schwartz. Tom O'Grady legis "Indonezan Fabelon", Dr. Gassner recitis "La Tilion". Ankaŭ Blair Silverlock kaj S-ino Ellyard prezentis erojn.

En la **Adiaŭa Vesperon**, Majo Issobe montris lumbildojn pri Japanujo kaj kiel dankesprimon S-ino B. Hart prezentis al ŝi kolĉenon kun Esperanto-stelo. Gaye Phillips kaj Ann Spencer kantis, Kam Lee ludis la violonon, kaj Les Scott kaj Isabel Gale muzikis per la stilofono. Roger Springer, vestita en skota kostumo, ludis la sakŝalmon kaj Ann Gash la fluton.

Aliaj aranĝoj

S-ro Ken Linton gvidis trifoje **seminaron**. Okazis **3 ekskursoj**: Urbaj vidindaĵoj, Ekskurso ĉirkaŭ la haveno kaj ekskurso sur rivero Hawkesbury. Okazis

Di-Servo en la preĝejo de Sankta Stefano kaj kongresanoj veturis al Mona Vale por partopreni "Baha'i"-Servon.

La **Bankedo** okazis sabate (5/1) en "Cahill's Dutch Inn". Honoraj gastoj estis Senatano C.V.J. Mason kaj edzino. S-ro R. Harry proponis la toston al la L.K.K., al kiu respondis S-ino S. Fanos. F-ino Issobe tostis al A.E.A. kaj S-ro Linton respondis. Al la vizitantoj proponis toston S-ro V.J. Timmins al kiu respondis Senatano Mason.

22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Late Supplementary List:

111. Derek Oubridge, Newcastle
112. George Hicks, Manly
113. Harold Gilbert, Melbourne
114. Tom O'Grady, Brisbane
115. Regie Hale, Brisbane
116. Kam Lee, Hobart
117. Vera Hull, Sydney
118. Nadia Woosnam, Melbourne
119. Ann Gash, Sydney
120. Valerie Ball, Newcastle.

State Distribution: NSW 65; Q'ld 21; Vic. 17; Tas. 6; W.A. 5; A.C.T. 3; S.A. 1; N.T. 1; Japan 1.

SEKRETARIA RAPORTO POR LA DUJARA PERIODO 1978-79

Krom mia multjara deĵoro kiel kasisto de A.E.A., dum la lasta ĉefkunveno en Launceston, ŝajnis al mi, ke pro la fakto, ke mi vere agis kiel neoficiala sekretario dum la tiam pasintaj 2 jaroj, mi havus problemon por eviti elekton kiel oficiala sekretario por la tiam venonta dujara periodo. Tio vere okazis.

Kiel sekretario, mi sentis min respondeca por eltrovi celon aŭ idealon por la estonteco. Rezulte de tio, mi decidis, ke la kampo en kiu, ŝajnis al mi, esti la plej grava oportuno por antaŭenigi nian aferon, estas per la plibonigo de niaj korespondaj kursoj. Pro tio, mi bezonus helpon — grandan helpon! Respondante al mia peto, tiu spertulo kaj entuziasmo en tiuj aferoj, John Moore, konsentis agi kiel administranto de la nove starigota Korespondkurso Servo. Per la elstara laboro kaj deĵoro de John, la kvalito de la kurso plibonigis kaj pere de liaj bone verkitaĵoj reklamoj, la intereso kreskas kaj disvastiĝas. Ni bone kunlaboris dum la periodo kaj rezulte la korespond-

kursa Servo sukcesas kaj sukcesas. Feliciĝas min informi la Kongreson, ke John estas preta daŭrigi tiun gravan deĵoron. Ni ege dankas vin, John!

Mi estas dankema ankau al aliaj helpantoj dum la du jaroj. Unue, la fidela Jack Fallu en Melbourne, kiu respondacas pri la ekspedado de la "Australian Esperantist", kaj Betty Cleminson, kiu bonvole prizorgis la korespondetojn en kaj el Aŭstralio. Mi ankaŭ volas esprimi mian dankon al Eunice Graham, kiu pritraktis miajn sekretarian kaj kasistan taskojn dum mia foresto eksterlande. La helpoj de tiuj geamikoj malŝargis la pezon de miaj ŝultroj.

Oni volas aklami la klopodojn de Herbert Koppel, la tre okupata redaktoro de la "Australian Esperantist". Li preparis materialon kaj eldonis 16 gazetojn aŭ po ok jare dum la periodo — granda tasko! Ken Linton multe helpis kiel ĉefdelegito kaj ĉefekzamenisto. Finfine, mi deziras kapti la okazon por esprimi multan dankon al granda amiko mia kaj la Asocio, nia Prezidanto, Robbie Robertson, kiu kunlaboris kun mi dum ok jaroj, sen iu ajn argumento aŭ ĝeno! Mi estas tute certa, ke la Estraro kaj la membroj de la Asocio altetaksas la lertan gvidadon de Robbie kiel estro. Aldone al la kutima devo de respondeco de la Prezidanto, li bone agas kiel ĉefo, de la nuna L.K.K.

Ankoraŭ restas multaj taskoj farendaj; Kiel allogi novajn membrojn kaj reteni ilin? Ni perdis pli ol ni gajnis dum la lastaj du jaroj. Nia ĉefa problemo estas la kreskanta mezaĝo de niaj membroj—pli ol duono, estas pensiuloj! Ekflamo de espero estas, ke pluraj el niaj korespondkursanoj aliĝas al la Asocio kaj alta procento el ili estas junuloj. Kiel reteni ilian intereson?

Kiel starigi fortan Junularan Asocion? Granda problemo estas la longaj distancoj inter la izoluloj. Ebla solvo estus junulara grupo en iu urbo; kiel fari tion? Kie oni trovas la entuziasmulojn por gvidi?

Laaŭ mia vidpunkto estas nepre necese, ke ni plibonigu niajn teritoriojn kun edukadaj instancoj kaj eminentuloj, kiuj interesiĝas kaj respondacas pri edukado, speciale pri fremdaj lingvoj. Neniel utilas aŭ batali, aŭ argumenti, aŭ disputi kun ili! Ni devas konstante kaj trankvile informi ilin pri Esperanto kaj ĝia progreso en nia kaj aliaj landoj. Tiamaniere, ni gajnos ilian intereson,

ilian simpatian, kaj poste — espereble, ilian entuziasmon kaj subtenon.

—Les V. Scott, Sekretario.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO Financa etato por la dujara periodo 1978-1979

Enspezoj:	
Kreditsaldo 2-12-77	\$7138.41
Kotizoj 1977-78-79	\$4759.94
Kotizoj antaŭpagitaj 1980	200.10
	4960.04
Profito el la Launces- tona Kongreso	904.54
Korespondaj Kursoj	1214.11
Transdonita al Kores- pondkursaj Servo	1214.11
	—
Ekzamenoj	100.00
Donacoj:	
Publiciga Fonduso	28.00
Heredaĵo P. Schwerin	1000.00
Brizbana Eduk-Inst.	300.00
Diversaj	132.30
	1432.30
Banham Memoriga Fonduso	20.00
Bank-Interezo	536.26
Akciaj Dividendoj	6.75
Reklamoj "A.E." (El Popolia Ĉinio)	12.00
Diversaĵoj	51.43
	\$15189.73

Elspezoj:	
"Australian Esperantist"	
(Presado kaj Afranko)	\$4854.35
Generala Afranko	127.79
Presado kaj Paperaĵoj	106.03
Korespondkursaj Elspezoj de la Antaŭa Periodo	28.83
UEA-Asociaj Kotizoj	94.18
Poŝtkesto Manly (2 jaroj)	48.00
Korespondkursaj Servo- Komenca Kapitalo	1000.00
Subvencioj:	
Aŭstralia E-Junulara Asocio	50.00
NSW E-Federacio (Pub/o)	100.00
Manly E-Klubo (Pub/o)	100.00
	250.00
Diversaĵoj	160.01
Kreditsaldo 30-11-79	8520.54*
	\$15189.73

Les V. Scott, Kasisto.
Arthur J. Cocking, Kaskontrolisto.

* La Kreditsaldo de \$8520.54 inkludas: F. R. Banham Fonduson \$433.02; Publicigan Fonduson \$653.98; Hered-ajon W. L. Simpkins \$1578.47.

RAPORTO DE LA REDAKTORO

Dum la pasintaj 2 jaroj, depost nia lasta kongreso en Launceston (Tasmanio), ni eldonis laŭplane 16 numerojn de nia gazeto "Australian Esperantist". Estis laborplena kaj temporaba entrepreno, en kiu mi havis la kunlaboron de kelkaj spertaj gesamideanoj.

Unue mi ŝatus danki S-ron Arturo Cocking, kiu redaktis paĝon 8 de nia gazeto, unue per internaciaj novaĵoj kaj lastatempe per siaj artikoloj "Kiu estas kiu en Aŭstralia Esperanto".

S-inoj Margaret Chaldecott, Marjorie Duncan kaj Edna Giles provizis novaĵojn el Sidnejo kaj Manly, dum S-ro Wre. Chandler ofte kontribuis interesajn artikolojn.

El Kvinlando nia fidela korespondanto estis Ray Ross, kiu regule raportis pri okazintaĵoj en tuta Kvinlando. Kvankam la movado en Suda Aŭstralio estas treege malforta, nia laborema pioniro Bob Felby fidele kaj regule raportis. Estis tial mia plezuro reciproki per prelego en lia grupo en oktobro pasinta. De tempo al tempo S-ro Mac Le Fevre raportis el Tasmanio kaj Clarence Strochnetter provizis pensintigan artikolon.

S-roj Ralph Harry, Prof. Robertson, Trevor Steele, Alan Towsey kaj Ken Linton kontribuis kelkajn tre valorajn artikolojn, dum per libro-recenzoj multe helpis S-ino Ruth McGrath kaj S-ro Frank Dunn. S-ino Fay Koppel kontribuis kelkajn recenzojn kaj havis tro ofte la dolorigan taskon verki nekrologojn. S-ro Tom Elliott kelkfoje raportis pri sia librostoko kaj S-ro Les Scott raportis pri organizaj aferoj.

Tasko de konscienca redaktoro ne nur estas redakti artikolojn kiujn li ricevas, sed li ankaŭ devas "post-kuri", aŭ pli bone "antaŭ-kuri" gravajn eventojn. Tiurilate nia gazeto "ĉeestis" per propra, speciala korespondanto la "Unuan Sud-Amerikan Esperanto-Kongreson" en Marilja, Brazilo. S-ino Elvira Fontes el Sao Paulo akceptis mian inviton kaj ŝia interesa raporto atingis nian gazeton eĉ antaŭ ol "Heroldo de Esperanto" ricevis raporton pri tiu grava evento. Mi povis helpi en "Trans-Pacifika" kunlaboro, donante permeson al la redaktoro de "Nov-

Zelanda Esperantisto" represi nian raporton.

Nia gazeto povis ankaŭ raportoj pri la Universalaj Kongresoj en Reykjavik (Islando), Varna (Bulgario) kaj Luzern (Svislando) per rektaj raportoj de Prof. Robertson, D-ro Einihoviĉi kaj S-ro Cocking, dum mi mem ĉeestis la kongreson en Svislando.

Dum la dujara periodo, mi sukcesis akiri la kunlaboron de internacie konata Esperanto-jurnalisto, S-ro Bernard Golden (Hungarujo), kies kleraj kaj instruplenaj artikoloj ofte aperis en nia organo. Dum mia lastatempa vizito al Eŭropo, mi konstatis ke nia gazeto kaptis la respekton de multaj transmaraj gesamideanoj. Mi havis la plezuron interparoli kun S-ino Fighiera-Sikorska de "Heroldo de Esperanto", kun S-ro C. Milojevic de U.E.A.-organo "Esperanto" kun S-ro Otto Walder de "Svisa Espero" kaj kun S-ino Marija Almada, redaktorino de Esperanto-gazeto, eldonita en Santos, Brazilo.

Eble la plej grandan honorigon akiris nia gazeto flanke de D-ro Arthur Baur, profesia ĵurnalisto kaj ĉefo de la Esperanto-Sekcio de Svisa Radio Internacia.

Li promesis sendi al ni, de tempo al tempo, manuskriptojn de svisaj Esperanto-programoj, kutime ne "kapteblaj" en Aŭstralio. Kaj en nia decembra eldono jam aperis la unua raporto, pri vizito de D-ro Baur al Ĉinio.

Similan aranĝon mi sukcesis akiri kun la aŭstria mallongonda Radio-servo, en kies programo, cetere, mi estis intervjuita, kiam mi vizitis Vienon pasintan aŭguston.

Fine mi ŝatus danki S-ron Ken Linton, kiu denove sukcesis havigi al ni senkostajn kliŝojn, por ilustrati nian gazeton de tempo al tempo. Ĉu mi rajtas finfine mencii, ke ĉiu frazo ĉiu vorto, presita sub la severa kontrolo de Fay Koppel. Se tamen enŝteliĝas eraretoj de tempo al tempo, tio estas neeviteble kaŭzita de la ne-esperantista presisto.

—Herbert Koppel, Redaktoro.

EL POPOLA ĈINIO: Nia ĉefdelegito anoncas, ke la abono al ĉi tiu populara revuo altiĝos je 1-a de majo, 1980, al:

unu jaro \$5.70
du jaroj \$9.60
tri jaroj \$14.40

sed ke li rajtas akcepti ĝis 30-a de aprilo abonojn je la nunaj prezoj de:

unu jaro \$3.00
du jaroj \$4.50
tri jaroj \$6.00

KOTIZOJ POR 1980

por individuaj membroj, kluboj
 Federacioj kaj **Pensiuloj**: \$12
 Plentempaj Studentoj: \$8

KOTIZOJ POR 1981

por individuaj membroj, kluboj
 kaj Federacioj: \$16
 por Pensiuloj: \$8
 por familianoj: \$4
 Plentempaj Studentoj: \$8

**KORESPONDKURSA SERVO
de A.E.A.****Enspezoj:**

Komenca Kapitalo:	
De A.E.A.-3-3-78	\$500
De NSK. Fed.-28-7-78	50
De A.E.A. - 13-9-78	500
	<hr/>
	\$1050.00
Kursoj venditaj (ĝis 22-11-79)	1213.71
Bankinterezo	20.56
	<hr/>
	\$2284.27

Elspezoj:

Stokaĉeto	\$828.98
Reklamoj	638.40
Afranko	99.34
Redonoj pro troaj pagoj	21.00
Kreditsaldo 30-11-79	696.55
	<hr/>
	\$2284.27
Nuna havaĵo 30-11-79:	
Stoko de kursmaterialo (laŭ originala kosto)	\$ 692.89
Mono en banko	696.55
	<hr/>
	\$1389.44

Dum la 2 jaroj ni aperigis reklamojn aŭ/kaj artikolojn en la jenaj gazetoj: VENTURE (SA), NEW IDEA (Vik.), NEWS MAIL (Bundaberg, Kld.), BANANACOASTER (Coffs. Harbour, N.S.K.), gazetoj de instruistaj sindikatoj en Kld., NSW, SA, OKC, A., VIK., CWA de OKC, A., VIK., NSK., KLD. artikolo kaj reklamo). Leteroj al la Redaktisto: Catholic Leader, KLD; Catholic Weekly, NSK, The Australian, Nova letero de MLTAQ (Modern Language Teachers Assn., Q'ld) kaj ricevis mencion en ilia nacia gazeto BABEL. Ni dankas al ĉiuj kluboj kaj federacioj kiuj helpis per mono kaj reklamoj.

Multan dankon ankaŭ al Les Scott, kiu, krom sia propra sekretaria/kasista laboro, pritraktis por la Korespondkurso Servo pli ol 300 informpetojn dum la dujara periodo.

—John Moore,
Komisiito, KKS

**GAJA POSTKONGRESO
EN MANLY****Jan. 10-14, 1980**

Tuj post la 22-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis inter la 10-a kaj 14-a de januaro, tre bone organizita Post-kongreso en Manly, populara marbordejo. La lusa "Hotel Manly" estis la centra kunvenejo de la Post-Kongreso, tre taŭga loko por tiaj aranĝoj. Ni devas danki al la senlacaĵo klopodoj de S-ino Marjorie Duncan pro la sukceso de la Post-Kongreso. Estis antaŭ 21 jaroj ke S-ino Duncan komencis instrui Esperanton en la Vesper-Lernejo de Manly, el kiu elkreskis la nuna tre agema Esperanto-Klubo.

Sajne virinoj ĉefrolas en Manly. La nuna Urbestro kaj la Vic-Urbestro estas virinoj, la raportisto, kiu raportis pri la oficiala akcepto en la Urbdomo, estis Wendy Kay de la "Manly Daily". Kaj cetero, la plimulto el la membroj de la "Manly Esperanto-Klubo" estas virinoj. Tamen, troviĝas inter la membroj kelkaj kuraĝaj reprezentantoj de la virsekso, kiaj Arthur Cocking, Prof. R. Robertson, Les Scott kaj Dr. Kevin Smith.

Posttagmeze je la 10-a de januaro, okazis oficiala akcepto en la Urbdomo de Manly, aranĝita de Skabeno Frank Preacher (Vic-Prezidanto de la "Manly E-Klubo), kiu al la Urbestro Joan Thorburn kaj aliaj skabenoj, prezentis inter aliaj gastoj, A.E.A. Prezidanton Prof. R. Robertson kaj F-inon Majo Issobe el Tokio.

S-ro Arthur Cocking, prezidanto de la "Manly Klubo", montris al la Urbestro kaj la skabenoj, la A.E.A. Dramo-Trofeon, kiun la loka klubo ĵus regajnis dum la Aŭstralia Kongreso. Raportistino kaj fotografisto de la loka ĵurnalo "Manly Daily" ĉestis, kaj je 16/1 aperis en tiu gazeto longa artikolo "Bonvenon, kion ajn vi parolas", kune kun granda fotografiaĵo.

En la oficiala parto de la akcepto, Urbestro Joan Thorburn bonvenigis la esperantistojn al Manly kaj Skabeno

F. Preacher salutis en Esperanto. Post regalo, la Urbeŝtrino prezentis libron pri Manly al reprezentantoj el ĉiu ŝtato de Aŭstralio. Nome de la gastoj, Majo Issobe esprimis dankon al la Urbeŝtrino. Ĉiuj vizitantoj subskribis la gastlibron.

Samvespere okazis en "Hotel Manly" manĝo kaj societa vespero., kiun ĉeestis 44 geesperantistoj. Vendrede (11/1), dum bela vetero, okazis pikniko ĉe strando "Shelley". Vespere, en la "Hotel Manly", kunvenis 90 esperantistoj, kun familianoj kaj amikoj, al Fest-Manĝo kun altkvalita programo. Dancistoj de la popoldancgrupo de Carol Maddock, prezentis vere unikajn dancojn el diversaj landoj en popol-kostumoj. Dankis ilin en Esperanto Majo Issobe. S-ro George Hicks mirigis ĉeestantojn per siaj magiaĵoj, intermiksitaĵoj kun amuzaj ŝercoj en Esperanto. Oni tranĉis grandan "naskiĝtagan kukon" por festi la

21-an datrevenon de "Esperanto en Manly". Al S-ino Marjorie Duncan oni dankesprime faris prezentadon pro ŝia pionira laboro.

Sabate (12/1), 45 personoj estis regalitaĵoj en la hejmo de gastama Mina Bedwell, kune kun muzika programo. Dimanĉe (13/1) Manlianoj invitis kongresanojn en siajn hejmojn por la luncĉo kaj posttagmeze ĉiuj kunvenis en la hejmo de Eunice Graham. Vespere preskaŭ 60 personoj kunvenis en la hejmo de Les kaj Bess Scott por bufeda manĝo. Dankon al la familio Scott pro tiu ĝuplena vespero, kiu kaŭzis al ili multthoran fortan laboron.

La nedezirata, sed neevitebla, fino de tiu gaja postkongreso venis lundon matene (14/1), kiam postkongresanoj devis adiaŭi kaj danki al siaj malavaraĵgastigantoj.

LA "SO/ZO" — PROBLEMO EN ESPERANTO

Bernard Golden

Ankoraŭ hodiaŭ aŭdiĝas eĥoj de la disputo pri "-ujo/-io", kaj ankaŭ la polemikado pri "-ata/-ita" ne tute formalaperis. Krome, lastatempe estis levita la "co/ko"-demando: oni argumentas, ke vortoj de helena deveno kiel "kibernetiko" devus esti pli ĝuste skribitaj per komenca "c" kiel "cibernetiko". Mi dezirus tie ĉi prezenti ankoraŭ unu diskutindaĵon, la "so/zo"-problemon, kiu laŭ mia scio ankoraŭ ne estis sufiĉe profunde pritraktita fare de esperantologoj.

En la revuo **Kolektanto** /1979:1-2/ eldonita en Sofia, Bulgario, oni povas legi pri "numizmata klubo" /p. 35/ kaj "numizmatiko" /p. 37/. **Kolektanto** ja havas lingvan respondeculon, sed estiĝas la demando: kiu kontrolas la reviziadon de tiu respondeculo? Estas evidente, ke la substituo de "z" al "s" en la cititaj vortoj rezultas de la influo de la samdevena radiko en la bulgara lingvo /kaj ankaŭ aliaj slavaj lingvoj/: **numizmat-**. Tiel forta estas la etnolingva influo, ke ĝi okazigis eraron en la bulgara-Esperanta vortaro de Atanasov ka /1961/. Ĉe la artikolvorto **numizmatika**, la Esperanta ekvalento estas "numizmatiko"!

La rusa lingvisto E. Bokarev analizis la lingvan procedon de mikso de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj ĉe kelkaj parolantoj de Esperanto. Ekzemple, parolantoj de la germana lingvo ofte an-

stataŭigas "s" per "z". Jam en 1892 W. H. Trompeter, la pionira esperantisto kaj mecenato de la movado, proponis al d-ro Zamenhof, ke en la komenco de silaboj oni akceptu "z" anstataŭ "s". Oni, do, skribu "zabl-, zam-, zed, zen" anstataŭ "sabl-, sam-, sed, sen". Zamenhof respondis, ke ne estas sufiĉa kaŭzo ŝanĝi la konatajn vortformojn kun komenca "s", kiun oni povas facile elparoli kiel la germana "ss". Tamen du vortoj en la **Universala Vortaro** ricevis la modifon, kiun Trompeter rekomendis: "zorgi" /G. **sorgen**/ kaj "zumi" /G. **summen**/. Kaj oni ne forgesu, ke ankaŭ la familia nomo de la aŭtoro de Esperanto variis, Ĝia origina germandevena formo estis Samenhof, en kiu la komenca "s" havas la prononcon de "z". Ĉar Zamenhof mem favoris fonetikan literumadon de propraj nomoj, li konformigis sian familian nomon al la Esperanta ortografio, skribante Zamenhof.

Bokarev plue klarigas, ke en situacio de sonĉeno, ofte okazas asimilado: proksimaj sonoj povas influi unu la alian. Voĉa konsonanto apud senvoĉa, mem senvoĉiĝas /"absurda" = "apsurda"/, kaj senvoĉa konsonanto apud voĉa konsonanto fariĝas voĉa /"ekzisti" = "egzisti"/. Bokarev nomas tion regresiva asimilado kaj rekomendas, ke oni toleru ĝin en Esperanto pro ĝia disvastiĝo en multaj lingvoj. Male, li konsilas, ke oni

ne permesu la progresivan asimiladon en vortoj kiel "univerzitato", "inzekto" kaj "diverza", kie voĉa konsonanto voĉigas la sekvan konsonanton. Kompreneble, temas nur pri la parola lingvo; neniu ŝanĝo okazas en la ortografio.

La "so/zo" fenomeno karakterizas ankaŭ la Esperanton de parolantoj de la hungara lingvo, kiuj ofte diras "bazeno" kaj "konzervi" anstataŭ "baseno" kaj "konservi". Ili ankaŭ skribas vortojn tiel. Jen kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el **Esperantologiaj Kajeroj kaj Hungara Vivo**.

1. "Tranzitiva estas la verbo"
2. "En poezio oni trovas ofte inverziojn"
3. "La anoj de la mondlingvo estas kozmopolitaj"
4. "Kurzive staras la gravaj sinonimoj"

La hungaraj ekvivalentoj de la Esperantaj vortoj "transitiva", "inversio", "kosmopolita" kaj "kursiva" estas **tranzitiv**, **inverzio**, **kozopolita** kaj **kurziv**. Se tiu ĉi tendenco persistos kaj finfine enradikiĝos en la lingvo, oni povas antaŭvidi la evoluon de hungara dialekto de Esperanto. Tiu lingva malsano jam infektis la hungaran-Esperantan vortaron de A. Pečan, en kiu la difino de **keresztben** estas "transverze" anstataŭ "transverse", pro influo de la hungara **transzverzalis**.

Ne nur parolantoj de la germana kaj hungara lingvoj pekas kontraŭ la pura prononco de Esperanto; ankaŭ slavoj alfrontas la saman malfacilaĵon. En verko eldonita en Jugoslavio mi trovis "dimenzioj" anstataŭ "dimensioj"; la slovena vorto estas **dimenzija**.

Eĉ **Plena Ilustrita Vortaro** ne estas libera je eraroj. Ĉe la artikolo "agavo" estas resendo al "sisalo", kiu ne ekzistas; la ĝusta vorto estas "sisalo". "Glosino" estas difinita kiel "insekto . . . kies specioj transportas i.a. la tripanozomojn". Tiu ĉi lasta vorto devas esti "tripanosomoj". Estas malfacile scii la precizan kaŭzon de tiuj eraroj en nia plej prestiĝa vortaro, sed mi konjektas, ke en la gepatra lingvo de pluraj kunaŭtoroj de tiu verko intervokala "s" estas prononcata kiel "z".

La esperantologo Eugen Wüster provis formuli principojn por la uzo de "s" kaj "z" en helen-latinaj substantivoj en Esperanto. Por apliki liajn regulojn oni devas esti filologo kaj scii, kiam la etimologio postulas jen "s", jen "z". Krome, estas esceptoj! Laŭ Wüster "prozelito" devas esti "pros-elito". Ankaŭ "ekzakta", "ekzalti" kaj "ekzameno"

havas kontraŭprincipan "z". Latina **ex-fariĝas "eks-"** en Esperanto, do la tri vortoj devas esti "eks-akta", "eks-alti" kaj "eks-ameno". Jen plua komplikaĵo. Ĉar la "z" estas voĉa konsonanto, estas tendenco en la parolataj vortoj voĉigi ankaŭ la "k", kiu fariĝas "g". De tempo al tempo tiu "g" ensteliĝas en la skriban lingvon: "egzakta", "egzemplo".

Kiu elpaŝos kun solvo de la "so/zo"-problemo?

"EL TELOPEO" ANKORAŬ HAVEBLA: Ni havas ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn nevenditajn ĉe la Kongreso. La A.E.A.-Libroservo konsentis transpreni la restantan stokon. La speciala prezo ĉe la Kongreso estis \$2.50. La prezo ĉe la Libro-Servo estos \$3.75 plus poŝtkosto. Post konsultado, ni decidis prokrasti la transdonon de la restanta stokoj ĝis la fino de marto. Vi povos aĉeti "El Telopeco" por \$2.50, plus 45c afranko. Mendu, ĝis fino de februaro, de S-ro E. W. Chandler, 57 Northcote St., Naremburn, 2065, kaj ĝis fino de marto, de S-ino S. E. Fanos, 11/27 Alt St., Ashfield, 2131.

IMPORTANT ANNOUNCEMENT

The new Treasurer of A.E.A. is Mrs. **Ivy Fallu of Oakleigh, Victoria.**

If you have not already paid your Subscription to A.E.A. (which remains unchanged for 1980), please mail it, as soon as possible, to her address

10 Sumersett Ave., Oakleigh South, Victoria, 3167.

If you require a receipt, please add a stamped, addressed envelope. When paying by cheque, please add 10c for Victorian Stamp Duty.

Subscription to A.E.A. \$12 (Individual, club, federation and pensioner)

Full-time Students: \$8.

A TRANSLATION COURSE IN ESPERANTO

FOR ADVANCED STUDENTS

by F. R. Banham, Dip. BEA, N.K.D.
Edited by Alan Towsey, 176 pages.

Price \$6.00 (plus 70c postage)

Available from: Alan Towsey,
Market St, Tahmoor, NSW, 2573

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ro I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 177 (257)

MELBOURNE

Marto, 1980

KUNLABORADO KUN LA ASOCIOJ POR UNUIĜINTAJ NACIOJ

Dum la 22-a Aŭstralia E-Kongreso, S-ro Ralph Harry prelegis pri la graveco de kunlaborado kun la ne-registaraj organizaĵoj. Li finis sian paroladon jene: **"Monda Federacio de Asocioj por UN"**

La Landaj Asocioj por UN starigis, antaŭ multaj jaroj, Tutmondan Federacion, kun kiu reprezentantoj de UEA havis amikajn rilatojn kiel konsultaj organizaĵoj de UK kaj UNESCO. En 1977 la Prezidanto de MFAUN, Simai Mihaili de Hungario esprimis sian opinion favore al Esperanto por la redakcio de "Hungara Vivo". Li pledis por deviga instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj formado de taŭga instruistaro. Laŭ S-ro Simai, la argumentoj de Esperantistoj estas sendube pripensindaj kaj ili foje devos igi ŝtatojn kaj internaciajn forumojn okupiĝi pri la afero. Notinde estas, ke Hungara Esperanto-Asocio estis aniĝinta al la hungara UN-Asocio, kiel kolektiva membro. Profesoro Simai sugestis, ke WFUNA konsideru la kreon de studkomisionon por enketi pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

En Julio 1977, la Prezidanto de UEA proponis kunan klopodon de WFUNA/MFAUN kaj UEA por studi la lingvan tuacion en UN, aŭ aliron al la Univerŝitato de UN aŭ al UNESCO.

En Januaro, 1979, S-ro Tonkin kunvenis kun la Generala Sekretario de MFAUN, S-ro Frank Field, Genevo. Ili diskutis diversajn eblecojn por kunlaborado, inter ili studon de la lingvo-problemo de MFAUN mem kaj aliaj

Internaciaj Ne-registaraj Organizaĵoj. En Marto, 1979, D-ro Tonkin faris proponon en la nomo de UEA kaj en Junio S-ro Field informis UEA, ke la Plenuma Komitato de MFAUN rajtigis lin daŭrigi la diskutojn. Li informis ankaŭ, ke la MFAUN invitis la Novzelandan Asocion por UN provizi dokumenton pri Esperanto por la 27-a Plena Asembleo de MFAUN okazonta en Barcelono en Oktobro 1979.

Dum la Universala Kongreso en Lucerno estis pli da diskutado kun S-ro Field kiu urĝis, ke landaj asocioj en la kadro de UEA fariĝu membroj de UN Asocioj. Li menciis la eblecojn, ke MFAUN traduku sian manlibron en Esperanton por dissendado al ĉiuj Asocioj por UN, kaj ankaŭ, ke la plena Asembleo de MFAUN en Barcelono akceptu rezolucion pri internacia kunlaboro.

Mi parolis al kelkaj membroj de la Konsilio de AAUN en Brizbano en Aŭgusto, kaj en Septembro, ĵus antaŭ la Asembleo en Barcelono mi denove kontaktis oficistojn de AAUN en Kanbero. Ili informis min, ke AAUN estas favora al Esperanto, kaj ke la nova Prezidanto, S-ro Cecile Storey konsentas, ke AEA uzu tiun fakton. Ili estis certaj, ke la Aŭstralia delegito en Barcelono, Lia Moŝto Peter F Underhill, Vic-Prezidanto de MFAUN, subtenos rezolucion.

Je la Asembleo MFAUN akceptis la jenan rezolucion:

La dudek-sepa Plena Asembleo de WFUNA (TFAUN)

1. BONVENIGAS la intertraktojn entreprenitajn de la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario kun la Univerŝala Esperanto Asocio;
2. AGNOSKAS, ke la komuna inter-naciismo de membroj de Esperanto-Asocioj kaj Asocioj por Unuiĝintaj Nacioj estas bazo por estonta kunlaborado;
3. INVITAS ĉiujn Asociojn por Unuiĝintaj Nacioj kunlabori kun Esperanto-Asocioj por petegi edukajn aŭtoritatojn kaj organizojn en siaj landoj enkonduki aŭ pliiĝi la instruadon de Esperanto.

Kunlaborado Kun Aŭstralia Asocio por UN.

Do efektive MFAUN invitis la Aŭstralian Asocion por UN kunlabori kun Aŭstralia Esperanto-Asocio por petegi edukajn aŭtoritatojn kaj organizojn en Aŭstralio enkonduki aŭ pliiĝi la instruadon de Esperanto. Grave! Nun ni devas organizi sekvan agadon. Mi proponas, ke:

- (1) AEA notu la rezolucion, bonvenigu ĝin, kaj informu AAUN ke ni pretas peti la federaciajn kaj ŝtatajn registarojn kaj edukdepartementojn, kune kaj se eble ankaŭ kun CWA, enkonduki aŭ pliiĝi la instruadon de Esperanto
- (2) Invitu ĉiun Esperanto-organizon en Aŭstralio kontakti la AAUN en sia ŝtato, proponi reciprokajn membrigon kaj paralelan agadon je la ŝtata nivelo
- (3) nomu komisiiton por rilatoj kun ne-registaraj organizoj por kunordigi la agadon de AEA sekvan al la rezolucio de MFAUN
- (4) Starigu komitaton kun unu komitatano el ĉiu ŝtato por labori kun la komisiito por rilatoj kun ne-registaraj organizoj.
- (5) Ofertu provizi al AAUN aŭ al ties Divizioj:
 - (a) informojn pri Esperanto (ekzemple, Update on Esperanto)
 - (b) artikolojn por la gazetoj de AAUN, specife "Kuruna" pri la lingvo-problemo kaj ties solvo
 - (c) prelegantoj por kunvenoj kaj konferencoj de AAUN.

Per tia programo, kiun la Kongreso novas diskuti kaj plibonigi, sen granda kosto, ni povos fari grandan paŝon antaŭen en Aŭstralio kiel sendube faros niaj samlingvanoj en aliaj landoj. Ni agu!"

La Kongreso akceptis la proponon. Post la Kongreso S-ro Harry sendis la ŝekvantan leteron al la Prezidanto de la Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj:

January 14, 1980

Mrs. Cecile Storey,
58 Broadway,
Camberwell, Vic. 3124.
Dear President,

The Twenty Second Congress of the Australian Esperanto Association which has just concluded its session in Sydney warmly welcomed the resolution of the Twenty-Seventh Plenary Assembly of WFUNA in Barcelona inviting UNAA to collaborate with AEA. I attach for your convenient reference, a copy of the resolution with an Esperanto translation. I also attach a copy of the document "Update on Esperanto".

I propose, if you agree, to write to the Australian Minister for Education conveying to him the terms of the Barcelona resolution and proposing that the Department of Education nominate an officer to discuss with us a practical programme for the introduction of Esperanto into the Colleges of Advanced Education and, as teachers become available, into schools.

Representatives of Federations of Esperanto organisations or individual Clubs will be in touch with your State Divisions (to whom I am sending a copy of this letter) with a view to making a parallel approach to State Ministers and Departments of Education.

I look forward keenly to our cooperation in this enterprise and hope that many of your members will themselves learn the international language in 1980. Our clubs will be delighted to assist!

Yours sincerely,
R. L. HARRY,
Vice-President, AEA and
Commissioner for External Relations.

Kaj jen la respondo:

United Nations Association of Australia
Jan. 29, 1980.

Mr. R. L. Harry, Vice-President, AEA
and Commissioner for External
Relations,
8 Tennyson Crescent,
Forrest, ACT, 2603.

Dear Mr. Harry,

Thank you so much for your letter dated January 14, 1980.

Please be advised that I would be most enthusiastic to help in any way possible for Esperanto to be introduced in CAE's and subsequently into schools. I will draw this matter to the attention of our Victorian Division for communication to members.

Our wishes go with you for a successful campaign.

Yours faithfully,
CECILE STOREY (Mrs.)
 Federal President.

"MONATO" — Internacia Magazino sendependa. 40 paĝoj, riĉe ilustrita, 11 kalendaroj, jare. \$26.00. Abonu ĉi tiun novan pericadon ĉe K. G. Linton, Cefdelegito.

APERTA LETERO AL S-RO IVAN MADDERN

Kara Ivan,

Kiam Zamenhof kantis
 eĉ guto malgranda konstante
 frapante, traboras la monton
 granitan

li ja bone sciis, ke ni ne sukcesus forigi la obstruktan monton per unu aŭ du fortegaj kapbatoj. Se nia movado portas la solvon de plurmilionjara problemo, ĝi apenaŭ atingos sian celon dum la venonta semajno. Ni bezonas entuziasmon, persistemon, kuragon. agemon — kaj **paciencon**.

Vi certe montras en alta grado la unuajn kvar kvalitojn, sed ŝajnas al mi, ke manko de pacienco minacas nuligi la valoron de via sindediĉo al la afero de Esperanto. Via iniciato lanĉi la internacian rondleteron estas modelo de agado, kiu inteligente ekspluatas la lingvan kaj ideologian flankojn de nia lingvo — kaj verŝajne kostas al vi ne mal multe da mono. Sed la kampanjo pri skribata en **The Latrobe Valley Esperantist** ŝajnas al mi esti malproduktiva por la movado.

Kredu al mi, nur malvolonte mi kritikis; mi ja konas vin kiel ĉiam afabla, ĝentila homo, unu el niaj multaj veraj aktivuloj, kiu nepre deziras la progreson de la internacia lingvo. Krome mi bone komprenas vian koleran reagon al la ŝajne obstrukcema sinteno de la diversaj edukaj instancoj Ankaŭ mi staris kelkajn fotojn ĉe la sojlo de iu promesoplana projekto, sed iu oficialulo deklaris Esperanton "ne esti lingvo" aŭ simple forstrekis la projekton sen ia ajn klarigo. Kion fari? Mi volis krii aŭ skribi "Idiotoj! Blinduloj! Almenaŭ permesu diskuton!" Se mi estus dirinta tiajn komplimentojn al ili, verŝajne mi estus sentinta personan malpeziĝon — sed mi estus ankaŭ rompinta ĉiujn pontojn al tiuj homoj, probable ankaŭ por aliaj esperantistoj.

La tuta etoso, en kiu edukaj aŭtoritatuloj funkcias, malfavoras tian arĉdancan paŝon, kia la enkonduko de Esperanto ili estas partoj de sistemo, kiu metas limojn al ilia libera decido. Eble la sistemo estas "koruptita", ĝi tamen ekzistas, kaj nenia alternativo estas videbla. Kaj ĉu vi kredas,, ke ni gajnos batalante **kontraŭ** la sistemo?

Se ni, demografie tute sensignifa areto (bedaŭrinde!), minacas aŭ nomas ilin mensoguloj ktp, ni riskas, ke ili rigardu nin kiel absurde atakeman sekteton. Unu el niaj taskoj dum ĉi tiu pionira epoko devas esti "guton post guto" venki la estimon de la publiko kaj precipe de tiuj rondoj, kiuj kolektive decidas lernprogramojn. Niaj anatemoj nur certigos, ke la nunaj oficiuloj, kiujn ni ne povas forigi, ja neniam agnoskos la meritojn de Esperanto.

Unu lasta afero. Ni ĉiuj konas kaj respektas vian multjaran pasian kampanjon por la abolo de ekzamenoj. Kelkaj el ni konsentas kun vi. Preskaŭ ĉiu esperantisto sincere apogas almenaŭ unu alian ismon aŭ projekton, kiun li aŭ ŝi interne ligas kun Esperanto. Zamenhof mem ellaboris sian noblan homaranisman kredon kaj **private** esperis, ke aliaj esperantistoj venos al la sama kredo. Sed **publike** li ĉiam rigore distingis inter siaj du idealoj, ĉar li ne volis doni la impreson, ke homoj interesiĝintaj pri lia lingvo devus akcepti lian filozofion. Same ni ĉiuj ne veku la impreson ĉe ekstermovadanoj, ke iu privata konvinko nia, kiel ajn inda ĝi estu, estas oficiale ligita al la celoj de la Esperanto-movado. Laŭ mi tiu dividido ne estas sufiĉe klara por neesperantistoj en la leteroj aperantaj en **The Latrobe Valley Esperantist**.

Ĉar mi scias, ke vi celas la antaŭenigon de nia bela lingvo, mi fidis, ke vi serioze pripensos miajn kritikojn. La originalon de ĉi tiu letero mi sendas al la redaktanto de **The Australian Esperantist**. Ĉi tiu kopio permesos al vi, se vi volas, formuli respondon aperontan en nia nacia organo.

Sincere, via samcelano
TREVOR STEELE.

Mineralojn, bele kolorajn, pure bluajn, ruĝajn, flavajn en pecoj de 10 mm kaj pli grandaj, bezonas artistino. Speciale ni serĉas aŭstralian Azurite (lume blua).
Bruno Vogelmann, Pistoriusstr. 52 D-7180 Crailsheim (Germanio). Mi petas oferton por 5 kg.

LA 45-a KONGRESO

de la **Nov-Zelanda Esperanto-Asocio** okazis inter la 5-a kaj 9-a de januaro, 1980 en la Centra Instituto de Teknologio en Heretaunga (ekstera aŭtaŭrbo de Wellington). Pro la malsaniĝo de la Prezidanto (J. T. Allan), la Vic-Prezidanto Ralph Dearnley, ankaŭ bonekonata en Aŭstralio, kapable prezidis la kongreson.

Aligis entute 55 personoj. Malfermis la kongreson la vicurbestro de Upper Hutt, S-ro Macaskill. Dum la diskutoj evidentiĝis ke la N.Z.-a Instituto de Esperanto efektive mortis kaj ke la junulara organizo ŝajne mortis.

Okazis kelkaj interesaj prelegoj S-ro J. Major parolis pri siaj spertoj survoje al la Universala Kongreso en Lucerno kaj impresoj ĉe la kongreso. Li ankaŭ prelegis pri Esperantologio. Majoro Petersen (redaktoro de "Nov-Zelanda Esperantisto") prelegis pri diversaj lingvaj punktoj kaj vortuzoj kaj pri Esperanto-literaturo.

La tradicia Drama Konkurso fariĝis batalo inter la Auckland E-Societo kaj la Internacilingva Societo, de la sama urbo. Ges-roj Wood ĉef-rolis en krimdramo prezentita de la Auckland Societo kaj batalis kontraŭ si mem kiel solaj roluloj en la dua prezentado. Oni aljuĝis la ŝildon al la unua grupo.

Oni efektive elektis la saman estraron kaj oni ne solvis la demandon kie okazu la venontjara kongreso.

Raporto de la Komisiito pri Eksteraj Rilatoj

Mi deziras danki la sekvantajn personojn, kiuj afable konsentis agi en la 6 ŝtatoj kiel dumtempaj neformalaj perantoj de la KOERO:

En Kvinlando: S-ro R. Ross
 En Nov-Sud Kimrujo: S-ino M. Chaldecott
 En Viktorio: S-ro D. Pescod
 En Sudaŭstralio: S-ro R. Felby
 En Tasmanio: S-ro M. Le Fevre
 En Okcidenta Aŭstralio: S-ino I. Einihovici

La perantoj informos la federaciojn kaj klubojn pri la decido de la Tutmonda Federacio de Asocioj por UN, kunlabori kun Esperanto-organizaĵoj.

La perantoj, en konsulto kun la federacioj kaj kluboj, skribos al la ŝtataj filioj de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj (1-e) por informi ilin pri la ĝojo de nia AEA-Kongreso je la rezolucio de Barcelono; (2-e) por sugesti praktikan programon de kunlaborado rilate petojn al edukaj instancoj.

Mi mem kontaktos la Tutaŭstralian Prezidanton de UNAA, kaj ties filion en A.C.T. — R. L. HARRY.

AŬSTRALIA = KRONIKO

● **PERTH:** La jaro 1980 komenciĝis tre favore kaj promesplene por nia agado en Okcidenta Aŭstralio. Je la 3-a de februaro okazis seminario en la gastama hejmo de Ges-roj McGrath. La diskutado pri la financa problemoj okupis multe da tempo, sed dank' al nia sperta kasisto, Owen Loneragan, ĉio solviĝis kontentige. Alia ero de la tagordo estis detala diskuto pri la uzo de libroj en la biblioteko de la Universitato Murdoch kaj en la nova malgranda biblioteko en la hejmo de Ges-roj Dean, kreita precipe por loĝantoj en la metropola areo de la urbo. Instruado de la lingvo en la lernejoj estis la temo kiu interesis ĉiujn partoprenantojn. Saman intereson ili montris pri la propagando.

D-ro Einihovici entuziasme raportis pri la sukcesa AEA-kongreso en Sidnejo: pri la perfekta organizado, la altnivela kultura programo kaj la bonkora gastamo kaj precipe de la postkongresaj organizaĵoj en Manly. La afabla kaj grananima akcepto de urbestro en Manly, S-ino J. Thorburn, profunde impresis ĉiujn. Entute neforgesebla landa kongreso! La ĉeestantoj aplaŭde esprimis sian aprobon.

De 26-a ĝis 28-a de jan., 1980 okazis Esperanto-ekspozicio dum nacia ferio en belega urba parko. La budon vizitis multaj homoj, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj movado. Pluraj gejunuloj jam aliĝis al la Esperanto-Junulara Klubo, tiel dediĉe gvidata de S-ino Einihovici.

La unua kunveno de nia Ligo okazis je 23/2. Partoprenis 19 membroj. S-ino McGrath prezentis novaĵojn, S-ro J. Hawks estris konversacion kaj Ges-roj Dean parolis pri la Libro-Servo.

—T. EINHOVICI.

Estraro por 1980 estas: Prez: S-ro R. Smeets; Vic-Prez: S-ro Z. Nicoletti; Sekretario: S-ro C. Dean; Kasisto: S-ro O. Loneragan; Informado: S-ro J. Hawks; Biblioteko: S-ino D. Dean.

● **ADELAIDE:** Ni kunvenis la unuan fojon ĉi-jare je 25/2 en la Universitato. Ni formale fondis la "Sundaŭstralian Esperanto-Societon" kaj elektis estraron:

Prez: George Clarke; Vic-Prez: Bert Onn; Sekretario: Bob Felby; Kasisto: Beryl Randles; Libro-Peranto: Thea v. d. Boogaard; Estrarano: Betty Sykes. Ni decidis ke ordinaraj membroj pagu \$10 jare, pensiuloj, studentoj kaj familiaj membroj \$4 jare.

Ni multe diskutis pri la 23-a kongreso kaj elektis komitaton: Prez: George Clarke; Sekretario: Bob Felby; Kasisto: Beryl Randles. F-ino Leigh Evans proponis sin kiel "Organizanton" — R. FELBY.

● **MELBOURNE:** La Zamenhof-Festo okazis je 15-12-79 en la halo de la skoltinoj. Ĉeestis 42. Post pianludado de S-ino M. Sanders, S-ro S. Kanački bonvenige salutis la ĉeestantojn kaj sekvis lin reprezentantoj de la grupoj en Malvern, Oakleigh kaj Waverley.

Krom kumuno kantado, pluajn muzikajn erojn prezentis S-ino kaj F-ino M. Sanders (bekfluta dueto) kaj la Waverley-Grupo (kantoj). La Malvern-Grupo deklamis pensinstigajn citaĵojn, la Waverley-Grupo prezentis amuzajn skeĉojn, Herbert Koppel deklamis poemojn kaj S-ro Don Pescod prezentis la "Revuon 1979".

La Festparolado de S-ro S. Stepanow, laŭ titolo "La Revoj de Zamenhof", ŝajne celis montri, ke la revoj de la Majstro — precipe rilate la facilecon — mankon de esceptoj — flekseblecon — grandparte detruigis per la uzado de la "kleruloj". Tamen ne mankis "La Espero", kaj iom pli gajigan atmosferon restarigis la babilado super la tetosoj. — F. K.

Je 17-12-79 okazis la jarfina festeto de la Melbourne E-Societo. S-ro Errol Chick montris diversajn diapozitivajn kaj ĉeestantoj partoprenis en ludoj kaj enigmoj; sekvis manĝeto de multaj frandaĵoj.

● **MANLY:** Dum nia Generala Kunveno en la hejmo de Ruth Carruthers, ni elektis la jenan estraron: Prez: Prof. R. G. Robertson; Vic-Prez: A. Cocking kaj Ald. F. Preacher; Sekretario: Betty Cleminson; Kasisto: M. Ross; Libro-Agento: H. Stone.

Unu letero kaj 4 artikoloj (2 kun fotografaĵoj) estis presitaj en "Manly Daily" sekve de nia Post-Kongreso. Ĉi tiuj informoj aldone al diversaj reklamoj, certigis novan kurson en la Vespera Lernejo.

Je 5/2 ĉeestis 25 kursanoj por studi laŭ 3 gradoj. J. Cooper gvidas la altgradan, M. Duncan la progresan, A. Cocking la komencan. Post la kursoj okazis 3 samtempaj programoj: Elementa (M. Duncan), Drama (M. Liston),

Altgrada (Prof. R. Robertson).

Ĉeestis la kunveno Truus kaj Simon Koorn el Hago. Ili vizitis la 3 grupojn kaj entuziasmigis la anojn per siaj rakontoj pri vojaĝado tra multaj landoj.

Kvankam la edukaj instancoj ne pagas niajn instruistojn, ili tamen metas je nia dispono 3 senpagajn ĉambrojn ĉiumarde, kaj halon kun scenejo iun ajn vendredon vespere laŭbezono. Similajn avantaĝojn ni ĝuas ekde la komenco de nia instruado de Esperanto en 1959. Ni do rekomendas al aliaj kluboj, kiuj serĉas taŭgan senpagan kunvenejon por divers-nivelaj kursoj, ke ili turnu sin al la estro de la plej proksima vespera lernejo. — MARJORIE DUNCAN

● **BRISBANE** Sukcesa Zamenhof-Festo okazis je 15-12-79; 47 personoj ĉeestis. La dramo-grupo prezentis dramon de la kongresa konkurso kaj la kantgrupo prezentis la operon "La Mikado", tradukitan de Gaye Phillips.

Post reklamado 12 novaj lernantoj studas sub Trevor Steele. La komencantojn de la lastjara grupo instruas Tom O'Grady kaj Ray Ross instruas grupon de progresintoj. Ekzistas ankaŭ grupo kiu studas poezion kaj literaturon.

Ĉiusabate kunvenas konversacia rondo kaj la kantgrupo baldaŭ komencos prepari programon por la Federacia Konferenco en Ipswich. En aprilo okazos studsemajnfino ĉe "Mountain Lodge" ĉe Mt. Tamborine.

● **TOOWOOMBA** Geedziĝo okazis 11-12-79 de nia fondinto, S-ro H. V. Petley al S-ino Churchill; la feliĉa paro daŭre loĝas ĉe 32A Lindsay St, Toowoomba.

La jara kunveno, 18-2-80, elektis la saman estraron kiel en 1979. Pasintjare, libroj estis donacitaj al la unuagrada lernejo Gabbinbar, kie grupo de 12-jaraĝaj lernantoj komencis lerni Esperanton. Jean Lehane prelegis pri Esperanto ĉe la Alexandria Klubo; societanoj renkontiĝis okfoje por konversaciaj rondoj kaj sesfoje por legi teatraĵojn.

Kvar lokaj parlamentanoj ricevis leterojn kaj Esperanto-propagandilojn, kaj la federacia parlamentano T. McVeigh invitis kaj antaŭenigis traktadon pri la enkonduko de Esperanto en instruojn pedagogiajn. Jam komenciĝis la planado por la 3-a esperantlingva lernejo ĉe Kolegio McGregor okaze de la Someraj Artaj Kursoj, 12-24-a de januaro, 1981. — JEAN LEHANE.

● **ROCKHAMPTON** Du konversaciaj grupoj kunvenas ĉiusemajne — unu ĉiusabate, unu ĉiŝaŭde — por inter-

paroli en Esperanto. Lastatempe mankas novaj lernantoj.

● **KAPRIKORNA MARBORDO:** Lecionoj daŭras ĉe "La Nesto" emu Park, ĉiumarde. Ni bonvenigis novan anon, Joy Coulter, antaŭe de la grupo en St. Lucia. Si nun loĝas en Emu Park.

—JOHN MOORE.

● **SYDNEY:** La jaro komenciĝis 4-2-80 Viz'itis n'in Ges-oj Koorn el Den Haag, Nederlando. S-ino Truus Koorn estas prezidanto de la Haga Esperanto-Klubo. Ni invitis ŝin kaj ŝian edzon paroli al ni pri la Movado en Nederlando, kaj pri sia transmonda veturado, kiu inkluzivis aŭtoveturon trans la Ebenajon Nullabor. S-ino Koorn proponis ke ni faru demandojn al ŝi kaj ŝia edzo. Sekvis vigla informplena diskutado.

10/2 okazis la Jarkunveno de S.E.S.

Oficistoj por 1980 estas:

Prezidanto: S-ino Shirley Fanos

Vic-Prezidantoj: S-roj Volo Gueltling kaj Jas. Harwood

Sekretario: S-ino Margaret Chaldecott

Kasisto: S-ro Tom Elliott

Bibliotekisto: S-ro David Gould

Kas-kontrolistoj: Eve Matasin kaj Wre Chandler

AE-raportisto: Wre Chandler

Program-peranto: S-ino Bettie Hart.

Gravaj decidoj estis: 1. Ke membroj de S.E.S. ne plu devos esti membroj de A.E.A.; sed ni rekomendas ke ili aliĝu al la Esp-Federacio de N.S.K. por ke ili ricevu regule "Telopeo" n. 2. Ke la kosto de instruado estu \$5.00 por 10 lecionoj.

17/2 Margaret Chaldecott gvidis vortludad'n. Ĉiu elektis el korbo 6 vortojn, kaj per tiuj faris frazon. La spertaj Esperantistoj devis preni la vortojn tute hazarde, sed ni permesis al la hezitemuloj elekti siajn vortojn.

24/2 Tom Elliott prelegis pri "Komputiloj, Virinoj kaj Aliaj Aferoj".

3/3 Wre Chandler parolis pri la Birdoj de la Luno. Li iris al la Luno por intervjui la Viron sur la Luno, sed la birdoj kaptis la programon. Lia registrilo estis "magneto-tono" dudek jarojn antaŭ ol oni inventis la "magnetofonon".

—Revanto.

ĈE LA 22-A AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO



Senatano C. V. J. MASON salutas la estraron.

De maldekstre dekstren: Majo Issobe; Ralph Harry, C.B.E.; Prof. R. G. Robertson; Dr. Keith Souter (U.N. Asocio); Senatano C. V. J. Mason, Herbert Koppel; V. J. Timmins.

Tetasa tempesto

estis la titolo de duonpaĝa artikolo en la marta n-ro de UEA-gazeto "Esperanto" (vidu p. 42), pri nia kongreso en Sidnejo.

Ni citu: ". . . estas apenaŭ kredeble, ke en kongreso kun nur iom pli ol cent partoprenantoj oni trovas homojn por prezenti dekon da teatraĵoj kaj skeĉoj."

"Aŭstralia E-Asocio ne apertenas al la plej amasaj landaj

organizaĵoj, sed ĝi certe troviĝas inter la plej viglaj. Samtiel, ĝia revuo THE AUSTRALIAN ESPERANTIST delonge viciĝas inter la plej bonaj landaj Esperanto-periodaĵoj."

Pardon-Peto al Shirley

En nia longa kongres-raporto ni malŝelice preterlasis mencii; ke Shirley Fanos estis unu el la ĉefroluloj — fakte la "stelulino" — en "Tempesto en taso da Teo", prezentita de la Sidneja E-Societo. Ni petas ŝian pardonon.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

4. HERBERT KOPPEL Editor "Australian Esperantist"

Herbert received his schooling in Vienna — the city of waltzes, wine, women, songs and the "Blue Danube", which is as blue as the Yarra.

He was always interested in anything that went beyond the borders of small Austria, so his first "love" was soccer football, which contributed to international understanding through raucous yells, hooliganism, commercialism, partisanship and brawls on and off the field. Athletics was then a purely amateur sport. Herbert became a middle distance runner, and, despite his youth, became an approved judge for field and track events.

Crossword puzzling became the world craze about 1928. To his surprise, Herbert found the clue "International Language" in nine letters (instead of the usual three) and found the answer was ESPERANTO. Not long after, he bought "Esperanto in 10 lessons", by Dr. Emil Pfeffer, but, being busy studying French and English, he merely perused it.

In 1935, having Matriculated and completed a Higher Commercial College course, he joined the ranks of the unemployed. To while away the time, he joined a most unusual gardening class. Neither he, nor any flat dweller had a garden, so they were merely taken to a plot of land outside the city limits and shown how to dig and plant. The superintendent, and most unusual non-participating teacher was Dr. Emil Pfeffer, the Esperantist. During the frequent "coffee breaks" the good Doctor and his wife talked Esperanto.

Herbert never became a gardener, but he reaped a life-long harvest from the seeds then planted. A new world opened for him.

Dr. Pfeffer directed him to the "Danubio", then Vienna's biggest Esperanto Society. But, alas, this society met in an expensive cafe and 2 tram rides, plus coffee and cake posed costs too great for an unemployed person. So Herbert had to look elsewhere. Yes, he found another "society", just 4 streets away from home, and on entering was confronted by a crowd of 3 — the teacher reading "Heroldo" aloud and a student each side looking over a shoulder. Yes, he could learn if he already knew some Esperanto No, sorry, they did NOT teach. However, shortly after, a new group called "Espero" advertised their meetings, and although it was in a far away suburb, there were no "incidentals" save a small membership fee, so Herbert could (just) afford to attend. Here, he quickly learned Esperanto, together with a young enthusiast called Emil Vokal (now a Short Wave Esperanto Radio Broadcaster).

Soon he (as Secretary) and Emil Vokal formed the "Harmonio Esperanto Society", now Vienna's biggest Esperanto Society, and shortly after he was put in charge of the Austrian Esperanto Press Service for the newly formed "Aŭstria Esperantista Federacio", with the task of translating into German the most interesting items from foreign Esperanto papers and sending them to Austrian newspapers.

Having been employed for some 2 years by now as a book-keeper, Herbert had the money and inclination to attend the 1937 World Exhibition in Paris. At the Head Office of the French Esperanto Association, he spoke on Dr. Dollfuss, Austria's home made dictator, and was well received. Assistance from a cute Parisienne wearing a green star and a

guided Esperanto Tour of the World Exhibition, showed Herbert conclusively that Esperanto WORKS.

1938 the Nazis goose-stepped into Austria. 1939 Herbert quietly stepped out of Austria to England, where he became an Engineering Trainee, and where he visited the London Esperanto Club. 1940 though Herbert was classified a "Friendly Alien of Enemy Nationality", he was interned and later transferred to Canada, where a "Camp University" was formed, including an Esperanto class led by him. On release he worked in the Canadian war industry and in 1946 became a Canadian citizen.

1948: On his way to join his brother in Melbourne, Herbert met, at the Sydney Esperanto Society, Wre Chandler, John Matasin, Kaethe Schwerin and the late Freeda Smith. 1949: A Congress Committee was formed in Melbourne, and in January 1950, the 7th Australian Congress (named, self-effacingly, the Conference) was held in Mel-

bourne, and to everyone's delighted surprise, 101 attended. There had been a 25 years' "break", but the biennial chain has not been broken since. 1950 General Secretary of A.E.A., a post held till 1968, when "Tiny" Goldsmith took over. 1948: Miss Faye Andres of Adelaide visited the Melbourne Esperanto Society. The 1950 Congress provided the right setting for romance, and Herbert married her in 1951.

In 1972, Herbert donated a Drama Shield which is used as a Perpetual Trophy at every Australian Congress. As the culmination, but fortunately not the close of his Esperanto career, Herbert (together with the late Mr. Banham) was awarded the A.E.A. "Honour Badge".

Now Herbert continues as Editor of the "Australian Esperantist" and, leisure being foreign to one who has always been so active, "retirement" is still a dream for the future.

— ARTHUR COCKING.

CORRESPONDENCE COURSES

Would you like to improve your Esperanto? (Who wouldn't?) Do it by correspondence. Correspondence students can start at any time of year, learn at their own pace, fast or slow, without affecting others; and always receive the tutor's individual attention.

Our new series of 5 modern courses includes one for YOU, whether beginner, expert (course 5!) or in between. Improve your fluency, amaze your friends! Order your course now from John Moore, Pelican Street, Emu Park, Q'ld., 4703.

1. BONAN TAGON, introductory, with cassette, a sound foundation for further study. Including tuition, only \$10.
(Schools and clubs may buy the cassette, \$4, and the booklet at \$1.80 each from the Libroservo (8 Lone Pine Pde., Matraville, NSW)
2. JEN NIA MONDO. Cassette conversation course. A painless way to fluency in ordinary, everyday Esperanto. Including tuition . . . \$15.
3. The "Esperanto Teacher" course (an ideal "refresher") leads to the "Elementa" exam level, enables one to correspond in Esperanto with learners at your own level overseas. Incl. tuition . . . \$10.
4. The PROGRESSIVE course clarifies fine points, improves confidence and ability. Its textbook STEP BY STEP

is a good reference book for ever after. Including tuition, still only . . . \$10.

5. DEK KVIN PASOJ. Tre altkvalita kurso de W. Auld, facile uzebla. Avertito: Estas multa laboro en ĝi; ne por mallaboremuloj! Stoko malgranda, sed dum ĝi estas tie, ankoraŭ nur . . . \$10.

NOTE: To ensure success at the SUPERA exam, use Ken Linton's STUDLIBRO after completing Course 4. (Havebla de la Libroservo, po \$2.50).

PAROLANTA BIRDO

En la Zoologia Ĝardeno estas aŭkcio; ankaŭ sinjoro Bestamulo ĉeestas. Sed unue li ne povas konkuri, ĉar oni ofertas leonojn, tigrojn kaj aliajn grandajn bestojn, kies kosto estus tro altaj por li.

Poste venas la vico al malgrandaj bestoj kaj birdoj, kaj kiam kakatuo estis vendota, ankaŭ nia amiko partoprenas la proponadon. Li kaj unu alia, kiun li ne povas ekkoni en la densa homamaso, alterne plialtigas la prezon, sed finfine la kakatuo estas aljuĝita al nia amiko por kvindek dolaroj.

"Estas iom multekoste por tia birdo," li alparolas la aŭkciiston, "ĉu ĝi povas paroli?" "Vi devas scii tion", seke rimarkis la oficisto, "ĝi ja faris proponojn kontraŭ vi dum la lastaj dek minutoj! . . ."

—P. E. Schwerin

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 179 (259)

MELBOURNE

Junio, 1980

LAPENNA KAJ LA VORTPROVIZO DE MEZKLERA HOMO

ALAN TOWSEY

Preparante antaŭnelonge artikolon pri la lingvoinstruado, mi trovis necese konsulti tiun elstaran kaj prestiĝigan libron de Ivo Lapenna: **Retoriko**, kaj legis kun granda intereso ties rimarkojn sur pp. 78-9 pri la vort-provizio de la ordinara homo.

Ĝajne Lapenna ne akceptas la taksojn de multaj modernaj lingvistoj pri la grandeco de la vortprovizo de ordinara individuo, konsiderante tiajn taksojn tro altaj.

Li skribas, kvazaŭ la problemoj estus afero de opinio, kvazaŭ ne ekzistus difinita respondo al la demando, kvazaŭ oni povus nur **taksi** la nombron da vortoj sciataj de ordinara homo, surbaze de rezonado.

Sed la afero estas facile kontrolebla.

Mirige estas, ke Lapenna, kvankam li aliloke citas la faman danan lingviston Jespersen en **Language: Its Nature, Development and Origin** (Lingvo: Ĝia Naturo, Evoluo kaj Origino), ne mencias ties rimarkojn pri ĉi tiu temo, nek ties pli ampleksan pritrakton de la afero en **Growth and Structure of the English Language** (Kresko kaj Strukturo de la Angla Lingvo).

Lapenna diras, ke Shakespeare uzis nur 15-16,000 vortojn en sia verkaro kaj Milton inter 8,000 kaj 11,000, kaj moke komparas tiajn taksojn kun de iuj asertita vortprovizo de 34,000 por 10-jara infano.

Sendube ĉi lasta takso estas tro alta. Tamen Jespersen atentigas, ke Shake-

speare fakte uzis 21-24,000, kaj ne nur tion, sed ankaŭ, ke li ne uzis en sia verkaro multajn ĉiutagajn vortojn, kiujn li certe sciis kaj uzis en la ĉiutaga vivo. Jespersen eĉ listigas kelkajn pli literaturajn vortojn troveblajn en la tiutempa angla lingvo, kiuj ne troviĝas en la verkaro de Shakespeare, kiaj **blunder** (erarego), **decency** (dececo), **delicacy** (deli kateco), **disappear** (malaperi), **energy** (energio), **enthusiasm** (entuziasmo), **existence** (ekzisto), **elegant** (eleganta), ktp., kiujn Shakespeare certe sciis! Ĉi tiu do certe scipovis uzi multe pli ol 24,000 vortojn.

Pri la vortprovizo de infano, Jespersen citas (**Language**, p. 125) zorge kontrolitan observadon de usona knabo fare de ties patrino kaj aliaj, ekde lia 10a vivmonato. Kiam li iĝis 6-jara, oni metis slipojn ĉie en la domo, kun kraĵonoj, kaj notis preskaŭ ĉion diritan de la infano dum kelkaj monatoj. La fina listo enhavas 2,688 vortojn, krom la numeraloj kaj propraj nomoj.

Ĉar (laŭ Jespersen) oni sendube ne sukcesis noti ĉiujn vortojn uzitajn de la knabo, li certe posedis eĉ pli da vortoj ol la supra nombro indikas.

Ĉu estus do tiel mirige, ke 10-jara infano posedus almenaŭ tiom, kiom Milton uzis en sia verkaro? Kompreneble ne la samajn vortojn!

Jespersen (**Growth and Structure**, p. 125) plue citas Sweet, kiu mencias misiiston en Tierra del Fuego kiu kom-

pilis vortaron de 30,000 vortoj en la Jaagana lingvo.

Mi mem havas elementan gramatikon de la Motua lingvo de Novgvineo: la vortareto ĉe la fino enhavas 4, 135 vortojn. (Tio inkluzive 85 nomojn de fiŝoj kaj 43 de konkuloj!)

Ĉu oni vere povas kredi, ke civilizita homo, scipovante legi kaj skribi scipovas malpli da vortoj ol sovaĝulo? — nur la 4-5,000 postulatitaj de Lapenna?

Tamen ni restas ĉi tie ankoraŭ sur kampo teoria, kampo de opinioj kaj taksoj — kvankam bazitaj sur bonaj atestatoj. Kial ni ne simple **nombru** la vortojn, kiujn ni posedas?

Tio ja ne estas malfacila afero: oni prenas grandan vortaron, elektas pro konsekvenco ĉiam la duan paĝon sub ĉiu letero (ĉar ĝi estas ĉiam plena paĝo) krom **X** (sub kiu troviĝas malmultaj vortoj), kaj notas en du kolumnoj la nombron da vortoj kiujn oni (i) scipovas uzi kaj (ii) komprenas — inkluzive de tiuj sub (i) Tio estas, laŭ Lapenna, "aktiva scio kaj pasiva". Oni dividas la sumon de ĉiu kolumno per la nombro da literoj en la koncerna lingvo — 25 (sen **X**) en la kazo de la angla — por trovi la meznombrojn, kaj multiplikas tiujn meznombrojn per la nombro da paĝoj en la difina parto de la vortaro.

La rezulto estos kompreneble **minimuma** nombro — ĉar ju pli granda la vortaro, des pli granda la nombro da vortoj.

(Unue, tamen, ni difinu "vorton": pro oportuneco, ni konsentu en nia komenca eksperimento kun Lapenna kaj ne konsideru la fleksiojn kiel apartajn vortojn, nek la proprajn nomojn—kvankam ĉi tiuj restas vortoj lernotaj!) (1).

Kiam mi faris ĉi tiun eksperimenton kun kelkaj el miaj gelernantoj antaŭ multaj jaroj, mi trovis, ke 16-jaruloj scipovis uzi ĝis 15,000 vortojn, kaj rekonis kelkajn milojn pli.

Cele de ĉe tiu artikolo, mi prenis la grandan anglan vortaron **Universal Dictionary** de Wyld (ŭajld) kaj Partridge (patrig) (eldonitan en 1968) kaj kalkulis mian provizon da ordinarij uzeblaj ("aktivaj") kaj rekoneblaj ("pasivaj") vortoj. La rezulto: 25,352 kaj 37,717.

Poste mi prenis la novan **Collins English Dictionary** (angla vortaro eldonita en 1979 de Collins) kaj kalkulis mian provizon da propraj nomoj, uzeblaj kaj rekoneblaj. Rezulto: 6,016 kaj 11,830. Do finaj sumoj de 31,368 kaj 49,547 respektive.

Fine, mi prenis la vortaron Collins kaj ĉi-foje kalkulis miajn vortprovizojn konsiderante ĉiujn vortojn listigitajn

t.e., neregulaj fleksioj, derivaĵoj kaj propraj nomoj. Rezulto: uzeblaj vortoj ("aktivaj") 41,371, rekoneblaj vortoj ("pasivaj") 68,749!

Sed atentu: antaŭnelonge mi legis antropologian studon pri la origino de la religio — libro de pli ol 600 paĝoj — kaj — kvankam mi estas vivdaŭra lingvisto, studis la antropologion ĉe universitato kaj multe legis en la kampo de antropologio kaj religio — mi trovis sur preskaŭ ĉiu paĝo unu aŭ plurajn vortojn kies signifon aŭ aludaĵon mi ne scus! La aŭtoro do, kiu scipovis uzi ĉi tiujn vortojn, certe povus **rekon**i multajn pli ol mi!

Sajnas al mi do, ke Lapenna eraras malekceptante la konkluojn de la modernaj lingvistoj pri la grandeco de la vortprovizo de mezklara homo.

Li citas plue la opinion de Mario Pei: "Oni diras, ke la kompleta angla vortaro konsistas el ĉ. duonmiliono da vortoj. Estas dube ĉu iu individuo konas pli ol unu kvinonon de tiu nombro", kaj ri markas: "Tre verŝajne li estas tro optimisma en tiu takso. Certe tia individuo ne ekzistas". (**Retoriko**, p. 80).

En la lumo de mia sperto ĵus menciita, ŝajnas al mi, ke ankaŭ ĉi tie li eble eraras.

Mi eĉ ne povas konsenti kun li, ke "En Esperanto, la aktiva posedo de ĉ. 3,000 radikoj donas vere abundan vortprovizon". Uzante la supre priskribitan metodon kun **Plena Ilustrita Vortaro**, mi kalkulis mian aktivan radikprovizon en Esperanto esti minimume 7,035! Tamen mi ofte devas konsulti vortaron dum verkado en Esperanto, kaj mi estas tute certa, ke mi ne scias tiom da vortoj, kiom la eminenta Lapenna mem! (2)

Sed unu estas certa: la tasko lerni sufiĉe da radikoj en Esperanto por vere plena posedo, kvankam sufiĉe timiga en si mem, estas multe pli facila ol tiu, kiun frontas la lernanto de nacia lingvo!

NOTOJ.

(1) Estas malfacile, klare difini, kio estas "vorto". Ĉu oni konsideru **ease**, **easy** (facileco, facila) kiel unu vorton, aŭ du? **Slow**, **slowness** (malrapida, malrapideco)? **different**, **difference** (malsimila, malsimileco)? **rapid**, **rapidity** (rapida, rapideco)? Ĉar oni ne ĝenerale uzas (analoge al (**rapidity**) **differentity**, aŭ (analoge al **slowness**) **differentness**, kaj devas scii, kiun formon uzi, mi kredas, ke oni devas rigardi tiajn kiel apartajn vortojn en la angla — sed ne en Esperanto. Tion mi faris en mia unua kalkulo supre.

Ĉu **go**, **went**, **gone** (iri, iris, irinta) estas apartaj vortoj? Mi ne enkalkulis

tiajn en mia unua kalkulo, sed ja en la tria Kaj eĉ en Esperanto, radiko povas havi du (aŭ pli) signifojn; ekzemple: kreto (akreto), krampo, kresto, referenco. Ĉiu signifo, miaopinie, estas aparta vorto.

(2) Oni ankaŭ ne forgesu, ke oni devas lerni la Esperantajn ekvivalentojn de multaj propraj nomoj, ĝis kelkaj miloj, kiel supre dirite Tiujn mi enkalkulis ĉi tie.

REFERENCOJ:

Retoriko, de Ivo Lapenna (Rotterdam, 1971).

Language: Its Nature, Development and Origin, de Otto Jespersen (Allen and Unwin, 1947).

Growth and Structure of the English Language de Otto Jespersen (Blackwell, 1948)

Motu Grammar and Vocabulary, de W. G. Lawes (Sydney, 1896).

ŜVARCAJ ANALOJ DE 1979

Jaro de Migrado

(daŭrigo)

La Prezidento de Usono, Jaĉjo Carter (parto de la heroino de "La Boaco de Amy") havis kabinetan problemon. Sed li decidis migri ne al Aŭstralio sed al la malpli longa Aŭstrio. Tien migris ankaŭ la Leonido, Kamarado Brezhnev. Kaj tie la du superpotencestroj, post la kutima valsancado de Vieno — ĉar por slavoj devas esti valsoj — sidis sur la montpinto, kiu superrigardas la Danubon, bonan riveron por nudbano! Ili longe diskutis pri la salo, salminejoj kaj la salmonta festivalo. Tiam sendube ili parolis pri la migrado el Hindociĥinio, kaj eble pri la prezidenta sano La arakido povis demandi al la leonido ĉu, kiam li iras al sia kabineto aŭ centra komitato en la Kremolino, en sia kostumo kremlita, necesas, ke li estu portito. Kaj eble la leonido klarigis, ke li estos portito nur post sia morto. Ĉiu partoprenanto en la montpintaj konversacioj havis grandan salamon, sed ne deziris difekton al sia karapaco. Tamen je la fino la valso ŝanĝiĝis al salvo.

En oktobro Brezhnev migris al Orienta Germanio por kunfesti la 30-an datrevenon de la starigo de la popola demokrata respubliko. Tie li sugestis, ke kelkaj el la rusaj turistoj, kiuj jam havis longan liberigtempon en la respubliko, reiru al Sovetunio, kondiĉe, kompreneble, ke ĉiuj usonaj turistoj reiru al Nordameriko. Sed la komercistoj de la Natolandaro tre ŝatas amerikajn turistojn, kiuj kunportas amikajn monerojn aŭ amikerojn.

En la Meza Oriento estis ankaŭ iom da migrado en 1979. La Prezidento de Egiptujo kaj la Ĉefministro de Israelo/ Izraelo estis konstante ĝenataj pri la emoj de Israelidoj fondi koloniojn sur la okcidenta bordo de la Rivero Jordano. Tamen kelkaj Izraelanoj migris el Egiptujo al sia hejmlando. Tio lasis spacon sur la pinto de Monto Sinajo por starigi-

monumenton al la mosea leĝo, kiun hebreoj Islamanoj kaj Kristanoj egale malobservas.

Jus antaŭ la fino de la jaro komenciĝis enmigrado al Afganujo, kie alia aminda ŝtatestro, lia frato kaj lia nepo ĉiuj mortis pro rezisto al rusa frateca enmigrado. En Kabul la atmosfero estis tute ne kluba, kaj la rusoj trovis sin la viando en bulka sandviĉo.

Sed la plej elstara aŭ stelara migrado de 1979 estis tiu de Lia Sankta Moŝto, la Papo Johano Paŭlo, kiu vizitis sian karan hejmlandon, Pollandon, la naskiĝejon de Zamenhof, kaj poste Irlandon. En Pollando li sidigis sur blanka trono kvankam oni antaŭe asertis, ke tute ne ekzistas eĉ unua paltrono en tiu lando. En Irlando, spite al la nomo, li ne povis ĉieniri, ĉar en la nordo estas dorno malpli da turistoj ol teroristoj!

Neoficiale la Esperantistoj, kiel kutime, migris svarme kiel lokustoj al Lucerno, kie ili vagadis sub palmoj kaj lampoj, dancis je la kongresa balo kaj bonguste manĝegis dum la oficiala bankedo. La svajsoj, por kiuj la turismo estas industrio, ĉarme kaj varme bonvenigis la kongresanojn apud sia lago kie tute ne troviĝas galo.

En Aŭstralio la Esperantistoj pasigis la jaron preparante sin por la kutima granda dujara migrado al la Tutauŝtralia Kongreso. Post Kristnasko la popolo de Sidnejo, timante la enfluen de Esperantistoj, forvojaĝis en 149 malgrandaj velboatoj al Tasmanio per flugiloj de facila vento. Tamen la organizanto de la Kongreso daŭrigis siajn preparojn, kaj tiucele kaptis la armean palacon. Sed la Kongreso okazis en la unua jaro de la okdekaj jaroj, kies analoj estas afero por la estonteco.

—HENRIKO.

PRI BIOLOGIA NOMENKLATURO de Wre Chandler.

La unuaj eŭropanoj en Aŭstralio nomis la indiĝenajn vivulojn laŭ similaj kreitaĵoj en Eŭropo, plejofte pro tre suprajaj similecoj. Ekzemple, oni nomis la "magpie" pro nigra kaj blanka plumaro. Krom tio ĝi havas neniun karakteron similan al la eŭropa pigo. Ni nomas nian arbo-loĝantan marsupiulon "possum" kvankam ĝi ne multe similas al la amerika didelfo. Ni nomas multajn indiĝenajn florojn "rose", nur pro la koloro. Ni nomas pli ol cent speciojn de birdo "wren", simple ĉar ili portas vertikale la voston.

Esperantisto ordinare serĉas nomojn en la vortaro pro la — ĝenerale erara — komunlingva nomo. Ĉi-sube, mi citas kelkajn ekzemplojn. La birdnomojn mi elektas el "Komunlingva Nomaro de Aŭstraliaj Birdoj", eldonata partope en "La Suda Mevido", de la Aŭstralia Sekcio de Ornitologia Rondo Esperantlingva.

La nomojn de bestoj mi rekomendas, sed mi ne rajtas tiujn nomi oficiale.

ANGLA MISNOMO ESPERANTO-MISNOMO REKOMENDATA NOMO

Butcher Bird (Shrike)	Lanio	Kraktiko
Laughing Jackass	Ridanta Virazeno	Kukaburo
Blue Crane	Blua Gruo	Blankvizaĝa Ardeo
Magpie	Pigo	Gimnorino
Bell-magpie	Sonoril-pigo	Strepero (Karavongo)
* Parokeet	Konuro	Lorikito
† Robin Redbreast	Rubekolo (Ruĝgorĝulo)	Robeno
Cuckoo-shrike	Kukol-lanio	Koracino
Wagtail	Motacilo (motacelo)	Ripiduro
Willie Wagtail	Motacilo	Vilĉjo
Magpie Lark (Mudlark)	Pigalaŭdo (kotalaŭdo)	‡ Gralino (kotalaŭdo)
Opossum (possum)	Didelfo	Falangero
Squirrel	Sciuro	Petaŭro
Iguana	Igvano	Goano
Badger	Melo	Vombato
Native Cat	Indiĝena kato	Dasjuro
Native Bear	Indiĝena Urso	Koalo
Flying Fox	Fluganta Vulpo	Frukt-vesperto

* Parakeet estas sud-amerika papago. La akceptita nomo de la aŭstralia papageto estas "lorikeet".

† 68 specioj de aŭstraliaj birdoj havas "robin" kiel parton de la nomo.

Plejparte O.R.E. rekomendas uzi "robena" por tiuj birdoj. Tamen por multaj specioj, "Komunlingva Nomaro" uzas alernativan nomon.

‡ Ĉar la angla nomo "Mudlark" troviĝas en multaj lingvoj, O.R.E. akceptas "Kotalaŭdo" por tiu ĉi birdo.

"KOMUNLINGVA NOMARO DE AŬSTRALIAJ BIRDOJ" eldoniĝas partope en "La Suda Mevido". Ni planas pleneldoni ĝin en Novembro 1981.

WRE CHANDLER PARDONPETAS

En la decembra "A'E.", mi nomis "Timmie" Timmins la doĵenon de nia Movado en Aŭstralio. Mi uzis la voston laŭ ties signifo en "P.I.V.". Mi tiam kredis, tute sincere, ke Timmie estas la plej longdaŭra esperantisto inter ni.

Tamen, ĉe la Kongreso, oni sciigis min ke ankaŭ Johano Matasin estas sepdek jarojn esperantisto, kaj povas esti aliaj. Al tiuj mi petas pardonon.

BONVOLU, se vi estas jam kvardek jarojn esperantisto, sciigi min pri:

1. via naskiĝjaro.
2. la jaro de via esperantistiĝo.

Mi deziras kompili liston de ĉiuj "veteranoj" kaj "jubileanoj" en Aŭstralio.

"Veteranoj" estas tiuj kiuj dum pli ol kvardek jaroj scipovas Esperanton, "Jubileanoj" estas tiuj kiuj jam pli ol kvindek jarojn scipovas Esperanton.

Eble, ĉe venontaj Kongresoj ni povos havi fak-kunsidon de Veteranoj.

Kiel 1977a prezidanto de V.E.K. mi forte deziras scii kiuj estas la veteranoj kaj jubileanoj inter ni.

E. W. Chandler, 57 Northcote Street, NAREMBURN, N.S.W. 2065.

RECENZOJ

PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO, 1979, Oxford University Press, Kompilis "Language Services". 87 paĝoj, 75 plenkoloraj Havebla de A.E.A. Libroservo \$6.60.

La altgrada grupo de nia klubo entreprenas "recenzajn vesperojn", por atentigi la ĉeestantaron pri novaj legindaj libroj. Kiam mi proponis recenzon de vortaro, kelkaj gesamideanoj, demandis, kiamaniere oni povas recenzi vortaron? Mi devis memori ilin pri la fama recenzo en komika revuo, rilate al la "Plena Vortaro de la angla lingvo". Skribis anonimulo: "Mankas intrigo, sed la verkisto disponas pri interesa vortostoko".

Nu, efektive, en tiu altgrada grupo, ni multe konversacias pri diversaj aferoj, sed ofte estas memevidente, ke ni facile kaj flue parolas pri gramatiko, aŭ skismoj en la movado (antaŭ multaj jaroj, kompreneble, temas pri tiuj ldistoj), sed kiam ajn ni volas diskuti pri ĉiutagaj aferoj, kiel sparkseruro, komizo, pistujo aŭ ortilo, mankas al ni vortostoko. Kredible la denaskaj Esperantistoj devas lerni la ĝustajn nomojn de tiuj objektoj; ĉu vi, kara leganto, povas traduki ĉiujn sen vortaro, aŭ pli malfacile, trovi la Esperantan vorton se mi parolus al vi pri "car key, shop assistant, pestle or set-square"? Se jes, mi gratulas vin.

La Praktika Bildvortaro estos nemalhavebla helpilo en konversaciaj rondoj kiel la nia, aŭ eĉ pli en progresantaj grupoj. Ĝi enhavas sur ĉiu paĝo bone desegnitajn koloritajn bildojn, ekzemple "en vendejo", "en kontoro", "parencoj" k.t.p., eĉ "korelativoj" ne mankas. Se en la grupo oni volas pridiskuti "fadenlaborojn", oni povas trovi sur unu paĝo ĉiujn vortojn rilate al tiuj taskoj. La vortoj estas troveblaj en la kutimaj vortaroj, kompreneble, sed oni devos traŝerĉi de "bobeno" ĝis "zipo" en aliaj vortaroj, dum la konversacio velkos.

Kredible oni povas kritiki la tute "okcidentulan" aŭ eĉ iom "anglecan" etoson, ĉar ekzemple la policano portas

tipan kaskon neniam viditan ekster Britio, kaj la propraj nomoj de la "parencoj" ne klarigas la aferon al Islandanoj aŭ Hungaroj, kiuj utiligas aliajn sistemojn. Tamen, oni devas emfazi, se loĝanto en Afriko aŭ Sudameriko ankoraŭ ne disponas pri ĉiuj luksoj ilustritaj en ĉi tiu libro, ŝi/li emas havigi ilin, kaj bone konas kiaj ili aspektas

Permesu al mi fendi unu malgrandan haron, por pruvi, ke mi zorge studis ĉiujn detalojn. Kial "en klascambro" Tasmanio estas verda, kaj aliaj regionoj de Aŭstralio estas ruĝaj? Mi konsentas, ke entuziasmaj verduloj loĝas en nia plej eta ŝtato, sed ankaŭ ni "ĉeferuloj" rajtas esti verdaj, ĉu ne?

—Robi Robertson.

Laŭ revuo "Esperanto" (aprilo 1980, p. 65), ĝi estis la plej vendita libro dum 1979. Inter aprilo 1979 kaj marto 1980, vendiĝis pli ol 3000 ekzempleroj de tiu multilate pionira verko . . . temas pri entrepreno de unu sola homo (Terence Watts), pri lia propra investo, labora kaj financa". Lian nomon oni ne trovas en la libro mem!

AŬSTRALIA = KRONIKO

● **PERTH:** Kelkaj el niaj anoj forveturis alilanden: Ges-roj McGrath vizitos Anglujon kaj kelkajn landojn de okcidenta Eŭropo; Jack Hawks partoprenos la Universalan Kongreson en Stockholmo Shirley Gradusov, kiu estas profesia lingvo-instruistino, per "Pasporta Servo", planas viziti William Auld (Prezidanto de la Akademio) kaj D-rinon Marjorie Boulton (en Oxford). Ŝi ankaŭ intencas plibonigi sian lingvoscion per monata restado en la franca kulturdomo en Gresillon.

Dek du membroj partoprenis piknikon ĉe Bull Creek je la 13-a de aprilo. Ni gastigis kaj ĝuis la kompanion de Ges-roj Koorn el Nederlando, kiuj partoprenis kelkajn klubkunvenojn. Ges-roj Gilbert kaj Decia Shannon el Brisbano vizitis nin kaj estis gastigitaj en la hejmoj de Ges-roj Einihovici kaj Dean.

T. Einihovici

● **MELBOURNE:** S-ro Henry Rosengren daŭrigis sian prelegserion "Kiel gasto de Adolf Hitler dum la 2-a mond-

milito". Je 14/4 li rakontis pri translokiĝo de aŭstraliaj trupoj de Grekujo al Kreto kaj tieaj bataloj kun germanoj. Je 12/5 li rakontis kiel li fariĝis militkaptito sur insulo Kreto kaj priskribis transportadon tra Grekujo al internigejo en Bavario.

En Melburno okazas nun, unufoje monate "Inter-Klubaj Vizitoj". Je 15/3 dek kvar personoj vizitis la grupon en Waverley, en la hejmo de F-ino I. Gale, kiu preparis distran programon kaj regalis la ĉeestantojn. Je 16/4 la Oakleigh grupo akceptis 19 ge-esperantistojn en la loka biblioteko. Ges-roj Fallu, S-ro R. Reed kaj F-ino Ann Hearn preparis varian programon de konkursaj ekzercoj, rakontoj kaj kantado kaj, kiel kutime, la vespero finiĝis per regalo. Je 27/5 dek du membroj el la 4 kluboj kunvenis ĉe la Malvern-grupo. Tie F-ino L. Hooper, S-ro D. Pescod kaj S-ino A. Paling prezentis tre lerte elpensitan programon.

● **SYDNEY:** D-ro W. Gasser, 24/3, parolis pri konferenco, kiun li ĉeestis en julio 1979 en Northampton, Anglujo. Temis pri "simpligita literumado de la angla lingvo". Li klarigis la malfacilaĵojn, kiujn alfrontas ne nur fremdlandanoj, sed eĉ denaskaj angle-parolantoj. Je 31/3 ni prezentis lumbildojn pri la bela roz-urbo Petra, pri floroj, bestoj, pejzaĝoj kaj de geamikoj en la Esperanto-mondo.

—M. Chaldecott.

Je 14/4 oni reludis la muzikon de la 22-a Kongreso. Bedaŭrinde, la registraĵo estis iom difekta, tamen estis sufiĉe ĝuinda vespero. Ilija Grahovac, 21/4 legis elĉerpajojn el la moderna literaturo.

S-ino Betty Hart, 28/4, distris nin per ilustrita prelego pri la vivo de knabino. La ilustraĵoj estis el reklamoj en virinaj gazetoj. Ŝi komencis la rakonton per reklamo por beb-pudro, kaj finis per ilustraĵo de maljunulino.

Je 5/5 distris nin Tom Elliott, per prelego pri "Kiel fuŝi lerte". Li priskribis kiel konato lia, kiu estas denaska fuŝulo, sukcesis fariĝi riĉulo, per lerta fuŝado. Tom diris ke li mem kapablas fuŝi, sed verŝajne ne lerte. Semajnon poste, Volo Gülling montris bildojn de sia naskiĝurbo, Hamburgo.

—Revanto.

● **MANLY:** En la hejmo de S-ino R. Carruthers okazis, 8/4, aferkunveno. Oni esprimis dankojn al ĉiuj, kiuj helpis sukcesigi la Post-Kongreson en "Hotel Manly" kaj oni laŭleĝis gratul-leterojn de eksterŝtataj vizitintoj. Ni dankas al

ĉiuj, kiuj esprimis kontenton pri niaj aranĝoj kaj certigas, ke ni mem ege ĝuis ilian amikan kuneston dum niaj 4 feriaj tagoj. — Marjorie Duncan.

● **BRISBANE:** Duduek kvin anoj partoprenis, 12-13 de aprilo, studsemajnfino ĉe Mt. Tamborine. Anoj alvenis vendrede kaj post vespermanĝo partoprenis komunkantadon. Sabate estis tuttaga studado. Tom O'Grady daŭrigis, per la rekta metodo, instruadon por komencantoj. Kay Ross gvidis la progresintojn, kaj grupoj el la konversacia kaj literatura klasoj kaptis la okazon plibonigi aspektojn laŭlektajn. Sabatvespere Jan Veacock tre interese prelegis (kun lumbildoj) pri lokaj birdoj. Poste estis prezentitaj skeĉoj kaj kantoj. Ni bonvenigis F-inon A. Curtis, kiu esperantiĝis antaŭ 50 jaroj. Dimanĉmatene okazis denove klasoj kaj post lunĉo finiĝis tre ĝuinda kaj valora semajnfino.

Dum la monata kunveno en aprilo, ni decidis starigi "Muzeon pri Esperanto en Kvinlando". Antaŭ kelkaj jaroj ni provis verki historion de nia societo, sed trovis mankon de kroniko pri la periodo 1907-1924, kaj tial prokrastis la verkadon. Anstataŭ la historio, ni decidis registri ĉiun novaĵon pri ĉiuj aspektoj de Esperanto en Kvinlando ekde la inaĝuro en 1906. Tiel ni povos konservi konatan historion, plus rilatajn dokumentojn. — Ray Ross.

● **TOOWOOMBA:** La 3-a servo de Esperanto-kursoj ĉe McGregor College okazos 12-24-a de januaro, 1981. Por ke la Somera Lernejo venigu eksterlandan instruiston por ni, devos esti almenaŭ 80 ĉeestantoj. Toowoomba estas en januaro kutime plaĉa loko, ĉar ĝi kuŝas sur la kresto de la montaro, kaj ni studos kaj loĝos en komfortaj, modernaj konstruaĵoj ĉe Downlands-Kolegio. Bonvole sendu informpetojn, en la angla lingvo, al "McGregor College", P.O. Box 100, Toowoomba.

— Jean Lehane

NEDERLANDA ESPERANTISTINO BEZONAS HELPON

S-ino Sija Wijngaarden, kiu deĵoras en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam vizitos Aŭstralion dum oktobro kaj novembro. La 60-jara sinjorino bezonas helpon pri loĝado kaj gvidado en Sidnejo, Brisbano, Melburno kaj Tasmanio. Ŝi estos en Sidnejo de 19-a sept. ĝis 14-a okt., en Brizbano de 15-a ĝis 21-a okt., en Melburno de 22-a ĝis 29-a okt. kaj Tasmanio de 29-a okt. ĝis 2-a nov.

Iu leganto kiu deziras gastigi ĉi tiun interesan transmaran esperantistinon kontaktu en **Sidnejo**: Les Scott 977 3338; en **Brizbano**: Ray Ross 345 2402; en **Melburno**: Jack Fallu 570 2232; en **Tasmanio**: Mac LeFevre, c/o Public Offices, Launceston.

DUA (KAJ LASTA, KAPITULACIA) APERTA LETERO AL S-RO IVAN MADDERN

Kara Ivan,

Mi cedas! Mi ne scias, ke ne nur Zamenhof sed ankaŭ la vivopinganta Jesuo apogus vian . . . ni diru, tre praktikan metodon fari propagandon por la internacia lingvo Kaj alian novan scion mi ŝaldas al vi: ke tiuj, kiuj volas per pacienco konvinki la aŭtoritatojn (t.e. leki iliajn botojn), anstataŭ forvipi ilin, fakte ludas la rolon de Judaso.

Sed nun mi petas vin daŭrigi vian anoncitan kampanjon kontraŭ la kanajlaro (kaj nepre uzu la pluralon "ni", por ke la eksteruloj sciu, ke vi kondamnas ilin en la nomo de la tuta movado). Tiel, kiam vi estos skurĝinta ĉiujn koruptitajn burokratojn kaj senmaskiginta la plej lastan mensongan politikiston en la lando, ni ĉiuj ĝoje partoprenos en la fruktoj de via penado.

Danke, via

Trevor Steele.

Ni estas maljunaj! Ni tamen ne plendu! Humile ni l'finon de l'viv' ne atendu! Ni arde agadu! Ni vivu labore Al niaj ideoj kaj landoj honore! Ni estu al la gejunuloj similaj— Al celoj de nia Movado utilaj, Ĝis lasta momento, ĝis fina vivhoro, Ke estu pri ni maljunuloj, memoro Pri nia sindono, pri nia fervoro.

Petro Poliščuk,

Taškent, U.S.S.R.

MALAVARA DONACO DE S-INO K. SCHWERIN

S-ino Kathe Schwerin (Sydney) donacis \$1000 al A.E.A., kiun sumon ŝi destinas por la sekvantaj celoj: \$150 por la "A.E." Subten-Fonduso, \$350 por la Koresponda Kurso kaj \$500 por la Ĝenerala Kaso de la Asocio.

Jen kiel nia Prezidanto respondis al ŝi:

Kara S-ino Schwerin,

Kiel Prezidanto de A.E.A. mi deziras esprimi la elkoran dankon de nia Asocio kaj de mi persone, por via ege malavara donaco.

Ĉi tiu estas ankoraŭ unu ekzemplo de la sindonema agado kaj konstanta laboro dum multaj jaroj, kiujn plenumis vi kaj la kara edzo, bedaŭrindege forpasinta, sed neniam forgesota inter ni samideanoj kaj amikoj.

El plena koro, sincerege via
Robi Robertson.

LA "A.E." SUBTEN-FONDUSO

Kune kun la lasta numero de "A.E." ĉiu leganto ricevis alvokon por subteni Fonduson por la daŭra eldono de nia gazeto. La respondo de membroj estis mirinda. Jen la ĝisnuna listo kun sincera danko:

LISTO DE DONACINTOJ

Esperanto Advancement Co-op., Melbourne	\$100
I. T. & E. Maddern, Morwell, Vic.	10
Dorothy Howes, Melbourne	5
Ma.ion Maddern, Melbourne	5
Pai ippa Maddern, Oxford	5
H. & F. Koppel, Melbourne	10
H. M. Cohen, Melbourne	2
Ann Christophers, Melbourne	2
Pyke Memorial Fund, Melbourne	10
Esperanto Federacion de Victoria	10
R. L. Harry, C.B.E., Canberra	20
Capricorn Esperanto Society	10
John Moore, Emu Park, Queensland	5
J. N. Prewett, Echuca, Victoria	2
"Anonymous", Wonthaggi, Victoria	5
I. & I. Fallu, Melbourne	10
Barbara Williams, Melbourne	20
S. & M. Ellyard, Canberra	10
Kay Augustus, Melbourne	5
Dr. C. Caldera, Perth	20
Dr. K. Smith, Manly	5
C. St.ochnetter, Pyengana, Tasmania	5
M. & A. Leereveld, Melbourne	10
Eunice Graham, Manly	5
Winsome Greenhalgh, Brisbane	5
S-ro Stuckstedte, Carnarvon, W.A.	3
Eddie Hearne, Melbourne	10
W. L. Illingworth, Perth	5
Jack Campbell, Dorrigo, N.S.W.	5
Prof. R. and S-ino I. Einihovici, Sydney	10
Jean Lehane, Toowoomba, Q'ld	5
S-ino Burrows, Rodingstone, Q'ld	2
Dorris Sinclair, Peacheater, Q'ld	3
Eileen Oliver, Orelia, W.A.	5
Agnes Curtis, N. Tambourine, Q'ld	2.60
L. & B. Scott, Manly	10
Ann Hearn, Melbourne	5
Lilian Fridenberg, Melbourne	5
May Frogley, Melbourne	2
Gerld Tuffman, Healesville, Victoria	5
Dr. A. & S-ino I. Einihovici, Perth	10
Ges-roj N. Collier, Buderim, Q'ld	3
Magdalena Rosza, Orange, NSW	5
S. Strohbach, Lenah Valley, Tasmania	5
V. J. Timmins, Waitaro, NSW	10
S-ro W. Jaeger, Saratoga, NSW	88
Vera Payne, Perth	5
Kaethe Schwerin, Sydney	150
Trevor Steele, Brisbane	5
Cliff Tronerud, Tweed Heads, NSW	5
Herta Mueller, Sydney	10
Eino & Erica Loooris, Hobart	10
Margaret Chaldecott, Sydney	10
A. Mason, Jindalee, Q'ld	5

K. J. Anderson, Brisbane	2	Harold Beechey, Melbourne	5
Ilija Grahovac, Sydney	20	Rev. J. Midgley, Melton Sth., Victoria	3.50
J. S. Paroz, Brisbane	10	Edna Giles, Manly	3
Toowoomba Esperanto Society	10	E. M. Eden, Ravenshoe, Q'ld	5
Gladys Burmeister, Melbourne	2	L. M. Drummond, Melbourne	5
James Oki, Melbourne	5		
H. G. Onn, Adelaide	8		
			\$773.10

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

5. KENNETH G. (KEN) LINTON

The man who wears at least three hats.

Ken, we learn with some satisfaction, is NOT a native Melbourneite! He was born in Neutral Bay, N.S.W., lived as a child in various parts of New Zealand, and was transplanted to Melbourne only when he was old enough to survive the climate.

He was a remarkable young man in that — through luck and capability — he managed to keep his job with an electrical firm right through the Depression.

Quite early in life, he had a love for languages. He taught himself Latin and mastered it sufficiently to read several books. Afterwards, however, he turned to French in which he was so fluent, that, 12 years afterwards, he could readily converse with some French-Swiss friends. Alas, though! When he visited Paris in 1976 he found that, although some remained, and though he still read a good deal in that language, much of his spoken French had melted away like the snows of yesteryear. Perhaps this was because he had become steeped in Esperanto, which he had commenced way back in 1931.

In 1941, he joined the Air Force, and was sent to New Guinea where he learned his 5th language — "Pidgin" — of which he gained such a grasp that he could really get to know the indigenes — as evidenced in his book "Kanako el Kananam". This, by the way, constituted his thesis for the "Klereca" Diploma. (See Ken's "Mia Esperanta Vivo" in "The Australian Esperantist", some time ago.)

The nuptial bells rang out in 1934 and the union produced one daughter, June, who married young and gave Ken a fourfold increase in the form of four grandchildren — now young adults. June has lived in India, Iran (but not recently), Egypt, New Guinea and U.S.A. She has inherited a flair for languages — including Esperanto. Lucky Ken has always had somewhere interesting to go for his holidays, and he has made long trips — in distance and duration — to India and Virginia. He has proved that Esperanto makes con-

tacts, and contacts make friends.

Vocationally, we left Kenneth G. in an electrical firm at the end of the depression. After the War, he made a complete change of profession, into the "akvo-forta" business. I gather that the "strong waters", did not refer to potent alcoholic drinks, but to the Latin word for an acid — aqua fortis. In short, he went into the etching business with a firm which made "plates" for various publications. For 26 years (you can't accuse him of having a "grasshopper mind"), he occupied an administrative position, his particular care being the "costing" of processes "before and after". Thus he developed his gift for organisation, book keeping and cash control. These gifts have served the Esperanto movement very well for, throughout many years, he has held such offices as President, Vice President, Treasurer, Australian "Peranto" for U.E.A., and so many posts I won't even try to list them all.

At the moment, three of the hats he wears simultaneously are those of Chief Examiner, Vice President and Chief Delegate to U.E.A.

Retirement? Out of character!

How does he spend his time nowadays? Well, for many years he has had demanding and time consuming non-Esperanto interests. However, he still spends a great deal of time in attending Esperanto gatherings. Go to any Australian Congress and you'll see Ken on the dais behind the official table or in front of a blackboard, where, with smiling enthusiasm and full throated jocularity, he stands teaching the finer points of Esperanto usage. If he's in neither place, you'll find him conversing in an "after the session group." If you see him, say "bona tagon". You'll find him an easy man to talk to.

—ARTHUR COCKING.

Pro spacomanko ni devis prokrasti kelkajn raportojn, i.e. de la Viktoria kaj Kvinlanda Federacioj. Jam delonge ni ne plu aŭdis de la Federacio de N.S.K. kaj ĝojus ricevi detalan raporton. Red.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603
Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.
Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 180 (260)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1980

KUN GRANDA BEDAŬRO

ni devas raporti pri la mortoj de
Ivan T. MADDERN kaj John MATASIN
je 28/7/1980 en Morwell je 2/8/1980 en Sydney
Nekrolojoj sekvos venontnumere

"LA NOBLA KORANO" IN INTERNATIONAL EXHIBITION (The Esperanto Translation of the QUR'AN)

Between 8 and 31 May, 1980, "La Nobla Korano" and the book "Je la flanko de la Profeto" were exhibited with some eight translations (English, French, German, Indonesian, Italian, Latin, Malay, Persian) in the Library of the Australian National University in Canberra. The occasion was the International Conference on the Koran to celebrate the 14th Century of the Muslim Era.

With the books was the following note in English:

"The first edition of 'La Nobla Korano' appeared in 1968 as No. 10 in the series 'Oriento-Okcidento' under the auspices of the Universal Esperanto Association, a non-governmental organisation in consultative relations with UNESCO, as part of the latter's Major Project on Mutual Appreciation of Eastern and Western Cultural Values. A second edition followed in 1970.

"The translator, the late Dr. Italo Chiussi, in his introduction, while modestly professing his personal inadequacy, refers to 'The richness of the Esperanto language, which possibly makes this translation in a certain sense even more suitable than some national

language versions.' He says that because the language of the Qur'an is 'rich in metaphors intimately linked with the manner of thinking and customs of the Arab people', he has aimed at a translation respecting the original text but yet has regard to 'western capacity for imagination'. In some cases where word for word translation seemed impossible he has retained the Arabic word (e.g. Ka'ba, Kibbla, Umra) with an explanatory note. He has avoided a multiplicity of footnotes, while giving comprehensive explanations of his translations of 'Rahman' and 'Rahim', and of this method for expressing the 'dual' forms. "Dr. Chiussi was assisted by Mr. Fazole Ilahi Anweri, Lagos, and Dr. Nassif Isaac, Cairo, as well as by Prof. Gaston Waringhien, President of the Esperanto Academy.

"Zafrulla Khan, Judge of the International Court of Justice and former Foreign Minister of Pakistan, concluded his 8-page introduction as follows:

"One must congratulate Dr. Italo Chiussi for his enterprise in making a translation of the Qur'an into Esperanto, which should become a common second language in ever more extensive regions,

and thus pave the way for the understanding of the Qur'an by those who do not have a worthy translation in their own language but who know Esperanto."

The books were lent by Mr. R. L.

Harry, President of the Canberra Esperanto Club.

More than 50 delegates from Asia, Europe, North America and Australia visited the exhibition which was also open to the public.

LA UNUA TUTAMERIKA ESPERANTO-KONGRESO

La ĉarma kaj malgranda urbo SAN LUIS estis fondita de Luis Joffé en 1594. Ĝi apartenas al la centra regiono de Argentino kaj situas je proks. 460 km sudokcidenta de Cordoba.

De la 12-a ĝis la 15-a de julio, 1980, tiu trankvila urbo estis scenejo de tre grava evento: la Unua Tutamerika Esperanto-Kongreso, kies ĉeftemo estis "Lingvaj Aspektoj de Tutamerika Kullaboro". Ĝiaj afablaj 60.000 enloĝantoj havis okazon aŭdi kaj vidi multon pri Esperanto.

El la 350 aliĝintoj al la kongreso ĉeestis reprezentantoj de 7 landoj: Brazilo (52), Ĉilio (2), Kolombio (1), Peruo (1), Urugvajo (2), Usono (1) kaj kompreneble Argentino (349). Laŭdindaj estis 2 junaj nordorientaj brazilanoj, kiuj veturis dum 120 horoj per aŭtobuso kaj trajno por atingi la urbon San Luis.

La kongresejo estis la "Escuela Normal Mixta 'Puan Pascual Pringles'". Ĝi estas lernejo kiu preparas estontajn instruistojn. La urbestro de San Luis deklaris D-ron Humphry Tonkin "Honora Gasto" de la urbo.

Prestigiis la inaŭguran solenon la urbestro de San Luis, la provinca sekretario pri edukado, la prezidanto de UEA, la prezidanto de Ligo Argentina de Esperanto, S-ino Ursula Grattapaglia (estrarano de UEA pri regiona agado) kaj aliaj elstaraj esperantistoj. Oni ege aplaudis la belan festparoladon de Prof. Walter Francini (San Paŭlo) kaj la mirinde fluajn kaj riĉajn salutvortojn de D-ro Tonkin.

Dum la kongresaj tagoj funkciis poŝta servo en la kongresejo kaj la kongresanoj povis sendi siajn leterojn en bele stampita koverto. Bonege diskonigiis la kongreso pere de la gazetaro, radio kaj televido. La prezidanto de UEA estis plurfoje intervjuita de raportistoj. En la salono de la Departamento pri Akvo kaj Energio de San Luis, okazis ekspozicio, kiu prezentis materialon ricevitajn dum la organizado de la kongreso. Ĉe la restoracio de la Nacia Universitato la kongresanoj ricevis bonajn manĝaĵojn je malalta prezo. Paralele al la laborkunsidoj ded la kongreso prezentiĝis altnivelaj prelegoj pri diversaj temoj:

D-ro Maximo Valentinuzzi (Buenos Aires) prelegis pri "La nocio de sistemo

kaj ĝia aplikado en moderna vivo".

D-ro Helio F. Aderne (Belo Horizonte, Brazilo): "Aspektoj de la luktoj kontraŭ akcidentoj en Brazilo."

Ivan Maettig (Santiago, Ĉilio): "La aŭktoktonoj (indigenoj) el Ĉilio."

S-ro Curt Milkuschutz (Buenos Aires): "Ĉu eblas longigi la vivon?"

D-ro J. A. Quina Gonzales (Buenos Aires): "Sociala Medicina Problemo pri Tabakismo".

D-ro Walter Francini (San Paŭlo): "Eduka Valoro de la diversaj poeziaj formoj".

Inĝeniero Alberto Barrocas (Urugvajo): "La Evoluo de la Atoma Teorio."

Poldevena pastro, loĝanta en Argentino, belege predikis en Esperanto dum la meso okazinta la 13-an de julio. Je 16-a de julio kongresanoj faris tre agrablajn ekskursojn. Ili havis la okazon konatĝi kiun pentrindaj lokaj kaj unu el la plej grandaj diĝoj sudamerikaj. La sekvanta tago kongresanoj ekskursis al Akonkagvo,, la plej alta monto de la Andoj.

Kvankam malgranda, la grupo esperantista de San Luis, kies prezidanto estas la junulo Pedro Clemente, tre bone organizis la kongreson, dank' al la kullaboro de la esperantistoj de Buenos Aires, Cordoba, Rosario kaj Venado Tuerto. Krome la urbestro kaj la sekretario de turismo donis grandan apogon al la evento.

La malvarmega vetero ne sukcesis senentuziasmigi la eksterlandanojn tre ĉorlotitajn ed la varmkoraj argentinanoj. Tute certe la plimulto el la kongresanoj denove renkontiĝos en 1981 en Brasilio, dum la 66-a Universala Kongreso, kaj en 1982 en Kolombio, dum la Dua Tutamerika E-Kongreso.

—Elvira FONTES, Prezidantino de San Paŭla Esperanto-Asocio kaj brazila sekciestrino de IELEI.

TELEGRAMO AL NIA REDAKCIO

Stockholm, 7-8-80. Pli ol 1800 partoprenas kongreson. Dek aŭstralianoj. Maertens, Belgio, nova prezidanto. Kongreso elstara sukceso.

—Scott.

LETERO DE LA NOVA PREZIDANTO

Karaj amikoj,

Konforme al la aranĝoj deciditaj de la Generala Kunveno de A.E.A. dum la 22-a Kongreso en Sidnejo, Robi Robertson transdonis al mi la prezidantecon ekde la 1-a de julio.

Mi deziras, kiel unuan agon, esprimi en la nomo de A.E.A. kaj persone niajn tutkorajn dankojn pro liaj multaj jaroj de sindonema servado al nia Asocio. Spite al ĉiusecaj malfacilaĵoj li daŭrigis sian laboron ridante. Ni ŝuldas al li pli ol ni scias, pli ol ni povas kompreni. Dankon, Robi!

Mia dua vorto estas de dankemo al vi, amikoj en A.E.A. pro la fakto, ke vi fidis al mi, eĉ kvankam mi dum tiom da jaroj forlasis vin, kaj vagadis eksterlande. Mi klopodos meriti vian fidon dum la venontaj jaro kaj duono, ĝis la 23-a Kongreso.

Mi akceptis ĉi tiun komision, ĉar mi fidas al vi. Mi bone konas la talenton kaj la energion de la Federacioj, de la societoj kaj kluboj, kaj de la individuaj Esperantistoj de Aŭstralio. Ni havas bonajn Vic-Prezidantojn, Sekretariojn, Kasiston, Libro-Servon kaj komisiitojn por Korespondaj Kursoj, Korespondopetoj, kaj Ekzamenoj. Kun ilia helpo, kaj kun L.K.K. jam laboranta en Adelejo, kaj kun radiostacio jam funkcianta ni povas fari bonan progreson.

Se vi havas problemon, kiun nur A.E.A. aŭ ties Prezidanto povas solvi, skribu al mi. Se ĉio iras glate, raportu al "Australian Esperantist".


Sincere, via servanto.

RALPH HARRY.

RALPH HARRY, A.C., C.B.E.

Okaze de la naskiĝtaga festo de la Reĝino, la Aŭstralia Registaro aljuĝis al Sinjoro Ralph Harry la altan distingon "Companion of the Order of Australia" — A.C. ("Kunulo en la Ordeno de Aŭstralio").

La membroj de A.E.A. kore gratulas al sia eminenta Prezidanto.



● **PERTH:** Post sepsemajna vizito al Eŭropo, S-ino Ruth McGrath revenis kaj je nia kunveno de la 11/5 ŝi rakontis pri siaj spertoj. Ŝi vizitis la kunvenon de la Londona E-Klubo, kie ŝi

partoprenis diskutadon pri "Etimologio de la Korpopartoj", gvidata de D-ro John Wells. Ŝi vizitis dufoje le ĉef-oficejon de la Brita E-Asocio. Kiam ŝi vizitis Parizon, ŝi vizitis la ĉef-oficejon de la "Unuigo Franca por Esperanto", kie oni tre afable akceptis ŝin.

La ĉefa ero de la kunveno je 25/5 estis rakonto de Walter Illingworth pri vizito postmilita al la antaŭe sekreta subtera oficejo de S-ro Churchill.

En la hejmo de Dorothy Threlfall okazis (22/6) pikniko, malfeliĉe dum malbona vetero. La planitaj eroj devis do okazi ne en la ĝardeno, sed en la domo.

● **MELBOURNE:** Bonvena vizitanto ĉe la kunveno de 26/5 estis S-ro N. de Raaf el Alblaserdam (Nederlando). S-ro Ken Linton montris diapozitivajn kaj parolis pri vizito al San Francisko kaj Yosemite Park. "Eminentuloj en la Nov-Zelanda E-Movado" estis la temo de parolado de David Rockell (2/6). Li montris kaj priskribis verkojn de kelkaj Nov-Zelandanoj.

Je 9/6 Harry Beechey priskribis eventojn tuj post la invado de Normandio je "D-tago". Je 23/6 kaj 21/7 S-ro H. Rosengren daŭrigis sian serion da prelegoj pri "Dummilitaj aventuroj kiel militkaptito en Germanujo". La Jarmezna Konkurs-Vespero okazis 30/6. Konkursantoj rakontis pri la plej interesaj lokoj vizititaj kaj pri la plej interesaj memoraĵoj. La premion por la plej interesa loko vizitita (Canberra) gajnis Don Rogers. Premion por la plej bona parolado en Esperanto gajnis Don Pescod kaj Don Rogers, dum Isabel Gaie gajnis la premion por la plej interesa memoraĵo. (Bildlibro pri vojaĝo tra Israelo).

● **ADELAIDE:** Nia monata kunveno en la Universitato okazis je 28-a de julio. Mi raportis pri klopodoj persvadi radiostaciojn 5 UV, 5 EBI, 5 MMM kaj 5 KA disaŭdigi la Esperanto-kurson preparitan de Roger Springer, sed bedaŭrinde mi ricevis nek pozitivan nek negativan respondon.

La vesperklasioj ĉe W.E.A. ankoraŭ bone progresas. Eta problemoj ŝajnas esti, ke ne estas sufiĉe da tempo por ekzercigi la ĝelernantojn. Pro tio ni decidis fari ŝanĝon en niaj ordinaraĵoj kunveno. Ekde la venonta kunveno, ankaŭ la lernantoj estos invititaj. Tiam la unuan horon de la kunveno ni rajtas paroli ankaŭ la anglan por havi okazon instrui malfacilajn punktojn al la komencantoj. Tio donos al ili eblecon por plia ekzercado kaj praktikado de la lingvo.

Post tiu unua horo la kursanoj rajtos iri hejmen, se ili deziras, aŭ resti kaj

sekvi la kunvenon en la Lingvo Internacia. — R. FELBY.

● **CANBERRA:** Ni kunvenas ĉiunmerkredon por konversacii kaj legi. Je la unua merkredo de la monato ni okazigas specialan kunvenon, kaj invitas amikojn kaj ge-edzojn.

Je 7/5 Ralph Harry montris filmon pri Ĉinio kaj okazigis "kvizon" pri tiu lando. Ni ankaŭ elmontris librojn eldonitajn en Ĉinio. Je 4/6 la filmoj estis pri Sud-Ameriko, kaj ni ludis vortludojn.

Bonŝance, ni dufoje havis la plezuron gastigi Prof. R. Robertson kaj lian edzinon. Ni multe ĝuis ilian ĉeston.

—M. ELLYARD.

Radio Stacio 2XX, en Kanbero, akceptis la proponon disaŭdigi la 13 lecionojn kvinminutajn de la serio "Bonan Tagon". La Kanbera E-Klubo modifas la sonbendojn uzatajn de Roger Springer por Bathurst, kaj la skeĉojn de la Manlia Klubo. —RALPH HARRY

● **MANLY:** Klasoj por la 2-a trimestro en la Vesper-Lernejo komenciĝis la 27-an de majo. Dum la foresto de Marjorie Duncan, kiu vizitas la patrino en Anglujo, gvidas la komencantojn kaj la mezgradulojn, Betty Cleminson kaj Arthur Cocking. Margaret Liston prizorgas dramajn aferojn kaj vigla diskuto okazis pri la programo prezenti novan tradukon de la konata teatraĵo "Campbell of Kilmohr" fare de Geoff Meyers. La teatraĵo "Kiel kuraci fumantino" de Robbie Robertson, kiu gajnis la "Herbert Koppel" trofeon en la kadro de la 22-a Kongreso pasintan januaron, estis presita en la aprila numero de "Brita Esperantisto".

—EUNICE GRAHAM.

● **SYDNEY:** Les Scott prelegis je 19/5. Kutime Les kontribuas muzikon al programoj, sed ĉifoje li paroladis pri sia juna vivo. Tio estis sufiĉe neordinara kaj interesa. Ni ĉiuj ĝuis la programon. Wre Chandler (26/5) paroladis pri "Bunjipoj, Tigroj kaj aliaj strangaj bestoj". Li priparolis la originon de la urbo "Bunyip" en Viktorio, la "tigron" de Yackandandah, la fantomon de Wattle Flat kaj la marserpenton de Maclean. Lia lasta "bunjipo" estas vera estaĵo, la Padelŝipo "Bunyip" sur la Rivero Murray ĉe Echuca.

Je 2/6 ni aŭskultis al sonbendoj de Roger Springer, kiu celas prezenti Esperanton per la kamparaj radiostacioj. Ĉiu programo konsistas el mallonga leciono sekvata de konversacio, kiu uzas la punktojn de la leciono. Kvankam Roger mem ne povis ĉeesti, li ne rajtus plendi pri manko de intereso.

Distris nin je 9/6 la anoj de la Manlia Klubo. Ili prezentis teatraĵetojn

kaj legadon de interesaj verkoj. Dramo, originale verkita en Esperanto, la klanoj McGregor kaj Campbell estis speciale bone prezentita. Je 23/6 Frank Dunn paroladis pri la japana lingvo. La vortoj de Shirley Fanos, dankante la parolinton ehis la sentojn de ni ĉiuj: "Mi ĝojas ke mi lernas Esperanton, ne la japanan."

Revanto.

● **NEWCASTLE:** FM Radio Stacio 2 NUR komencis (5/7) disaŭdigi la sonbendojn de Roger Springer.

La Esperanto-Klubo de Newcastle fondiĝis en julio 1978 kaj ĝia prezidanto estas S-ro Derek Oubridge. Li sukcesis aperigi en la loka taggazeto "Newcastle Morning Herald" kelkajn artikolojn pri Esperanto. Unu el la plej aktivaj membroj de la klubo estas Joan Green, kiu instruas la komencantojn ĉe la Vesper-Lernejo (W.E.A.). S-ro Oubridge nun tradukas la verkon "Atlas Shrugged" de Ayn Rand en Esperanton.

● **BRISBANE:** La nuntempaj 5 klasoj kunvenas kaj studas ĉiulunde en la klubejo. Tre plaĉis al ni bonvenigi S-inon Rita Aagaard el Auckland, Nov-Zelando, kiu nuntempe ferias en Kvinslando. Ray Ross gastparolis, 14/5, ĉe la Rotaria Klubo de Sandgate.

● **IPSWICH:** Nuntempe, du grupoj studas ĉiujarde en la TAFE-Centro. Jen la nova estraro: Prez. S-ino Ruth Morrison; Vic-Prez. S-ro Alec Morrison; Sekretario: S-ino Mary Nielsen; Kasisto: S-ro Cliff Nielsen.

● **ROCKHAMPTON:** Ok membroj de la klubo kunvenas ĉiusemajne en la hejmoj de membroj. Unufoje monate la membroj veturas al Emu Park kaj kunvenas en la hejmo de Ges-roj J. Moore kun la lokaj membroj.

● **TOOWOOMBA:** La ĝenerala kunveno elektis la jenan estraron: Prez. Jean Lehane; Sekretario: Sandra Connors; Kasisto: Margaret O'Mara. S-ino Shirley Fanos el Sidnejo montris diapozitivojn pri vojaĝo tra Iran, Irako kaj Afganistano. Roger Springer estis bonvena gasto kaj li aŭdigis kasetojn kun programoj, kiujn regule disaŭdigas FM Radio-Stacio en Bathurst.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** La 24-a Konferenco de nia Federacio okazis en Ipswich la 24-25-an de majo. Bela vetero multe helpis sukcesigi la konferencon. Ĉirkaŭ 42 anoj kaj amikoj partoprenis, sed bedaŭrinde nia Prezidantino, S-ino Doris Sinclair, ne povis partopreni pro famil'aj malfacilaĵoj. Bonvenaj vizitantoj estis S-ino Rita Aagaard el Auckland, Nov-Zelando kaj S-ino Shirley

Fanos el Sidnejo. Partoprenis ankaŭ blindulino Marie Cuvet (kun gvidhundo Gemelo), kiu estas malnova membro de la Brizbana E-Societo.

Dum la ĝenerala kunveno delegitoj raportis, pri siaj kluboj. Oni raportis, ke la konferenco okazos en oktobro en St. Lucia kaj en majo 1981 en Toowoomba.

Post la kutima vespermanĝo (5 tabloj en stelformo), okazis la distra vespero, skeĉoj, paroladetoj, (tre interesa ero de Rita Aagaard pri spertoj inter hispanaj esperantistoj).

Oni decidis uzi la donacon el la Simpsons Memoriga Fonduso por instigi intereson por Esperanto inter studentoj en diversaj lernejoj, per eseo-konkurso. Samtempe, aldone por libroj kiel premioj, la Federacio mem provizos monsumon por la gajnontoj.

Dimanĉe, ni tre ĝuis paroladon pri la frua historio de Ipswich kaj poste ekskurson por viziti interesajn lokojn kaj domojn. Post rostfesta lunĉo en riverborda parko ni vizitis la historian domon "Wolston House", konstruitan ĉ 1852, kiu nuntempe estas sub la kontrolo de la Historia Konstruaja Fako.

—RAY ROSS.

● **NOVA SUD-KIMRUJO:** Dum la pasintaj monatoj, krom monataj piknikoj kaj kunvenoj de estraro, la plej grava agado estis tiu de Roger Springer. Kvankam li loĝas en Bathurst, for de aliaj esperantistoj, li laboris multe pri la preparado de sonbendoj. Li sukcesis enkonduki Esperanton en la elsendaĵoj de la FM-radio ĉe la Kolegio Mitchell. Dufoje semajne okazas kvin-minutaj programoj, unu estas leciono, la alia skeĉo.

Kun la helpo de la familio Rozsa en Orange, kaj la anoj de la Manlia Klubo

kaj Sidneja Societo, Roger preparis tre taŭgajn sonbendojn kaj ili estas haveblaj por kaj FM-radio, AM-radio, kaj kluboj aŭ individuaj anoj.

Kelkaj anoj de la Federacio estas for de Aŭstralio kaj ni nun pretigas la estontan jarkunvenon en aŭgusto.

—M.Chaldecott.

● **VIKTORIO:** Nia Federacio aranĝas 4 kunvenojn jare. La jarkunveno okazis 23/11/79 en la Melburna E-Domo. Elektigis: Prez: S-ro Don Pescod (Malvern); Vic-Prez: David Rockell (Melbourne); Sekretario: Barbara Podmore (Malvern); Kasisto: Eva Trainor (Waverley); Redaktoro: Herbert Koppel (Melbourne).

Bela vetero benis, 1/3/80, piknikon en Healesville. Membroj vizitis la faman best-rezervejon kaj dum la posttagmezo ili estis gastoj en la belega bieneto de Ges-roj Gerald kaj Ruth Tumman, novaj sed bonaj ge-esperantistoj. Entute 22 ĉeestis.

Je 10-a de majo la Federacio organizis Lud-Vesperon. Unue naŭ membroj komune vespermanĝis en ĉina restoracio kaj poste entute 20 personoj el ĉiuj 4 kluboj de Melburno kunvenis en Savarnea Halo por partopreni cerbumigajn kaj distrajn ludojn kaj konkursojn.

La ĉiujara, tuttaga Seminario okazis je 16/8 en la Kvakera Domo. S-ino Fay Koppel gvidis lingvan seminarion, okazis konversaciaj rondoj, skeĉoj prezentitaj de la Oakleigh-grupo kaj komunkantado. Vespere ges-roj Pescod prelegis kun lumbildoj pri vojaĝo tra Jugoslavio kaj la seminario finiĝis per popol-dancado. Partoprenis 20 geesperantoj.

LA ORIGINO DE ORGANIZITA SURDMUTULA EDUKO

D-ro Karl Beckmann en ORF (Radio Vieno) — Kurtonda Dissendo

En izolaj kazoj surdmutaj infanoj ĝuis jam en la 16-a kaj 17-a jarcentoj la hazardan bonŝancon, ke eksterordinare bonkora, samtempe per pedagogio kaj didaktiko inventkapable dotita viro entreprenis la malfacilegan taskon havigi al ili homan lingvon, la nepran bazon de ĉiu mensa, spirita kaj morala evoluo, por ke ili povu fariĝi homoj inter homoj.

Sed, kiel dirite, temis nur pri unuopaj infanoj aŭ tre malgrandaj grupoj, apartenantaj al aristokrataj aŭ riĉaj familioj. Kaj kvankam iuj el iliaj instruistoj publikigis plimalpli dikajn librojn pri siaj pioniraj spertoj, ili trovis apenaŭ iujn adeptojn, ĉiukaze tro mal-

multajn por evoluigo de fruktodone kreskanta tradicio aŭ por establo de edukejoj favore al pli grandaj nombroj de surdmutuloj el la ordinara popolo.

La neforgeseble meritplena filantropo, kiu en la jaro 1768 fondis, kiel unua, tian instituton por surdmutaj infanoj el kiu ajn socia tavolo, estis la katolika pastro de l'Épée en Versailles, Francio. Lia instituto, al kiu li dediĉis ne nur sian tutan instruan kaj edukan energion, sed ankaŭ sian tutan hereditan bonhavaĵon, fariĝis instigo kaj modelo — kvazaŭ la spirita prapatrino — por ĉiuj aliaj surdmutulaj edukejoj.

Post jardeko l'Épée kaj lia instituto jam estis renomaj en Francio, kvankam

ne jam sufiĉe renomaj por la propra registaro, kiu ekinteresiĝis pri ĝi nur poste—jarojn poste—sed sufiĉe por Jozefo la Dua la granda, humane reformema aŭstria imperiestro. Aŭdinte, okaze de sekreta—inkognite farita—vizito al sia fratino Marie Antoinette, la franca reĝino, pri la novspeca lernejo, li konvinkis sin pri ĝiaj sukcesoj per pluhora persona observo.

Li tuj decidis establi tian instituton ankaŭ en sia regno, Aŭstrio, por ke almenaŭ kelkaj el la grandnombro da surdmultaj infanoj povu fariĝi "utilaj", do relative feliĉaj, "membroj de la burĝa socio". Kaj senprokraste li venigis al la instituto de l'Epée du aŭstrojn, taŭgajn virojn, kies kapablon li estis ekkoninta, por ke ili studu tie, dum preskaŭ tuta jaro, la tiel bele eltrovitajn kaj elprovitajn metodojn, laŭ kiuj oni povas instrui kaj eduki la alie tiom mal feliĉajn surdmultulojn.

La du tiel saĝe elektitaj pedagogoj (iliaj nomoj estis Stork kaj May) transprenis sian novan taskon kun fervoro. Jam post malpli ol du jaroj, nome en

majo de 1779 povis esti malfermata en Vieno — je kosto de la ŝtato — la unua kaj ankoraŭ funkcianta aŭstria instituto por surdmultuloj. Ĝi estis la tria tiuspeca instituto en la mondo — kaj la unua, kiu estis ŝtata.

Certe la komenco estis modesta. La instituto ne jam havis propran domon, sed troviĝis en luita loĝejo, tutproksime al la loko, kie staras hodiaŭ la viena operejo. Tiuj malmultaj ĉambroj sufiĉis por la nur 12 surdmultaj infanoj (ses knaboj kaj ses knabinoj) kaj ties du instruistoj. Tamen la nova instituto ekprosperis admirinde.

Ekzamenoj de la lernantoj en ĉeesto de diversaj interesitoj konvinkis ne nur la imperiestron, sed ankaŭ la publikon, ke estas jen atingitaj preskaŭ sensacietaj sukcesoj. Do la imperiestro pligrandigis la inst tuton du fojojn dum la lasta jardeko de sia regado, donante al ĝi ankaŭ tre taŭgan propran domon (kiu staris vidalvide de la nuna viena ĉefpoŝt-oficejo). Tie oni nombris jam 45 edukatojn.

RECENZOJ

A Translation Course in Esperanto for Advanced Students by F. R. Banham. Editorita de Alan Towsey, eldonita de Sino Hilda Banham, 1979. viii + 176 paĝoj. Prezo: \$6.00 Aĉetebla ĉe: Alan Towsey, Market Street, Tahmoor, NSW, 2573 (Ne pre aldonu \$1.35 por afranko)

Unu el la plej elstaraj pioniroj de nia lingvo en Aŭstralio estis Frank Reginald Banham, naskita en Anglio. Laŭ la libro de Borsboom, **Vivo de Lanti**, Banham estis unu el la tre malmultaj Esperantistoj (eble la sola!), kiuj gajnis la estimon de Lanti, kiam tiu soleciganta SAT-fondinto vizitis Aŭstralion en 1938. Malgraŭ sia preskaŭ duonjarcenta redaktado de la diversnomaj organoj de AEA, Banham publikigis nenion libroforme dum sia vivo. Sed nun lia vidvino Hilda kaj la editoro (ne redaktanto!) Alan Towsey faris pietatan taskon, kolektinte 110 el la dise aperintaj tradukezerceroj de F.R.B. en unu volumon.

Post la utila anglalingva biografia enkonduko de Towsey sekvas la 110 "tradukotaj pecoj" en la originala angla, tiam la esperantaj versioj de Banham, kaj lastaloke multpaĝa indekso al la notoj, kiuj aperas post ĉiu tradukaĵo. Oni ŝuldas dankon al Hilda Banham pro tio, ke ŝi ne nur tajpis la manuskripton sed ankaŭ pagis la eldonkostojn; do la libro aperis sen ia ŝarĝo sur la limigitaj rimedoj de la movado. Pre-

seraroj tre maloftas, sed oni bedaŭras, ke la nomo de L. N. M. Newell, alia eminenta anglo-aŭstraliano, kiu antaŭis Banham kiel ĉefekzamenanto, aperas kiel "F. N. Newal" sur paĝo vi. Tipografie la verko estas tute senonama sed plaĉa kaj klare legebla.

Ĝi estas do prezentinda al la tuta progresintaro de la anglalingva mondo, sed havas aparte aŭstralian "guston", ĉar preskaŭ triono el la "tradukotaj pecoj" konsistas el eroj de la streĉe interesa rakonto de Bernard O'Reilly pri sia ekspedicio por trovi postvivintojn de aviadikraŝo el la senhoma, kruta kaj ĝangalkovrita montaro McPherson.

Ĉar neblas recenzi 110 diversajn tekstojn, mi prikomentu nur la unuajn dek, kiuj ja estas tipaj. Traduki estas alfronti serion da problemoj solvendaj, kaj Banham ne elektis facilajn ekzercerojn. Ofte li elegantis solvis la problemon, foje li prezentis version ne tute kontentigan sed tamen pensigan. Ni ekzamenu nur unu tian problemon: kiel traduki **poddy calf** — bovido, kiun oni tuj aŭ preskaŭ tuj post la naskiĝo forigas de la patrino kaj nutras alirime (ofte per senkremigita lakto). Banham proponis tri versiojn. **ne plu mamsuĉa** (sed ĝi ja suĉus, se ĝi nur atingus la mamojn!); **demamigita** (bona priskribo de **weaned calf**, sed ĝi ne klarigas, ke oni demamigas la idon apenaŭ naskitan); kaj fine Banham mem elektis **lekmanĝa**, laŭ mi la malplej taŭgan el la tri alternativoj. Sed ankaŭ mi ne trovis solvon kaj precizan kaj koncizan; ĉu iu leganto sukcesos? ,

Ĉu oni traduku tropojn pli-malpli laŭvorte aŭ simple redonu la kernan ideon? Dependas de tio, ĉu la tropo estas universale komprenebla. Banham emas iom tro "sobrigi" la poezion kvaliton: kiu iam aŭdis nokte la plendan hojladon de dingo sentos ke **dingo ĝeme blekis** estas sensuka versio de a **dingo sent his protest to high heaven**. Sed nur du liniojn poste li bele kaptis originalan poezion etoson per la **luno sin malkaŝis, priverŝante la ĝangalon per arĝenta Lr.fo. Ĉenerale** la lingvaĵo impresas kiel ĝisdata, sed verŝajne **kraŝo** ankoraŭ ne akceptiĝis en la lingvon, ĉar Banham uzis foje **frakaso** (peco 4, 1. 16), foje **akcidento** (5,8).

En tia altnivela verko estas surprize trovi erarojn kaj duindajojn, sed ankaŭ ili ne mankas. La logika prezenco devas anstataŭi **baraktis en mi ne povis sciigi, ke . . . tri viroj en tiu momento baraktis (2, 3)**. Banham insistas pri **ĉerpi en kaj malaprobos ĉerpi el** (6, noto 7). Kial la pleonasma **iom en la pluvo iom tre mildiĝis** (2, 1. 4), **Herb kaj mi iom multe diskutis** (6, 7), ŝi sentis iom

multe da maltrankvilo (9, 8)? Kian funkcion havas la **-iĝ en kreviĝintaj** (3, 5)? Kaj kion ni opiniu pri **preso por press** (gazetaro) (4, 14)?

Resume do: la libro estas rekomendinda al progresintaj tradukemuloj, kiuj estas sufiĉe maturaj por ĝin rigardi ne kiel ian definitivan version sed stimilon al propra esplorado de tereno jam trapasita de inteligenta kaj konscienca vojaĝinto.

—TREVOR STEELE.

NUN HAVEBLAJ

English Phrases & Expressions —Felix Wolfe	\$2.25
Life of Zamenhof—E. Privat 160 b	\$3.75
Plena Ilu-trita Vortaro	\$52.40
Krestomatio de la Esperanta Literaturo Vol 1-465 b, V. Benzik	\$11.10
Asteriks la Gaŭlo— korekta prezo	\$7.50
A.E.A. Libroservo, P.O. Box 230, Matrville, 2036.	

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

6. EDWIN WREFORD (RAY) CHANDLER

A man of many loves. (Get him to tell you about the birds and the bees)

So much does Ray know about the birds that he is World President of the O.R.E. — the Ornithological Rondo of Esperantists.

He first became aware of the birds and bees on the apple orchard in the Dandenong Range where he was born when this century was young. Awareness developed into interest, interest into love and love into a passion which today burns even more passionately than it did threescore and ten years ago.

Speaking of love and passion, we should mention that Ray, in 1936, married May Merrick—a fellow Esperantist—and that the ceremony was conducted in Esperanto.

A fourth love in Ray's life has (nearly) always been Esperanto. At the age of 12, he found an esperanto text book in an empty fruit case. This book he studied avidly and privately, but with the help of a Japanese Professor whose address he found in the book. Some nine years later, he contacted the Melbourne Esperanto Club and met other Esperantists for the first time. Such progress had he made that at this stage he was corresponding with 16 countries and duplicating his letters on a home-made matbed with a calico screen and flannel roller.

Thus began a most fruitful associ-

ation with the Esperanto Organisation. The account is a saga of achievement. In 1932 Ray moved to Sydney and joined the Sydney Esperanto Society. Some 10 years ago, he was elected Secretary of the Esperanto Association of N.S.W., and secured amalgamation with the Esperanto Federation. Because of his standing as a "birdman", he was, in 1974, elected World President of O.R.E. and, in that capacity, in due course chaired meetings at the Copenhagen, Iceland and Lucerne World Congresses. (The first Australian Chairman at a Universal Congress). Incidentally, he also chaired the meeting of the Veteran Esperantists Club in Reykjavik.

Currently, he is Convenor of the Cultural and Literary Committee of N.S.W.

Ray's 5th love is, and always has been, writing. In 1926 he had a short story published in a Hungarian Esperanto magazine — under the pen name of "Revanto". In 1945 he added an Esperanto supplement to the magazine of the Waterloo Public School, where he was a teacher, and inaugurated class correspondence with schools in Belgium, Brazil, Czechoslovakia, France, the Netherlands, and later, Japan. He was also one of the founders of "Grajnoj en la Vento" now officially a Cultural and

Educational Activity of U.E.A.

Ten years later he founded "Klerigo", Official Organ of the Association of Esperantist Teachers. 1970 saw the beginning of his brainchild "Telopeo" (Waratah) Official Organ of the Esperanto Federation of N.S.W., and Ray still contributes as well as helps in the editing. With Shirley Fanos, he has recently published "El Telopeo".

In 1973 Ray's thesis (in Esperanto of course) on The Mallee Fowl won for him the Simondetti Prize. Three years later he became the first double laureate of the Simondetti — this time for his work on the Fairy Penguins.

"Revanto"—as his record indicates—is no dreamer. He is a doer, too. And not just a "doer"! He is a fighter, who lovingly "sniffs the battle with delight". With Grace Barlow (now Kirkwood) he appeared before the Secondary Studies Survey and presented the case for Esperanto teaching in schools. Ray counts as his greatest triumph his fight to have Audrey Childs-Mee brought out from Holland to lead the Toowoomba Summer School.

Ray loves Art too. Thirty years ago, he organised, through Esperanto, the

first International Exhibition of Child Art in Australia. 1600 exhibits from 36 countries filled Sydney's Lower Town Hall.

What a pity, you might think, that Ray has been so steeped in Esperanto that he has not had time for anything else. With due respect, you'd be wrong. Among other things, he has been President of the Temporary Teachers Ass'n and of the Teachers' Art Society, Vice Pres. of the Correspondence School Association, and was writer and planner of the Natural Science Course for the Correspondence School. He was also Pres. Nth. Shore Branch, Psychiatric Rehabilitation Association, and of the Epileptic Welfare Association. Not bad for a man who, as a sickly child, was not expected to live!

Nowadays, Ray spends his Autumn years (in addition to attending Esperanto functions and meeting his countless duties) in listening to the buzz of the bees and recording "Bird Songs at Morn and Eventide". He assures me, seriously, that he can distinguish between the local "dialects" of magpies.

— ARTHUR COCKING.

23-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adelejo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 30-6-1981:

\$15.00; Pensiuloj, junuloj: \$10.00

Ekde 1-7-1981: \$20.00; Pensiuloj, junuloj: \$15.00.

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino **S-ino B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝejo. Se vi deziras ricevi kvitancon aldonu afrankitan koverton.

1-a Listo de Aliĝintoj:

1. Herbert Koppel, Melbourne.
2. Fay Koppel, Melbourne.
3. Ralph Harry, Canberra.
4. Herbert George Onn, Adelaide.
5. Beryl Randles, Adelaide.
6. George Clarke, Elizabeth, S.A.
7. Thea v.d. Boogaard, Adelaide.
8. Bob Felby, Adelaide.
9. Audry Felby, Adelaide.
10. Svetislav Kanački, Melbourne.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUISO

Niaj fidelaj legantoj kontribuis pluajn donacojn al tiu grava Fonduso:

Antaŭe raportita	\$773.10
Errol Chick, Melbourne	5.00
"Anonymous", Melbourne	5.00
Dr. K. Bowling, Sydney	8.00
W. R. Robinson, Melbourne	2.00
Bettie Hart, Sydney	5.00
W. Leah, Curlewis, NSW	5.00
John & Eve Matasin, Sydney	50.00
S-ino F. Mackintosh, Melbourne	5.00
N. Butkunas, Melbourne	10.00
Ken G. Linton, Melbourne	5.00
Brisbane Esperanto Society	50.00
"Anonymous" Mulgrave, Vic.	5.00
S. Kanački, Melbourne	2.00
R. Felby, Adelaide	5.00
V. Kosef, Cobar, NSW	10.00
H. Rosengren, Melbourne	5.00
I. Slavoff, Melbourne	10.00
"Revanto", Sydney	10.00
Ruth McGrath, Perth	5.00
Aian Towsey, Tahmoor, NSW	5.00
Dr. Ross Robbins, Mildura, Vic.	10.00
	<hr/>
	\$990.10

Kiu kompletigos la sumon al **\$1000 ??**

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 181 (261)

MELBOURNE

Septembro, 1980

NELASTAJ VORTOJ PRI LA SUPERSIGNOJ

BERNARD GOLDEN

Dum la pasinta jaro plurfoje aperis en Esperantaj periodaĵoj jena anonceto:

"LA OPTIMALE MODERNIGA
Esperanto-ortografio ebligas tajpi
nian lingvon sur ĉiuj latinliteraj
skribmaŝinoj, kompostmaŝinoj kaj
komputeroj tm! Inf. OEO, 24 av.
Reidisheim, F-68100 Mulhouse,
Francio."

La inicialoj OEO signifas "Optimala
Esperanto-Ortografio" kaj ĉe la indikita
adreso loĝas Albert Leinhardt, emerita
fervoja inĝeniero, delegito kaj fakdelegito
de UEA /lingva kontrolo de manu-
skriptoj/. Li estas la aŭtoro de unu el
la plej novebakitaj reformproponoj por
"plibonigi" Esperanton.

Pri kio temas Optimala Esperanto-
Ortografio? En siaj propagandaj s-ro
Leinhardt ĝistede elbuŝigas la malnovan
rekantaĵon pri la malutilo de la super-
signitaj literoj en la Esperanta alfabeto,
argumentante, ke se ili ne ekzistus, tiam
pli da homoj volonte lernus la lingvon
kaj sekve, oni vastskale uzus ĝin, eldonus
pli da verkoj en ĝi kaj, finfine, eĉ
oficialigus ĝin.

Se oni ekzamenas profunde kaj objek-
tive la demandon pri supersignoj en
Esperanto, oni povas lerni interesan
lecionon. Ekde la apero de la zamen-
hofa lingvo, leviĝis protestoj kontraŭ
tiuj liter-distingiloj. Ortografiaj reform-
projektoj venis kaj iris kiel la vento,
kaj neniu el ili havis eĉ la plej mal-
grandan efikon sur la klasikan Esperan-
ton. La argumentoj kontraŭ la uzo de
diakritaj signoj en Esperanto estas tute

senbazaj kaj rezultas el manko de seri-
oza pripensado. Ekzemple, mi legis
leteron al la redakcio de itala ĵurnalo,
en kiu la skribinto opiniis Esperanton
netaŭga por moderna uzo, ĉar ne estas
eble telegrafi tekstojn kun supersignit-
aj literoj. Sensencaĵo! Pluraj eŭropaj
lingvoj havas literojn kun kromsignoj,
sed la telegrafistoj facile povas elturniĝi
helpe de digramoj. Same kiel en la ger-
mana lingvo "ae" kaj "oe" anstataŭas
la literojn "a" kaj "o" kun dupunkta
supersigno, simila solvo en Esperanto
estis elpensita kaj pritraktita jam dum
la unuaj Universalaj Kongresoj: oni
uzas "h" anstataŭ la cirkumflekso. Kiel
ofte okazas, obstakloj troviĝas nur en la
cerboj de etmensuloj ne en la realo.

Eble la plej science bazita kritiko de
la uzo de supersignoj estis tiu de d-ro
E. Javal, samprofesiulo de Zamenhof:
Li metis sin en la avanton de la pro-
batalantoj, kiuj celis elimini la tegmen-
titajn literojn, ĉar laŭ lia teorio, tiaj
literoj okazigas plian streĉiĝon de la
leg-organoj. Eĉ tiu klarigo ne estis
sufiĉe konvinka, ĉar kvankam Zamenhof
legis la verkon de sia kolego, "Fiziologio
de la legado kaj skribado", tamen li ne
akceptis la rekomendojn de la okulisto
pri ortografiaj reformoj en Esperanto.
Kaj la aŭtoro de Esperanto rifuzis
ankaŭ la allogan morgananton de 250
000 frankoj proponitan de Javal kaj lia
peranto, la belga majoro Charles Le-
maire, kondiĉe, ke reformoj estu en-
kondukitaj en Esperanton.

En la 92-jara historio de Esperanto,

ĉiuj proponoj por reformoj, sen iu ajn escepto, fiaskis, dank'al la komuna saĝeco de la esperantistaro, kiu ne permesis, ke lingvaj plibonigoj tuŝaĉu ilian lingvon. Laŭ mia scio, estas nur unu solvo, kiun la reformemuloj ankoraŭ ne elpensis: la forigo de ĉiuj literoj de la Esperanta alfabeto, por ke restu nur la supersignoj! Ankaŭ la reformsistemo ellaborita de s-ro Lienhardt estas destinita trafi en la abismon de forgeso, ju pli frue, des pli bone.

Erara estas lia aserto, ke la ĉapelitaj literoj faras Esperantlingvan presadon kaj eldonadon malpraktika kaj malkonoma. Sur miaj librobretoj staras malnovaj verkoj en Esperanto kun la kolofonoj de prestiĝaj neesperantistaj eldonejoj: Hachette / Parizo /, Stead's Publishing House kaj Thomas Nelson and Sons / Londono /, Fleming H. Revell / Nov-Jorko /. Hodiaŭ novaj eldonejoj pluportas la torĉon kaj publikigas librojn en Esperanto: The English Universities Press kaj University Tutorial Press / Londono /, Presse Universitaires de France kaj Assimil / Parizo /, Corvina / Budapeŝto / E. P. Dutton / Nov-Jorko /. Lastatempe aliĝis Oxford University Press / Oksfordo /. Tiuj gravaj mondkonataj firmaoj ne elspesas monon por akiri supersignitajn literotipojn cele al la idealisma subteno de Esperanto. Ili estas konkurencaj komercaj entreprenoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto nur, ĉar ekzistas ebleco ricevi profiton per la eldonado de Esperantaj publikigaĵoj. Kaj pro la sama kristalklara kialo ili ne eldonas librojn en Ido, Occidental, Interlingua aŭ iu ajn alia planlingvo jam kuŝanta en la rubkorbo aŭ survoje tien. Plue, kiam presejoj kaj fabrikoj de tajpiloj kaj kompostmaŝinoj trovas, ke ekzistas merkato por aparatoj havantaj la Esperantan alfabeton, ili senhezite provizas la klavarojn de siaj maŝinoj per la bezonataj literoj. Ankaŭ venos la tempo, kiam organizaĵoj kaj oficialaj instancoj, enretiĝintaj en la nuntempa lingva kaoso, devos konstati, ke la dungado de armeo da interpretistoj kaj tradukistoj, kaj la perdo de tempo pro lingvaj malfacilaĵoj estas pli multekostaj ol la adopto de la Internacia Lingvo, eĉ se komence estiĝas relative grandaj elspezoj por lingvoinstruado kaj modifoj de preseja ekipaĵo. Ĉiu nova inventaĵo kaj procedo havas similan historion.

Pro la multnombraj publikigaĵoj kaj artikoloj, kiujn s-ro Lienhardt eldonis kaj dissendis dum la pasinta duonjarko, estas evidente, ke li havas materiajn rimedojn por subteni sian kampanjon, sed ĉis kiu limo? Jam montriĝis per la malfavoraj recenzoj, kiujn ricevis OEO

en la Esperanta gazetaro, ke ĝi estas kondamnita al malsukceso kaj neniam ŝancelos la Fundamenton. Povas esti, ke Lienhardt allogos kelkajn malkontentulojn, kiuj ĉiam ekzistas en Esperantujo, sed neniam okazos amasa akcepto de OEO. Ĉu ni, do, kun rideto kaj mansvingo malokupiĝu pri tiu reformprojekto? Ne! Tute male, estas necese energie kontraŭiagi.

Se estontece okazos oficiala pritrakto de la internacilingva demando por eventuale elekti la internacian lingvon, la aŭdigo de eĉ unu febla sed misharmonia voĉo inter la esperantistoj, proponanta reformojn, sufiĉos por estigi dubojn pri la taŭgeco de Esperanto. Estas nekredible, ke post naŭ jardekoj da mortnaskintaj reformprojektoj, ankoraŭ troviĝas homoj, kies horizonto estas tiel malvasta, ke ili ne komprenas, aŭ ne volas kompreni, ke la fina, oficiala decido pri alprenado de internacia lingvo ne baziĝos sur ties ortografiaj trajtoj, sed dependos de sociopolitikaj faktoroj.

Post la naskiĝo de Esperanto, aperis pluraj "plibonigitaj" kaj pli perfektaj" planlingvaj skemoj, sed nek la publiko nek oficialaj instancoj montris pli da interesiĝo pri ili, kaj tute mankis deziro subteni tiujn novajn internaciajn lingvojn. Eĉ ne unu el ili atingis la nivelon de Esperanto dum komparebla periodo de ekzisto. La kialo de la daŭra ignoro de tiuj lingvoj — kaj estas necese emfazi, ke ili ne havas supersignitajn literojn — estas la rifuzo fare de decidpovaj potencoj en la mondo akcepti internacian lingvon, kiu devigos ilin fordoni la privilegian pozicion de politika, ekonomia kaj kultura supereco, kiun ili havas, ĉar iliaj naciaj lingvoj estas uzataj en internaciaj rilatoj. Kiu konas la historion de la klopodoj prezenti Esperanton al la Ligo de Nacioj dum la 1920-aj jaroj, memoros, ke la afero fiaskis, ne pro iaj difektoj en Esperanto mem — ne sonis eĉ unu pepaĵo pri supersignoj — sed pro la akra kontraŭstaro de france-parolantaj lingvaj ŝovinistoj. Hodiaŭ similaj sociopolitikaj sintenoj malantaŭ la kulisoj en UNO kaj UNESKO silentigas ĉiujn proponojn solvi la Babel-problemon per internacia lingvo.

Necesas atentigi la publikon pri ankoraŭ unu misinformo en la propagando de Lienhardt. La naturalisma planlingvo konata kiel Interlingua /IALA/, sen supersignitaj literoj, estas tre malforta rivalo kontraŭ Esperanto nuntempe. Ĝi nek kreskas, nek akiras pli da adeptoj en intelektulaj rondoj, sed tute kontraŭe jam de jaroj vegetas kaj baldaŭ formalaperos. Estas malfacile kompreni, kial Lienhardt kaj aliaj

esperantistoj lasas sin trompi per la troiĝa propagando de la adeptoj de Interlingua.

Laŭ la titolo de tiu ĉi artikolo, ĝi

ne enhavas la plej lastajn vortojn pri la supersigna demando. Post OEO certe venos ankoraŭ pli novaj /aŭ malnovaj/ proponoj, kiujn la prudenta esperantista popolo daŭre ignoras.

NEKROLOGOJ

IVAN THEODORE MADDERN (1906-1980)

Iama Prezidanto de A.E.A. (1966-1967), kaj plurfoje Vic-Prezidanto, vigla batalanto por edukaj reformoj, kiel ankaŭ por la enkonduko de Esperanto, en la lernejojn, **IVAN MADDERN**, post kormalsaniĝo, mortis la 28-an de julio en hospitalo de Morwell, en kiu urbo li deĵoris plurajn jarojn kiel Estro de Gimnazio, kaj plu vivis post emeritiĝo.

Li naskiĝis la 22-an de decembro, 1906, ĉe Jung, proksime al Horsham, en la okcidenta regiono de Viktorio, kaj tie li ankaŭ komencis sian edukadon, kiun li daŭrigis ĉe la Gimnazio de Horsham kaj poste ĉe la Kolegio "Wesley" kaj la Universitato de Melburno. En 1926, kiel studenta instruisto li komencis ankaŭ sian profesion laboron por la Edukada Departemento. Fininte la trejnadon kun Honoraj Diplomoj (Bakalario pri la Artoj, kaj Edukado), li instruis ĉe la gimnazioj de Horsham, Wangaratta, Wodonga kaj Moe, ĝis, en 1960, li promociiĝis al Lernejestro de la Gimnazio de Morwell. Tie li servis ĝis emeritiĝo en 1971, kvankam eĉ poste li daŭre laboris kiel portempa instruisto en Moe ĝis 1976.

Dume, ankoraŭ en Horsham, en 1929, li konatiĝis kun F-ino Elsie Jones, al kiu li ekziĝis en 1936. La "mielmonata" vizito transmare inkludis por ambaŭ intensan kurson pri la franca lingvo, ĉe la Universitato Sorbonne.

Kiel Leŭtenanto de la Aerĉefo, li aktive militservis en Singaporo kaj Port Moresby, kaj poste kiel Eduka Oficiro ĉe Moratai. Kvankam li unue informiĝis pri Esperanto de kolegiانو ĉe "Wesley", estis nur kiam li deĵoris en la Aerarmeo, ke li hazarde ekvidis en butikaj vitrono libron pri Esperanto, kiun li aĉetis kaj trastudis antaŭ ol kontaktiĝi kun la Melburna Esperanto-Societo. Lian interesiĝon plifortigis lia sperto rilate la instruadon de la franca lingvo.

Krom la Edukado kaj Esperanto, alia ĉeftemo de intereso por li estis la Historio, pri kiu li gajnis premion ĉe "Wesley", kaj pri kiu li poste verkis diversflanke — komisiite, Historion pri la "Komonumo de Morwell", kaj pro-

prakoste, en la angla lingvo kiel propagandilon, "The Story of Esperanto" — dum pri la Eduka Sistemo li estis tre kritikema kaj verkis plurajn libretojn reformcelajn.

Kiel lernejestro li povis pli facile enkonduki en la lernejan programon edukajn reformojn — kiaj 4-taga semajno kaj forigo de ekzamenoj — kiel ankaŭ la instruadon de Esperanto, kaj ĉi-rilate, por pligrandigi la studentan interesiĝon per praktika uzado li iniciatis la "Internacian Rondleteron", kun partopreno de pluraj lernejoj alilandaj.

Li fondis la "Sendependan Universitaton de Aŭstralio", kiu pruviĝis tre populara kaj utila, sed malfeliĉe aliaj universitatoj kontraŭis tion kaj devis lin ŝanĝi la nomon al "Sendependa Universala Akademio". Malgraŭ tio, kelkaj liaj ideoj estis adoptitaj de Registrar kaj aliaj terciaraj institucioj.

En 1977 li aniĝis al la organizo "Legion of Frontiersmen", de kiu li ricevis ties plej altan honorigon, la "Aŭstralian Merit-Medalon", pro longa kaj eminenta servo al edukado.

Ŝajne homo de nelacigebla energio, li dediĉis ankaŭ multe da tempo kaj mono al la realigo de ideoj kaj idealoj kaj al propagando pere de la ĝenerala gazetaro kaj precipe de la periodaĵo. "Latrobe Valley Esperantist". Lia morto estis ankoraŭ unu kripliga bato por la Movado en Aŭstralio.

Funebra Di-Servo en la anglikana preĝejo de Morwell, 31/7, antaŭis duan ceremonion ĉe la kremaciejo 'Springvale', kiun ĉeestis i.a. 9 Melburnaj esperantistoj.

Al liaj edzino, Elsie, kaj tri filinoj Marion, Dorothy (S-ino Howes) kaj Philippa, la Aŭstralia Esperanto-Asocio esprimas plej sinceran kondolencon.

—FAY KOPPEL.

JOHANO MATASIN (1899-1980)

Nia malnova amiko kaj samideano **Johano MATASIN** mortis la 2-an de aŭgusto, 1980 post mallonga malsano kaj estis kremaciita ĉe Lane Cove Kremaciejo la 5-an de aŭgusto.

Li naskiĝis la 2-an de junio, 1899 en Ruŝkovac apud Zagreb (Jugoslavio), kaj eklernis Esperanton tie en 1908. Li unuo

ĉeestis Universalan Kongreson en Vieno, 1924. Li vizitis Leipzig (Germanujo) kaj en la loka Esperanto-Societo li renkontis F-inon Eva Marx kun kiu li fianĉigis en februaro 1928.

Li enmigris Aŭstralion en oktobro 1928 kaj edziĝis kun Eva en julio 1929. Dum la tutmonda depresio ili devis lukti kontraŭ la tiutempaj malfacilaĵoj, sed Johano starigis sukcesan entreprenon por fabriki meblojn, kaj per senĉesa laboro atingis sufiĉe komfortan vivmanieron.

Li ĉiam estis aktiva kaj agema en la Esperanto-movado, kiel ano de U.E.A. kaj S.A.T. Li partoprenis la Universalajn Kongresojn en Mainz 1958, Tokio 1965, Budapeŝto 1966 kaj Hamburgo 1974. Li estis prezidanto de la Sidneja E-Societo multfoje kaj dum multaj jaroj, kaj U.E.A. delegito en Sidnejo. Li kaj Eva konstante gastigis kaj aŭstraliajn kaj eksterlandajn samideanojn, kredeble la plej eminentaj estis Lanti kaj Lapenna, ĉe la bela hejmo apud la havenaj vidindajoj.

Kun kelkaj esperantistoj Johano fondis la "Esperanto-Kooperativon de N.S.K." por havigi al la movado Esperantan Domon en Sidnejo; dum 20 jaroj li prizorgis la entreprenon, deorante kiel Direktoro de la E-Federacio de N.S.K.

Ĉiuj kunlaborantoj trovis lin ĉiam helpema, afabla kaj agema. Kiel naturamanto, li preferis tre simplan dieton, kaj restis elstare sana kaj fortika preskaŭ ĝis la fino de la vivo. Li grimpis ŝtupetaron por ripari la tegmenton de la hejmo, jam 80 jaraĝa, kaj ĉi-jare li entreprenis longan vojaĝon por ĉeesti la Teatraĵojn en Oberammergau, kaj viziti parencojn en Eŭropo, sed baldaŭ post la reveno li suferis atakon de apopleksio.

La funebran ceremonion ĉeestis preskaŭ 100 personoj, inter ili proksimume 30 ge-esperantistoj, kiuj esprimis sincerajn elkorajn kondolecojn al la edzino Eva kaj la familio. Nia movado kaj ni persone perdis karan kunlaboranton.

—R. G. Robertson (Prez. Manly Esperanto-Klubo)

S-ino Brone SILVA, kiu estis membro de la Oakleigh E-Grupo en Melbourne, mortis 11-an de julio, 1980, pro aŭtomobil-akcidento, dum ŝi feris en Kvinslando. Ŝi naskiĝis en Litovio en 1914 kaj enmigris Aŭstralion en 1949. Ŝi esperantiĝis pro instigo de la frato Peter Varkauskas, kiu estas ankoraŭ aktiva esperantisto kaj UEA-delegito en Kaunas, Litovio.

LA 65-A UNIVERSALA KONGRESO

okazis inter la 2-a kaj 9-a de agosto en Stockholm (Svedujo). 1807 esperantistoj el 51 landoj aliĝis. La kongreso okazis en "Folkets Hus (Popola Domo).

La Alta Protektanto de la kongreso estis S-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento, kaj li salutis la kongreson en bona kaj flua Esperanto, kvankam li antaŭe informis D-ron Tonkin ke li estas nur "silenta Esperantisto".

El la 10 aliĝintaj aŭstralianoj nur 7 ĉeestis: S-ino B. Hart, S-ro J. Hawks, S-ro J. Paroz, Ges-roj Peddie kaj Ges-roj Scott.

Ĉeestis la inaŭguron 22 reprezentantoj de Registaroj, el kiuj 13 salutis (kvar en Esperanto). D-ro J. C. Wells, docento pri fonetiko de la Londona Universitato, parolis pri la kongresa temo "Diskriminacio". Longan saluton al la kongreso sendis la fama aŭtoro Thor Heyerdahl.

Plej grava tasko, kiu alfrontis la estraron de U.E.A., estis la novelekto de la Estraro. Sola kandidato por la posteno de Prezidanto estis Gregoire Maertens (Belgujo); li ankaŭ respondecos pri Financoj kaj Administrado. Vicprezidanto: Baldur Ragnarsson (Is-

lando), kaj Kulturo; Vicprezidanto: Renato Corsetti (Italujo) kaj Landa kaj Regiona Agado; Ĝenerala Sekretario: D-rino Flora Szabo-Felso (Hungarujo) kaj Planado; S-ino Ursula Grattapaglia (Brazilo); Informado kaj Delegita Reto; S-ino Eliza Kehlet (Belgujo); Kongresoj kaj Virina Agado; D-ro Humphrey Tonkin (Usono); Esploro, Edukado kaj Eksteraj Rilatoj; Petrov Todorov (Bulgario); Faka Agado. Retiriĝis el la Estraro: W. Auld, W. Bormann, A. Peeyn kaj D-ro C. Stop-Bowitz.

Estas ja bone konate ke la 1981-a kongreso okazos en Brazilia kaj la 1982-a tre verŝajne en Antverpeno. Neniu definitiva kandi dato ekzistas por 1983, sed por 1984 estas 2 kandidatoj: Tel Aviv kaj Vancouver, kaj por 1985 eble Aŭgsburg.

Vendredon (8/8) la urbestro invitis 1000 kongresanojn al la festsalono de la urbdomo; ili estis lukse regalitaj per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

La prelegoj de la **Somera Universitato** estis kiel kutime de la plej alta nivelo. Baldur Ragnarsson prelegis pri "La proza poemo kaj ĝia apliko en la Esperanta literaturo". D-ro Werner Bormann ilustris per klaraj statistikaĵoj s'an temon "Di kriminacio pro hejmlando". Bojka

Giorgieva Batalaska, diplomitino de la Sofia Universitato, brile pritraktis la temon "La Proteinoj de la Maizo". Ye Junjan, profesoro de la Universitato Nanjing, analizis "La Karakteron de la Moderna Cina Literaturo". "Abundoj kaj Malabundoj de Fokoj" estis la temo de zoologia prelego de Wim M. A. De Smet. D-ro C. Stop — Bowitz, doktoro pri naturscienco prelegis pri "Koralrifoj tropikaj kaj arktaj". Richard E. Wood, kun lumbidoj, prezentis la neord naran temon de "Lingvopolitiko sur poŝtmarkoj de la mondo." D-ro Humphrey Tonkin en sia prelego "Juĝo kaj antaŭjuĝo en Otelio de Shakespeare" donis kelkajn indikojn pri la situo de la teatraĵo inter la aliaj verkoj de Shakespeare alireblaj en Esperanto.

La **Solena Fermo** okazis matene de la 9-a de aŭgusto. La nova Prezidanto Gregoire Maertens prezentis al la kongresanoj la novan Estraron kaj speciale dankis la ĝisnunan prezidanton, D-ro H. Tonkin, pro ties multfaceta kaj saĝa gvidado de UEA. Vicprezidanto B. Ragnarsson anoncis la rezulton de la Belartaj Konkursoj, i. a. la en Aŭstralio konata Nov-Zelanda esperantisto Stefan McGill gajnis la unuan premion en la teatra fako. Certere, Stefan ĵus fariĝis la administranto de la UEA-oficejo en Rotterdam. Dum la kongreso la Cina Esperanto-Ligo estis akceptita kiel nova membro de UEA.

—**Les Scott** (kun aldonaj informoj ricevataj de la redaktoro)

LA 53-A S.A.T.-KONGRESO

okazis de la 19-a ĝis la 25-a de julio en Rijeka, la plej granda jugoslava havenurbo. Ĉe tiu 383 kongresanoj (Francio 136, Jugoslavio 97, Nederlando 38, Germanio okcidenta 22, Aŭstrio 16, Svedio 16, Italio 12, Belgio 11, Britio 9, Hispanio 8, Hungario 6, Svislando 4, po 2 el Ĉeĥoslovakio, Danio, Grekujo kaj po 1 el Kanado kaj Germanio orienta). Krome ĉeestis pliaj cent esperantistoj, kiuj venis el apuda Italio kaj lokoj proksimaj al Rijeka, kiuj eluzis sabaton kaj dimanĉon, kiam oni ne laboras, por partopreni diversajn kongres-aranĝojn.

La kongreso staris sub la protekto de la Kroata Unuiĝo de Sindikatoj, kies agenta prezidanto, S-ro Milorad Viskić, malfermis la kongreson. En la nomo de la konsilantaro de Rijeka salutis Ankica Bugarski.

La vetero dum la kongreso estis tre varmega kaj la kunsidoj de la Laboristaj E-Asocioj estis longaj kaj tre lacigaj. Oni tro longe parolis pri ne tro gravaj aferoj kaj ne venis al bona rezultato.

La plej granda kunsido estis tiu de la Naturamikoj (TANEF), ĉe kiu K-do F. Poppeck (Germanio) tre bone kaj interese referatis. TANEF nun havas membrojn en 15 landoj.

Unu el la centraj temoj, prezentitaj de la gastigantoj, estis la evoluo de "jugoslava memmastrado", pri kiu parolis Ivan Maruŝić. Pri la temo "Klasoj kaj nacioj en jugoslavia praktiko" prelegis D-ro Peter Zlatnar. Prelegis ankaŭ la itala verkistino Lina Gabrielli pri "Tolstoj".

Okazis ekskursoj al la fama groto Postojna kaj al la Plitvicaj lagoj kaj akvofaloj. Ekzistas 16 lagoj kaj multaj diversfortaj akvofaloj. La arbaro estis belege verda, la akvo tiel pura, ke ni kelkfoje vidis en ĝi fiŝojn. La tempo, por ĉion ĝue admiri estis tro mallonga kaj 3 horoj en tiu paradiza beleco rapide pasis.

Kiel kutime ĉe S.A.T.-kongresoj oni longe diskutis pri rezolucio, kiu fine estis akceptita dum la ferma labor-kunsido. En ĝi oni i.a. konstatis ke la ekzistantajn konfliktojn en la mondo akompanas la kultura imperiismo de la evoluintaj landoj. La lingva diskriminacio instigas la Kongreson proponi la uzadon de Esperanto kiel demokratian alternativon al la lingva politiko en la nuna mondo. Kaj la kongreso emfazas la neceson dediĉi pli grandan atenton al la SAT-junularo kaj Esperanto-junularo ĝenerale, ĉar ili estas la bazo por la estonto de la laborista Esperanto-movado.

Oni decidis ke la venontjara kongreso okazu en la svisa urbo Basel.

—**J. Kraus, Vieno**, kun aldonaj informoj de Mehmed Jakupović prezidanto de O.K.K.)

LA 2-A PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

La 2-a Pacifika E-Kongreso okazis inter la 26-a kaj 29-a de julio en Vankuvero, Brita Kolumbio, Kanado. La Esperanto-grupo de Vankuvero estas tre malgranda kaj la pezaj preparlaboroj falis sur la ŝultroj de la kongressekretario Marie Zacherl, kiu lernis Esperanton antaŭ nur 5 jaroj. Ŝi naskiĝis en Ĉeĥoslovakio kaj enmigris Kanadon antaŭ nur 10 jaroj.

Aliĝis al la kongreso 180 partoprenantoj el 12 landoj, el kiuj fakte partoprenis 153. (89 el Usono, 38 el Kanado, 8 el Koreo, po 3 el Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Ĉinio, po 2 el Anglujo, Svislando kaj Germanujo, po 1 el Hungarujo, Italio kaj Meksikio). El Aŭstralio partoprenis Ges-roj T. Einihovici (Perth) kaj John Paroz (Brisbane).

La kongreso okazis en la belega Universitato de Vankuvero, kies ejoj estis perfektaj. La loĝado estis tre luksa kaj malmultekosta. La naturo kaj la vidaĵoj estis fabele belaj kaj ĉiu parolis fluan kaj perfektan Esperanton.

La kongreson malfermis S-ro Wally Du Temple, prezidanto de la Kanada E-Asocio, kune kun S-ro Bill Harmon, prezidanto de la E-Ligo de Norda Ameriko. S-ro Du Temple legis mesaĝon de S-ro Herbert Koppel, organizinto de la 1-a Pacifika Kongreso, kiu ne povis persone partopreni la kongreson.

Okazis tri prelegoj dum la kongreso: Prelegon de S-ro Ralph Harry (Aŭstralio) oni disaŭdigis per kaseto. La temo "La ekonomio rilate al Esperanto en la Pacifika Regiono" vekis vigan intereson kaj debaton, ĉar ne ĉiuj pensis ke Esperanto povas solvi ekonomiajn problemojn. La duan prelegon faris S-ro Bruce Sherwood (Usono) kaj ĝi rilatis al la nova komputera sintezilo por instruado de Esperanto. La preleginto estas tre kompetenta fakulo kaj li uzis perfekte fluan kaj erudician Esperanton. La debato daŭris du horojn. La trian prelegon preparis S-ro Zhu Mingyi (Ĉinio), kaj temis pri la vivo kaj verko de D-ro Norman Bethune.

Ĉiujespere okazis distra programo. "Varia Spektaklo" okazis je dimanĉo (27/7) kaj konsistis el japanaj, indianaj kaj aliaj dancoj, kantoj en Esperanto, skeĉoj kaj pupteatro. La lastan vesperon okazis en la "Faculty Club", unu el la plej bonaj restoracioj, Bankedo kaj Maskobalo. Ni havis vastan selekton de muziko por diversaj danĉemuloj.

Dum la kongreso okazis kelkaj ekskursoj al diversaj vidindaĵoj lokoj en la urbo. Pluraj kongresanoj partoprenis sestagan postkongresan ekskurson al la "Roka Montaro". Bedaŭrinde la aŭtobuso paneis. Tamen post iom da tempo ĉiu ridis kaj trovis multe da tempo por interparoli. La sento de amikeco estis neforgesebla.

—**Tim Einihovici** (kun aldonaj informoj de Marie Zacherl)

La kongreso ne povis decidi pri la loko de la 3-a Pacifika Kongreso en 1984. Oni sugestis, ke ĝi okazu en Honolulo, Havajo, vere pacifika loko, sed tiu ideo ne estas tro realisma, ĉar tie ekzistas nur 2 aŭ 3 esperantistoj, ne sufiĉa nombro por organizi grandan kongreson.

SAME KIEL EN AŬSTRALIO

"Ĉiuj societoj deziras junajn dinamikan homojn por sia estraro, sed ĝuste tiuj samaj personoj estas tiel plene engaĝitaj en sia profesio (aŭ eble en siaj profesiaj fakunuigoj), ke ne restas al ili tempo por kromokupoj. Tial oni fine

ĉie kontentiĝas, se oni almenaŭ trovas pensiulojn por ŝtopi la truojn. Multaj societoj en nia lando ne plu povus ekzisti, se ili ne havus la helpon de siaj pliaĝaj membroj."

(D-ro Arthur Baur, la nove elektita prezidanto de la Svisa E-Societo)

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

En la 22-a Aŭstralia Esperanto Kongreso la Asocio bonvenigis la proponon de la Laŭncestona Klubo doni al A.E.A. \$1,500 por starigi daŭran fonduson por Esperanto-Stipendio, kondiĉe ke A.E.A. aldonu \$3,000 por starigi komencan fonduson de \$4,500.

La Asocio decidis lanĉi kampanjon por kolekti \$3,000 tiucele, kaj via Prezidanto en la nomo de la Estraro nun invitas ĉiujn Esperantistojn en Aŭstralio, kiuj deziras certigi la progreson de nia movado donaci malavare al la Fonduso "Stipendio".

La fonduso estos sub la administrado de la Estraro kaj la eventuala intereza enspezo estos je la dispono de la Estraro por provizi stipendiojn al junuloj, kiuj jam lernis Esperanton, kiuj serioze intencas perfektigi sian scipovon, kaj kiujn la Estraro taksas estontaj gvidantoj en la junulara movado kaj poste en la Asocio.

Ekzemple, la Estraro povus per la dispebla enspezo de la Fonduso helpi junulojn, partopreni en kursoj, seminarioj kaj kunvenoj en aliaj ŝtatoj aŭ eĉ (se la Fonduso sufiĉe kreskas) eksterlande.

Kiel iniciato, instigo kaj "defio" mi tuj donacas \$100, kaj mi promesas, ke, kiam la Fonduso estos atinginta \$900, mi donos alian \$100, kaj tiel plu, ĝis la Fonduso atingos \$3,000.

Kiu sekvos?

RALPH HARRY,

(Prezidanto)

Oni sendu donacojn al la Kasisto, S-ino I. Fallu, 10 Sumersett Ave., Oakleigh South, Vic., 3167.



● **BRISBANE:** Post reklamado en lokaj gazetoj, 16 komencantoj nun studas, sub la gvidado de Trevor Steele. Entute 6 klasoj diversnivele studas ĉiulunde. La 2-an de aŭgusto ni starigis budon ĉe la mezlernejo Yeronga, fakte ni partoprenis Internacian Feston, kie ni kon-

taktis la publikon kaj disdonis foliojn al interesatoj. La 6-an de aŭgusto Trevor Steel kaj Ray Ross ĉeestis generalan kunvenon de U.N.-Asocio en Brisbane; nia societo aliĝis al U.N.A. antaŭ kelkaj semajnoj Du el niaj anoj estas eksterlande: John Paroz vizitis la Pacifikan Kongreson kaj poste la Universalan en Stokholmo. Annie Spencer ĉeestis la ILEI-Konferencon en Malto kaj poste la Universalan Kongreson en Svedujo. Ŝi ankaŭ partoprenis tri-semajnan kurson ĉe Kastelo Gresillon.

—Ray Ross.

● **SYDNEY:** Je 21/7 Tom Elliott parolis pri la bona laboro de "Amnestio Internacia" kaj semajnon poste niaj gestudentoj prezentis mallongajn skizojn laŭ diversaj temoj. Ĉe nia kunveno de la 4-a de aŭgusto ni malĝoje eksciis ke nia bonkora Johano Matasin mortis 2 tagojn antaŭe, kaj ĉiuj ĉeestantoj observis minuton da silento. Ni diskutis liajn laborojn por nia movado. Walter Gassner legis el sia verkaĵo, kiu klarigis vortojn en artikolo de Mi Ji-Sheng, mongola esperantisto, kiuj estas "etimologiaj ĉemeloj". Walter klarigis la vortojn aŭ esperante, aŭ angle, laŭ la plej taŭga metodo. Je 11/8M. Chaldecott gvidis la grupon en kelkaj vortuludoj. Ni diskutis ankaŭ la teatraĵeton "Cindrulino". —M. Chaldecott.

● **MANLY:** La surbendigo de du-lingvaj skeĉoj por la radio sukcesplene daŭras sub la gvidado de Roger Springer kun la helpo de Volo Gueltling, Margaret Liston, Helen Stone kaj aliaj anoj de nia klubo.

"Angus & Robertson" eldonis en julio la libron "A Star to Steer Her By", verkitan de nia kuraĝa maristino Ann Gash. Prof. Robbie Robertson nun komencas ĝin traduki Esperanten, Intertempe, ni rekomendas la angle verkitan eldonon al tiuj kiuj emas legi aventuro-plenan historion rakontitan en vigla stilo.

Ses el niaj membroj instruas kursojn en la Vespera Lernejo kaj en 4 Lernejoj por "Kvindek plus"—jaruloj.

—Marjorie Duncan.

● **MELBOURNE:** S-ro Henry Rosengren daŭrigis (21/7 kaj 18/8) sian serion da prelegoj pri aventuroj kiel militkapito en Germanujo. Je 28/7 S-ro Errol Chick montris diapozitivojn pri sia antaŭnelonga vizito al Ĉinio.

Harry Beechey estis la parolanto je 4/8, kiam li prelegis pri "Iridologio" laŭ la libro de S-ino Hall. Semajnon poste,

S-ro Marshall Cohen prelegis pri "Kio okazas en Irano?" — historia skizo laŭ Bibliaj rakontoj.

Ĉe la aŭgusta amuzvespero (25/8) Ken Linton montris diapozitivojn kaj prelegis pri vizito en Pasadena kaj 'Disney-land'.

● **HOBART:** Dank' al la iniciativo de S-roj Eino Loooris kaj Kam Lee, Esperanto-grupo nun kunvenas en la t.n. "Migrant Resource Centre", ĉiun duan jaŭdon vespere. S-ro Loooris invitis fotografiston de la taggazeto "The Mercury" al unu el la kunvenoj kaj je sabato, 30/8, aperis fotografaĵo kune kun mallonga raporto pri la nova grupo.

La loka radiostacio de A.B.C. intervjuis S-ron Strohbach je 4-a de septembro pri la nuna situacio de Esperanto kaj oni poste disaŭdigis la intervjuon je la 4-a kaj 5-a de septembro.

● **ADELAIDE:** Ni kunvenis en la Universitato je 18/8. Ĉar finiĝis la vesperkurso de W.E.A., ni invitis la lernantojn al nia kunveno dediĉis la unuan horon de la vespero al ili. Ni donis al ili la eblecon praktiki la lernitan kaj la eksperimento estis tiel sukcesa, ke ni decidis daŭrigi laŭ tiu sistemo.

S-ro George Clarke montrigis tre kapabla instruisto, sed ankaŭ liaj lernantoj estas ege lernemaj. — R. Felby.

SUKCESIS PRI AŬSTRALIA NORMA ELEMENTA EKZAMENO F-ino Eva Trainor, Melbourne

BONA INFORMO 20% DA RABATO.

La 1981a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝis. Ekde 15-9-1980 ĝis 31-1-1981 estas Ĝia periodo kaj farante abonon aŭ reabonon al la gazeto oni povas profiti 20% rabato el jena tarifo.

Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi de la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN ĉinstilajn rekompencaĵojn.

A B O N T A R I F O

Por 12 numeroj (1-jaro) \$5.70 — 20% = \$4.56

Por 24 numeroj (2-jaroj) \$9.60 — 20% = \$7.68.

Por 36 numeroj (3-jaroj) \$14.40 — 20% = \$11.52.

Abonu ĉe S-ro K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, 3163.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

7. RALPH L. HARRY, AC, CBE, LL.B. B.A. (Oxford)

"A spirit of excelling was found in him!"

Ralph Harry was President of A.E.A. in 1960-61 and recently took over as President for 1980-81.

His grandfather, Frederick Holder, was a Methodist lay preacher who became Premier of South Australia and, after Federation, first Speaker of the Commonwealth Parliament. Lady Holder was World President of the W.C.T.U.

His mother taught him to be a Christian reformer and his father, a teacher of Latin and English in Geelong (where Ralph was born in 1917) gave him an interest in language and its precise use.

In 1923, the family moved to Launceston where Ralph learned Latin, French and English literature at the Church Grammar School. He heard Esperanto lessons by radio — which kindled a spark of interest — but his interest burst into flame when — at the University of Hobart — he met Cedric Cowling and became a practising Esperantist.

Whilst earning his living as a clerk in the Defence Department, Ralph studied law, played football, swam and ran, and edited the University Newspaper. When, on the basis of his sporting and scholastic record, he applied for Rhodes Scholarship, he told the selectors that his ambition was to write about international law in the international language. They awarded him the scholarship and he went to Lincoln College, Oxford. (Have you ever felt that you could detect an Oxford accent in his speech? I haven't!).

Though war was threatening, he attended a Church Youth Conference in Amsterdam and was doing some study in the Hague when war broke out. Before returning to England, he sat in the empty World Court and swore he would devote his life to international law.

In 1940, having achieved honours in jurisprudence at Oxford, he was selected for the young Australian Department of External Affairs. After training in Canberra and a year in the army, he was posted to Ottawa, then to Washington, D.C., and then to the new mission to the U.N. in New York — a posting dear to his heart.

The U.N. building was the last word in modernity. Electronic devices abound,

self-opening doors, push-button devices everywhere. If you wanted to know anything, you pressed a button and the information appeared. If you wanted an instant translation of a speech, you pressed the appropriate button and you heard it in the language of your choice. Such convenience, such sophistication! Alas, one day there was a power failure, all was confusion — chaotic, compounded confusion, said Ralph: "I can tell you how to eliminate so many of your problems. Eliminate the need for translations by using Esperanto!"

From then on, he promoted, even harder, the cause of Esperanto for International organisations and, to demonstrate the practicality of our language, he translated the Declaration of Human Rights. Back in Canberra he helped found the Canberra Esperanto Club and almost immediately translated the U.N. Charter.

In 1950 he met French Esperantists and was invited to the Sorbonne University where he lectured about Australia, using a film which he persuaded the Government to issue with an Esperanto commentary.

As Consul-General in Switzerland (1953-56), he met leaders like Edmond Privat and Ivo Lapenna, and attended the Universal Congress in Haarlem. He arranged with I.L.O., W.H.O. and I.C.E.M. in Geneva to use Esperanto for their publicity, and taught at the International School.

In 1956-57 in Singapore he got the city to issue an Esperanto information sheet and taught a class of Singaporean Chinese, Australians and Englishmen. In this period he translated Saint-Exupéry's "Le Petit Prince".

From 1958-60 in Melbourne, Ralph worked for the Zamenhof Centenary. R. G. Casey and Mark Oliphant were secured as patrons. Esperanto was accepted as a subject for examination in Tasmania. Ralph was now President of A.E.A.

In the next issue we shall follow our President's 17 years as Ambassador for Australia and Esperanto.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$3



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

N-ro 182 (262)

MELBOURNE

Okt.-Nov., 1980

GRESILLON — ESPERANTO-LERNEJO: LAŬ LA VIDPUNKTO DE UNU KURSGVIDANTO

Ekde ĝia inaŭguro en 1952 kiel Kultura Esperanto-Domo, Kastelo 'Grésillon', Francio, estas la plej ŝatata feriloko de tiuj esperantistoj, kiuj konatiĝas kun ĝi. El la kvin kontinentoj ili venas por kune ĝui, dum kelkaj semajnoj, la vivon de Esperanto-familio; kaj ĉiujare, de la komenco de julio ĝis la mezo de septembro, 'Grésillon' bonvenigas sian internacian gastaron. La varia programo aranĝita por ili estas dividita en tri periodojn. Ĉiu periodo daŭras tri semajnoj kaj havas sian apartan karakteron. Ĉi tie mi traktas la kernon de la dua periodo — la periodo de la kursoj. Reklamante pri la allogoj de la Kultura Esperanto-Domo, oni kutimas substreki la belecon de la kampara medio, la ĉef-familiecon de la etoso kaj la internacian esperantistecon de la partoprenantaro. Nur parenteze, kvazaŭ interkampe, oni mencias la kursojn. Tamen la eblecoj eklerni aŭ plulerni la lingvon internacian, sin pretigi por ekzamenoj kaj ilin trapasi, eĉ sin pretigi al gvidado de Esperanto-kursoj, estas signifa parto de la greziona vivo, precipe en la dua periodo.

Mi ĵus venis al la fino de mia tria de'oro kiel kursgvidanto dum la dua periodo de Grésillon, kaj la spertoj fariĝas pli kaj pli ĝuaj, ĉiu jaro montriĝanta eĉ pli ĝua ol la antaŭa. Tamen, Grésillon estas ne la plej facila 'de'or-ejo' por kursgvidantoj! Tiom da alloga'oj (naĝado, fiŝkaptado, promenado, ekskursado, . . .) prezentas sin por

forlogi la lernantojn for de la lerno-ĉambroj ke la kursgvidantoj spertas la neceson daŭre adapti ne nur la kurs-programon, sed ankaŭ siajn sintenon, ideojn, prioritatojn rilate la instruadon, al la iom ne certa, de tago al tago ŝanĝiĝema, situacio. Cetere, ankaŭ la vesperaj distraĵoj, komenciĝantaj je, proksimume, la 21-a horo, tiel forte allogas ĉiujn, inkluzive de la infanoj, ke longe antaŭ la fino de la periodo, kursanoj dormemas eĉ matene!

En la ĵus finita periodo okazis ĉiutage kvar kursoj: unu por infanoj, unu por komencantoj pli-aĝaj (ekde la 10-a jaraĝo), unu por progresantoj kaj unu por franclingvanoj pretigantaj sin al trapaso de la ekzameno, 'Atesto pri kapableco', de la Franca Esperanto-Instituto. Krome, por tiuj progresintoj, kiuj ne celis tiun ekzamenon, okazis studrondo altnivela sub la gvidado de Aleksandro Mollison, (Skotlando). La altgrada kurso por franclingvanoj estis ne tute en Esperanto, ĉar oni tie pritraktis i.a. tradukadon en kaj el la nacia lingvo. Ĉiuj aliaj, de la porinfanoj-kursoj ĝis inkluzive de la studrondo, okazis ekskluzive en Esperanto — kompreneble: unue pro tio, ke lingvon oni plej efike lernas uzante ĝin, kaj due pro tio, ke la diverslingveco de la kursanaroj (almenaŭ ok lingvoj reprezentigis ĉijare) necesigas instruadon per la internacia lingvo.

La porinfanoj- kaj porkomencantoj-

kursojn mi gvidis laŭ mia apliko de la rekta metodo. La porprogresantoj-kurson gvidis Robert Lloancy (Francio), kaj la altgradan porfrancilingvanoj-kurson gvidis, por la 24a kaj, bedaŭrinde, lasta fojo, André Ribot (Francio).

Tre baldaŭ en la periodo montriĝis, ke okazigo de rektmetoda kurso de nivelo inter tiu por komencantoj kaj tiu por progresantoj estus tre utila, eĉ konsilinda. Ekzamenoj starigitaj je la fino de la periodo konfirmis per siaj rezultoj, ke ŝtopo de tiu breĉo multe helpus al pluraj seriozaj studentoj de la lingvo. Tia kurso estus kaj paroliga kurso por tiuj, kiuj studis la lingvon ĝis sufiĉe bona nivelo de lingvoscio, sed ne kuragaj paroli, kaj korektiga kaj progresiga kurso por tiuj, kiuj jam ne plu estas komencantoj, sed tamen ne havas sufiĉajn lingvoscion kaj parolkapablon por sekvi la sufiĉe streĉan kurson je la dua grado.

Verŝajne la organizantoj pretus proponi tian kurson, se sufiĉe frue aliĝus kontentige granda nombro de staĝanoj.* Unu problemo por la organizantoj estas, ke homoj emas prokrasti aliĝpeton ĝis la plej lasta momento. Tio kaŭzas ne nur organizajn problemojn ĉe la respondeculoj-volontuloj, sed tro ofte elreviĝon ĉe la malfruantoj, kiuj ne povas ricevi lokon ĉe la Kultura Domo, ĉar la dua periodo okazas je aparte alloga libertempa periodo. Por certigi, ke oni ricevu lokon estas konsilinde enpoŝtigi aliĝpeton tuj je la komenco de la jaro en kiu oni celas partopreni la grezilionan vivon — aŭ pli frue! Por plene profiti de la kursoj proponitaj ĉiujare, kaj ne malhelpi al aliaj same profiti, estas konsilinde partopreni tutan tri-semajnan periodon. Se tio ne eblas, oni tamen prefere partoprenu ekde la komenco kaj regule ĝis la tago de foriro!

Multaj studentoj ŝatas ricevi, je la fino de kurso, montreblan pruvon de sia progreso; kelkaj studentoj bezonas atestilon pri kapableco por profesiaj kialoj. Ĉe Grésillon oni povas tiucele trapasi aŭ la ekzamenojn okazigatajn sub la regado de la Franca Esperanto-Instituto, aŭ la internaciajn ekzamenojn de la Kultura Esperanto-Domo mem. Ankaŭ ĉi tiuj lastaj estas de impone alta nivelo! Tute internacilingva la unua, elementa, po tulas de la ekzamenatoj kompetentecon je skribado laŭ diktado; kapablon ne nur skribe montri komprenon de skribita teksto sed ankaŭ mem verki simplan, ĉirkaŭ unu-paĝan, tekston; bonan komprenon de la parolata lingvo kaj kapablon konversacii pri ĉiutagaj aferoj kun spertaj Esperantist-

oj. La dua ekzameno, same tute internacilingva, postulas kapablon resumi malfacilan tekston, montri per ampleksaj respondoj al demandoj, komprenon de la esenco de la resumita teksto, verki bonstilan tekston pri faka temo (ekz. recenzo de libro), kaj bonstile kaj flue konversacii. La sukcesintoj ricevas la diplomojn de la Kultura Domo dum neformala, gaja kaj amika ceremonio, okazigata komence de vespera kuniĝo fine de la periodo.

Grésillon estas, se ne unika tamen tre diversfaceta Esperanto-centro: familia feriado, tendumejo, turista centro, lingvo-studejo, . . . Ĉijare, por la unua fojo, ĉi fariĝis ankaŭ seminarioj por kursgvidantoj dezirantaj ekspluati la metodon, kiun mi uzas, per la materialo, kiun mi verkis. Organizis kaj gvidis la seminarion mia edzo kaj mi. Atestiloj pri kapableco instrui laŭ la metodo kaj materialo estis ceremonie prezentitaj al tiuj, kiuj demonstraĉis siajn komprenon de la metodo kaj kapablon efike uzi la instrumentaron. Inter tiuj sukcesintoj estis Shirley Gradussov, lingvo-instruistino de Perth, Okcidenta Aŭstralio. Ĉiujare plidivestigas la renomo de la multifaceta vivo ĉe Grésillon. La sekvaj versoj, ĉerpitaj el la "kanto de la Esperanto-Domo", trafte esprimas la dum-someran kunvivadon ĉe la Kastelo, kie deĵorantoj kaj staĝanoj kune ferias en etoso de vere internacia amikeco.

Kune studas, babiladas,
Guas, ridas, revas ni,
Tie ni diverslingvanoj,
Sentas nin ĉe famili'!

—Audrey C. E. Childs-Mee, Rotterdam

* staĝo: periodo dum kiu oni ĉeestas novan instruan kurson aŭ ricevas trejnadon al nova ofico.
staĝi: fari staĝon (P.I.V.)

SAME KIEL EN AŬSTRALIO . . .

"Sin sentigis dum la lastpasintaj du jardekoj, kiel ĉie en la okcidenta mondo, ankaŭ en Aŭstrio la negativa influo de la kreskanta bonstato kaj televida amasmanio. Perdigis antaŭ ĉio la idealismo de la gejunuloj. Sukcese propagandi inter ili fariĝis pli kaj pli malfacile. Ankaŭ la aŭstra samdeanaro plej-grandparte maljuniĝis pro tio en sia ĝenerala aspekto. Formortis konsiderinde pli multaj ol novaliĝis.

(D-ro Karl Beckmann en "Super-rigardo pri Aŭstrio", eldonita de la E-redakcio de Radio Vieno).

14-a INTERNACIA KONFERENCO DE INT. LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

24-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto, 1980
Cottonera, Malto.

Post trihora flugado mi atingis la insulon Malto. Veninte de norda lando, kie pluvus kaj ventas, mia unua impresio estis, ke mi trovis paradizon: malavara suno kaj amikaj vortoj bonvenigis min. Mi estis senrezerve akceptita en amika rondo. Jen la fenomeno de Esperanto.

La konferenco okazis en la Kolegio "De la Salle" en Cottonera. La Kolegio ĝuas la reputacion esti unu el la plej bonaj lernejoj de Malto, kie pli ol 1700 studentoj el ĉirkaŭ 30 nacioj kune studas kaj laboras. La nomo "Cottonera" devenas de la nomo de unu el la ĉefkavaliroj de Malto: Cottoner. En la Malta Respubliko oni parolas la maltan lingvon, kies bazo estas semida kun multaj italaj kaj anglaj vortoj.

Ĉiuj konferencanoj loĝis kaj manĝis en la Kolegio. Tiu fakto evitis perdon de tempo kaj favorigis pli intensan laboren. Estis 62 partoprenantoj el 9 landoj (Aŭstralio, Belgio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Malto, Nederlando). Por Aŭstralio salutis S-ino A. Spencer (Brisbane), ankaŭ ĉeestis S-ino Gradusov el Perth. Por Belgio salutis la subskribintino.

La Solena Inaŭguro okazis en la grandioza konstruaĵo "La Mediteranea Centro por Konferencoj", kiu havas sidlokojn por 220 personoj. Pro malsano, S-ro D-ro Buttigieg, prezidento de la Malta Respubliko, ne ĉeestis, sed Lia Moŝto D-ro J. J. Cremona, la Ĉefjuĝisto, alparolis la konferencanojn. Prezentigis aro da interesaj prelegoj:

Eseo pri la pratemploj en Malto", fare de Carmel Mallia, kiu ankaŭ prelegis pri "Inspirado laŭ kelkaj francaj poetoj".

"Edukado kaj Lingvo; Problemoj kaj Solvoj", fare de D-ro Prof. Mario Dazzini, kiu ankaŭ prelegis pri "Instruado de Esperanto en la lernejoj de la mondo".

"La arto de la egoismo", fare de A. Spencer, Brisbane.

Prelego kaj 4 lecionoj pri "Nova Skribo". helpo al analfabetoj (S-ro Mirko Marcella).

Okazis tre bela "Malta vespero". "La mondo ridas", estis la titolo de alia distra vespero, dum kiu konferencanoj mem rakontis spritaĵojn. La konferenco

finiĝis per Adiaŭa vespero kaj Balo.

Okazis ankaŭ 2 duontagaj ekskursoj per aŭtobusoj. Unu iris al "La Hipogeo" unu el la plej belaj pratemploj de Malto. La alia ekskurso iris al Mdina, la malnova ĉefurbo de Malto kaj al Valetta, la nova ĉefurbo.

La 15-a konferenco okazos verŝajne en Budapeŝt de la 17-a ĝis 24-a julio, 1981.

Elfriede Ernst, Bruselo.

AŬSTRALIA = KRONIKO

● **PERTH:** En oktobro multaj klubanoj revenis hejmen. S-ino Franconi kaj S-ro Hawks, kiuj partoprenis la Universalan Kongreson en Stokholmo, S-ro Illingworth vizitis Hong Kongon, Ges-roj Einihovici, kiuj ĉeestis la Pacifikan Kongreson. S-ino Shirley Gradusov, lingvoinstruistino, vizitis Anglion, kie ŝi pasigis kelkajn tagojn en la hejmo de D-rino Marjorie Boulton; ŝi vizitis ankaŭ la ILEI-konferencon en Malto kaj studis en Gresillon, kie ŝi sukcesis gajni diplomojn. Nuntempe ŝi estas la sola instruistino, kiu rajtas instrui Esperanton en ŝtataj lernejoj. La "Board of Secondary Education" akceptis la instruoplanon de Esperanto, kiun S-ino Gradusov pretigis por lernejoj.

Ĉiuj revenantoj raportis pri siaj vojaĝoj dum klubaj kunvenoj. Dum agrabla pikniko ĉe la alloga hejmo de David Miller, D-ro Einihovici montris interesajn lumbildojn pri la Pacifika kongreso. Revenis ankaŭ Ges-roj C Dean, kiuj raportis pri sia vojaĝo alilanden kaj al Londono, kie ili prelegis en la Esperanto-Klubo. — T. Einihovici.

● **ADELAIDE:** Ni kunvenis en la Universitato je 22-a de septembro. Kiel kutime, ni kune studis dum la unua horo kaj la reston de la vespero ni amuziĝis konversaciante. Dimanĉe, 28/9, ni renkontiĝis en la ĝardeno de Ges-roj Goodfellow, kie ni ĝuis la belan veteron kaj bonan manĝaĵon kune kun Jim kaj Jenny Dimo el Rochester, Viktorio S-ro Dimo tre lerte klarigis multajn dubindajn punktojn pri la vortkonstruo de Esperanto. — R. Felby.

● **MELBOURNE:** Je 1-a kaj 8-a septembro S-ro H. Koppel raportis pri la Pacifika kongreso en Vancouver kaj la

S.A.T.-Kongreso en Rijeka. Je 15/9 S-ro K. Linton prezentis sonbendon pri intervjuo de li pri Esperanto ĉe Radio Aŭstralio. Errol Chick, 22/9, parolis kaj montris lumbildojn pri vizito al Shanghai.

28 esperantistoj de ĉiuj 4 Melburnaj grupoj partoprenis, 29/9, la "Amerikan Teon" en la Esperanto-Domo. La enŝpezo por la vespero estis \$76.86. Semajnon poste, Henry Rosengren parolis pri "La Stalag Arhipelago" (aventuroj kiel militkaptito en Germanujo).

● **SYDNEY:** David Gould (18/8) gvidis diskuton pri "necesoj kaj sufiĉo", ĉu oni traduku laŭ vortoj aŭ laŭ ideoj. S-ro W. Chandler (1/9) parolis pri la "Birdoj de l' Inferno" Bettie Hart (15/9) montris diapazitivajn pri sia ferio en Eŭropo, antaŭ kaj post la Stokholma Kongreso. Kvankam multe pluvigis ŝi sukcesis fari belajn fotojn.

Diskutvespero okazis je 22/9 pri la temo ĉu "Dommastrinoj rajtas ricevi salajrojn", gvidata de S-ino M. Chaldecott. J. Harwood citis vortojn el la Biblio, kiuj diras ke "edzino devas submeti sin al sia edzo." Kontraŭe M. Chaldecott citis frazon el la edziĝceremonio, ke edzo juras doti sian edzinon per siaj tutaj propraĵoj.

Bonvena gasto ĉe nia kunveno de la 13-a de okt. estis F-ino S. van Wijngaarden, kiu laboras en la UEA-oficejo en Rotterdam. Ŝi montris belajn lumbildojn pri sia interesa hejmlando.

Sept. 16-18 estis tagoj de "Carnivale 80 Languages Galore", librofesto ĉe la Urbodomo. La Federacio kaj Societo luis spacon kaj sub granda verda flago montrigis diversaj libroj, diskoj kaj flugfolioj. Inter la vizitantoj estis esperantistoj kiuj ĝis nun ne kontaktis kun nia movado en Sidnejo. Ankaŭ venis la kutimaj mokantoj. —M. Chaldecott

● **MANLY:** Neordinara okazintaĵo pasintmonate estis la vizito de Sija van Wijngaarden, kies ĉeesto vigligis niajn kursojn kaj societajn vesperojn. Spaco mankas por mencii ĉiujn membrojn, kiuj gastigis nian bonvenan samideaninon el Nederlando. Ekde ŝia unua tago en nia regiono, niaj anoj akompanis ŝin por naĝi, ekskursi kaj aŭte viziti la vidindaĵojn laŭ la marbordo, en la Blua Montaro, kaj en la urbo mem, kun speciala vizito al opera prezentado. Je ŝia honoro okazis 3 kunvenoj. Je 2/10 Bonveniga Vespero en la hejmo de Edna Giles por ĝui lumbildojn pri Postkongreso en Skandinavio, trafe priskribitajn de nia amiko Les;

14/10 vizito de Sija al niaj 3 kursoj en la Vespera Lernejo por persone renkonti kaj alparoli niajn lernantojn. Nome de la Klubo, nia Prezidanto Prof. R. G. Robertson prezentis al Sija ilustritan libron pri la aŭstralia kamparo. Je la fino de tiu adiaŭa vespero Sija petis, ke ni kantu nian himnon "Antaŭen Aŭstrali".

Dua elstara okazintaĵo estis la forvelado (13/10) de nia maristino Ann Gash en la eta jahto "Ilimo II" por transnavigi sola la Pacifikan Oceanon al San Francisko. Se vi volas saluti ŝin okaze de Kristnasko kaj la Nova Jaro, bv. skribu al Ann Gash, "Ilimo II", c/o Port Captain, Honolulu, Hawai (ĝis fino de decembro). —Marjorie Duncan.

● **BRISBANE:** 17-18-an de Oktobro ni starigis budon ĉe Universitato Griffith, je la okazo de festo pri "Vizio de la Estonteco". Ĉirkaŭ 130 grupoj partoprenis tre interesan feston. Ni alparolis kelkcent interesatoj pri Esperanto kaj disdonis pli ol 300 informfoliojn. Instruistino de la angla lingvo, kiu ĵus revenis de Ĉinio post dujara instruposteno tie, informis nin pri la diversaj Esperanto-libroj haveblaj eĉ en vilaĝoj en Ĉinio. La 21-an de okt. Trevor Steele ĉeestis bonvenigan vesperon ĉe la Kultura Centro de Artoj Je 30/10 Ray Ross ĉeestis la jarkunvenon de Kultura Asocio de Griffiths. Sybil Martin gastigis F-inon S. van Wijngaarden dum ŝia vizito al Brizbano. F-ino Wijngaarden montris interesajn lumbildojn kaj parolis pri Nederlando (20/10).

—Ray Ross.

● **TOOWOOMBA:** Ges-roj R. Ross kune kun F-ino van Wijngaarden (Nederlando) venis el Brisbane kaj alportis premiojn gajnitaĵojn de lokaj knabinoj okaze de esea konkurso kvinslanda.

Ĉe ŝtata lernejo Gabbinbar, Fiona Miller ricevis premion, kaj ĉe lernejo Holy Name, Michelle van Branscot kaj Melissa Dawe ricevis premiojn. La koncernaj lernejoj ankaŭ ricevis librojn por siaj bibliotekoj. La toowoombaj televido kaj gazeto fotis kaj raportis. La lernejestroj esprimis dancon al S-ro S. Williams, kiu instruas Esperanton al tiuj klasoj.

Societanoj ege ĉu's (15/10) la viziton de Ges-roj Bossong el Nederlando kaj S-ro W. Chandler. La nederlandaj vidaĵoj estis belaj, kaj ges-roj Bossong lerte klarigis pri ĉiuj —Jean Lehane.

LA 3-a SOMERA LERNEJO

pri Esperanto alproksimiĝas. Januaro 1981 estos eble la pruvo, kiu konvinkos la ankoraŭ dubemajn, Someraj lernejoj estas tre ŝatataj kaj tre sukcesaj en multaj landoj. En Aŭstralio ne estas alia 10-taga intensa studado de Esperanto. Krome, en Aŭstralio ne estas alia Esperanto-okazaĵo organizita de ekstermovada instanco. Ni montru ke la Esperantistoj ŝatas tiun eksterordinaran situacion, profitante el la oportuno partopreni en vera Esperantio.

Mi vizitis la lokon, "Downlands Colledge", en kiu ni loĝos kaj studos. Antaŭ la plaĉaj brikaĵ konstruaĵoj estas areo, kiun oni povas nomi preskaŭa arbaro. Inter la konstruaĵoj estas beleta korto, pavimita de la lernejanaj mem per brikoj. La naĝejon oni nun plilongigas; certe ĝi estos en tre bona ordo en januaro.

For 5 minutojn per aŭto estas la urbcentro, sed je 5-minuta distanco post vigla piedirado al la alia direkto estas butko, kaj orienten, tute proksime estas malgranda "butikcentro".

Skribu al: **The Director, Summer School, P.O. Box 100, Toowoomba, 4350** por aliĝilo, sed skribu en la angla, mi petas, ĉar la organizantoj ne estas esperantistoj

Do venu al la 3- Somera Lernejo pri Esperanto, 12-24-a de Januaro, 1981 por komencantoj, postkomencantoj, progresantoj kaj literaturamantoj.

—Jean Lehane.

EL LA FEDERACIO

● **N.S.K.:** La iarkunveno de la Federacio okazis je 2-a de aŭgusto. La ĉeestantoj observis minuton da silento je la memoro de Johano Matasin (kunfondinto de la Esperanto-domo), kiu mortis frue en la sama tago.

Elektiĝis la jena estraro: Prezidanto: S-ino S. Fanos; Vic-Prez: S-ino T. Thomas; Kasisto/Sekretario: S-ro J. Harwood; Posedaĵoj: S-ino B. Hart Aliaj estraranoj: S-ino B. Cleminson, S-ino E. Matasin, S-ro W. Gassner.

La prezidanto prezentis siajn persojn pri la diversaj devoj de la estraro kaj de la individuaj funkciuloj. La nuntempa propagando rilatas al la sonbendoj haveblaj al la FoMo-Radio, kaj pri la venonta Somera Lernejo en Toowoomba. Per la du aferoj ni celas la loĝantarojn eksterurbajn kaj kamparajn.

—Margaret Chaldecott.

● **KVINSLANDO:** La 2-a EFK-Konferenco en 1980 okazis la 11-12-an de oktobro: la "St. Lucia"-anoj gastigis la remajnfinojn. Ĉiuj tutkore konsentis pri la elstara sukceso. S-ro W. Chandler

kaj Ges-roj Bossong (ORE-anoj el Nederlando) estis bonvenaj gastoj. La Federacio tre dankas al Edna Jullie kaj Sybil Martin, kiuj gastigis la vizitantojn en Brizbano.

La Ĝenerala Kunveno okazis sabate. En 1981 la oktobra konferenco okazos en Brizbano kaj koincidos kun la malfermo de la Kvinlanda E-Muzeo. La Federacio donacos libroŝrankon por konservi la muzeo-erojn. La eseo-konkurso mezgrade sukcesis: 15 eseoj estis ricevataj kaj la premioj estis aljuĝitaj al tri junaj lernantoj el Toowoomba.

S-ro W. Chandler prezidis la elektadon de la nova estraro: Jen la rezulto: Prez: Doris Sinclair; Vic-Prez: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Bev. Allatt; Kasisto: Wanda Stadham; Publikaj Rilatoj: Cliff Bailey; Redaktoro: Ray Ross.

Sabatespere 46 anoj partoprenis vespermanĝon kaj distran vesperon. D'manĉe, frumatene pluvis, sed 25 anoj ĉeestis "Sherwood Forest"-Parko. Tamen, la ORE-anoj trovis multajn birdojn, kaj en arboj kaj sur la lageto.

Ni tre dankas al St. Lucia pro la sukcesplena konferenco.

— Ray Ross.

23 a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

2-9 Jan., 1982 — Adelaide, S.A.

La kongreso okazos en la "Lincoln College", tre bele situita kolegio en Norda Adelejo, ne tro malproksima de la urbcentro. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio kaj la kosto por la ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$20 tage.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 20-6-1981: \$15.00; Pensiuloj, junuloj: \$10.00
Ekde 1-7-1981 \$20.00; Pensiuloj, junuloj. \$15.00.

Sendu vian kongres-kotizon al la kasistino **S-ino B. Randles, 35 Roslind Street, Kensington Gardens, S.A. 5068.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon por loĝejo. Se vi deziras ricevi kvitancon aldonu frankitan koverton.

2-a Listo de Aliĝintoj:

- 11 Betty Sykes, Adelaide
12. Dr. Kevin Smith, Manly
13. Kaethe Schwerin, Sydney
- 14 Joyce Turner, Rockhampton
- 15 Herta Mueller, Sydney.

Laŝtata distribuo: Suda Aŭstralio 7, Viktorio 3, N.S.K. 3, Kvinlando 1, A.C.T. 1.

LA "A.E. SUBTEN-FONDUSO

Antaŭe raportita	\$990.10
Cakleigh Esperanto-Grupo	10.00
D. McQueen, Warragul, Vik	5.00
Herta Koppel, Melbourne (memore al Heinz Koppel, edzo)	10.00
Jill Koppel, Benalla, Vik (memore al Heinz Koppel, patro)	5.00
D P. Mason, Mansfield, Vik.	10.00
Marjorie Duncan (Manly)	5.00
	<hr/>
	\$1035.10

FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Ralph Harry (Canberra)	\$100
D ro T. Einihovici (Perth)	100
Alice Longson (Perth)	19
Ges-roj R. Bossong (Nederlando)	200
W. Greenhalgh (Brisbane)	20
James Mazza (Perth)	100
David C. Miller (Perth)	10
Ges-roj H. Koppel (Melbourne)	20
	<hr/>
	\$569

ERAROJ EN LA NOVA ADRESARO

(Paĝo 31): Nia Prezidanto estas Ralph Harry. Ni kunvenas merkrede. La adreso de la sekretariino estas 69 Wybalena Grove, Cook 2614.

(S-ro W. Amies mortis antaŭ jaroj)

—M. Ellyard (Canberra)

(Paĝo 12) S-ro F. R. Banham mortis la 30-an de aŭgusto, 1974. Dum la pasintaj 6 jaroj la redaktoro de "A.E." estis S-ro Herbert Koppel.

(Paĝo 3): Ellasita Honoriga Komisiono: S-ro Voio Gueltling (9/45 Alt Street, Ashfield, 2131); V. Timmins (Sydney), R. Ross (Brisbane).

(Paĝo 32): Manly E.-Klubo: Sekretario estas S-ino Betty Cleminson, Kasisto: M Ross.

(Paĝo 36): Launceston E-Grupo: Prezidanto: S-ino Kay MacFarlane, Sekretario: S-ino Pat Le Fevre; Kasisto Edith Kerr; Libroperanto: S-ro Mac Le Fevre.

English teacher, wishing to practise Esperanto with people from other countries, offers FREE double room with cooking facilities, for a period of time between 1 to 8 weeks. Full privacy guaranteed. A brief record of career would be much appreciated. Ben Parkinson, Pasaĝe Lenanto 6, 4, 3B, Parque Figueros, CORDOBA, Spain.

Gramatike-

Ĉu la pseŭdosufikso "aci" estas evitinda?

Sajnas, ke la pseŭdosufikso "aci" estas evitinda, kaj ke estas konsilinde, ke ni ŝanĝu la vortojn, en kiuj ĝi okazas, per anstataŭigo de alia pli taŭga kaj pli preciza, vere esperanta sufikso, kies signifo estas senduba. Plej ofte ĝi estas anstataŭigebla per la sufikso "ad", okaze per "aj", kaj malofte per aliaj sufiksoj. Tio ne aplikigas, kompreneble, al vortoj, kiaj "situacio" kaj "reznacio", kiuj havas malmultan rilaton kun "situado" kaj "reznado".

Nia Akademio de Esperanto difinas la signifojn de vortoj, kiujn ĝi oficiale aprobas kaj akceptas, kiel necesajn, kaj konformajn al la naturo kaj establita uzado de la lingvo; aliflanke, vortaroj, kaj precipe Plena Ilustrita Vortaro, difinas la signifojn de vortoj, kiujn esperantistoj kutimas uzi, ĉu ili estas oficialaj aŭ ne.

En la Universala Vortaro en 1893 listiĝis la verbo "administri", kiu estas bonega ekzemplo de pure esperanta vorto, ĉar ni povas derivi el ĝi aliajn esperantaj vortojn per vere esperantaj sufiksoj laŭ pure esperanta sistemo, vortojn, kiaj "administrado", "administrado", "administrado", "administrado", kaj "administrado". P.I.V. listas la jam uzatan vorton "administracio" kun la signifo de "administrado", aŭ "administrado", do kun dubinda signifo, kun la rezulto, ke estas konsilinde eviti tian vorton, kaj uzi radikon "administri" kun taŭga sufikso, kiu havas fiksitajn signifojn. Ni konservu tiun trajton de Esperanto, per kiu ĝi superas la etnajn lingvojn, kaj ne imitu iliajn difektojn.

Aliaj vortoj en ĉi tiu kategorio estas "deklari" (1909), "dekori" (1967), "delogi" (1909), "federi" (1967), "elimini" (1922), "ilumini" (1922), "konversi" (1967), "organizi" (1909), kaj "reznigi" (1921). P.I.V. listas la verbojn "demonstri", "diserti", "konfederi", "kulmini", "navigi", kaj "spekuli", el kiuj ni derivas la vortojn "demonstrado", "demonstrado", "konfederado", "konfederado", "kulminado", "kulminado", "navigado", "spekulado", kaj "spekulado", ĉiuj kiuj havas fiksitajn precizajn signifojn. Vere preferindaj estus vortoj, kiaj "abnegado", "aliterado", "apelado", "artikulado", "deklino", "diskriminado", "detonado", "frustrado", kaj "ordinado", el kiuj ni ricevas per retroderivado la tre koncizajn verbojn "abnegi", "aliteri", "apeli" (mi ja scias, ke

P.I.V. listas "apelo" kun alia malofta signifo, sed ĝi certe ne estus la sola, kiu havus du signifojn, "artikuli" "deklini", "detoni", "frustri", kaj "ordini", kaj ĉiu derivaĵo estus tute preciza. Certe estus oportunaj la partipoj el tiuj verboj, kiaj "artikulita" kaj "frustrita", kaj ili estus ne nur precizaj, sed vere esperantaj laŭ naturo.

Ofte mi vidas uzitaj far elstaraj esperantistoj tiujn vortojn, kiujn mi ĵus prezentis al vi, kio pruvas, ke la sama ideo, eĉ se nebula kaj nekonscia, estas en iliaj mensoj, ĉar ili pensas esperante.

—Ken Linton.

MI ERARIS !

En artikolo pri kiel mi fariĝis Esperantisto ("A. E.", Decembro, 1978), mi diris, ke mi unuafoje aŭdis pri Esperanto en Sidnejo en 1962, kiam ĉe koncerto de la Popolmuzika Klubo de Sidnejo (Bush Music Club of Sydney) pola profesoro de Perto, Okcidenta Aŭstralio, kantis en Esperanto kaj parolis pri la lingvo.

Post la aperigo de tiu artikolo, kelkaj homoj demandis min pri kiu estis la profesoro, sed post tiom da jaroj mia memoro estis tro nebula kaj mi ne povis rememori lian nomon.

Dum mia lastatempa vizito al Sidnejo por partopreni la Esperanto-Kongreson, mi renkontis malnovan amikon, membron de la Popolmuzika Klubo, kaj li bone memoris "La Profesoron", kiel la membroj de la klubo bonkore kromnomis lin. Li ne estis pola profesoro de Perto, sed Fritz Müller-Sorau, de Sidnejo, kaj estis el lia buŝo, ke mi unuafoje aŭdis pri Esperanto.

—Clarence Strochetter.

RECENZOJ

SUPERRIGARDO PRI AŬSTRIO de D-ro Karl Beckmann.

Jen kolekto de felietonoj, kiun eldonis la Esperanto-redakcio de Radio Vieno. En 49 bele presitaj paĝoj la aŭtoro donas kompaktan bildon pri la geografio, historio, popolo, literaturo kaj vivmaniero de Aŭstrio, landeto situata en la koro de Centra Eŭropo. Ĉi tiu leginda libreto estas **senkoste** havebla ĉe **Esperanto-Redakcio ORF A-1136 VIENNA (Aŭstria)**. Notu bone, ke ĉiu mendanto raitas ricevi nur nun ekzempleron de la libreto, sed per amasa alskribo vi ebligas, la eldonon de dua, suplementa serio.

A TRANSLATION COURSE IN ESPERANTO FOR ADVANCED STUDENTS

by F. R. Banham, Dip. B.E.A., N.K.D.

(176 pages) Price \$6.00.

Post/packing: N.S.W. \$1.25

Other States, \$1.35.

Overseas, \$1.55

Available from: Alan Towsey, 19 Market Street, Tahmoor, N.S.W. 2573.

BONA INFORMO

20% DA RABATO.

La 1981a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝis. Ekde 19-9-1980 ĝis 31-1-1981 estas Ĝia periodo kaj farante abonon aŭ reabonon al la gazeto oni povas profiti 20% rebaton el jena tarifo.

Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi de la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN ĉinstilajn rekompencaĵojn.

A B O N T A R I F O

Por 12 numeroj (1-jaro) \$5.70 — 20% = \$4.56.

Por 24 numeroj (2-jaroj) \$9.60 — 20% = \$7.68.

Por 36 numeroj (3-jaroj) \$14.40 — 20% = \$11.52.

Abonu ĉe S-ro K. G. Linton, 4/2 Lyons Street, Glenhuntly, 3163.

La loko de la Londona Esperanto-Diservo estas nun Kingsway Hall, Kingsway, London, W.C. 2. Anoj de la Brita Sekcio de Kristanaj Esperantistoj kunvenas, la duan dimanĉon de ĉiu monato je 3.15 p.t.m.

La antaŭa loko estis la Franca Pre ejo en Soho Square, kie mi ĉeestis kiam mi vizitis Londonon. La britaj esperantistoj ĉoĵus vidi vizitantojn; post la Di-Servo ili temanĝas en la manĝejo de Kingsway Hall, Telefonu Geoff Dorow: 66-56-188.

—Isabel Gale.

RAPIDA MALJUNIĜO

Post 42-jara loĝado en la sama loko mi translokiĝis al Launceston. Je la 1-a de septembro, Barbara Pennington kaj mi geedziĝis, kaj per tio mi subite fariĝis edzo, patro, bopatro kaj avo. Kia rapida maljuniĝo! Jes, sed mi profunde amas mian novan familion, speciale mian edzinon.

Clarence Strochetter.

22 Alma Street, Youngtown, Tas. 7250.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

7. RALPH L. HARRY, AC, CBE, LL.B. B.A. (Oxford)

(concluded)

His Excellency, Ralph, first served as Ambassador in Belgium, then in South Vietnam, the Federal Republic of Germany and, finally, New York.

In Belgium as Ambassador to the European Community, he initiated the translation of the Treaty of Rome and personally translated the Convention on Diplomatic Practice and the Law of Treaties. In Vietnam, he coached the Saigon Esperanto Club. In Germany he prepared a phrase book for the Olympic Games and spoke in Esperanto about Australia in 20 German cities. He lectured on the Law of the Sea at the U.E.A. Summer University in Belgrade. As leader of the Australian delegation to the U.N. Conference on the Law of the Sea, he attended meetings in North and South America and Europe, visiting and encouraging Esperanto movements.

While in New York, he interested the information and legal departments of the Secretariat, and he hopes that the new Esperanto Centre opposite the UN Building will ensure that the Secretariat keep publishing the Charter and other documents. He was encouraged when the Director General of UNESCO said in Reykjavik that the Esperanto Congress was the only international meeting where language was an aid, not a barrier.

Ralph managed to be back in Australia for the Brisbane and Launceston Congresses and encouraged the Government to use Esperanto films, tapes and booklets. In 1978, he became his Excellency, for he retired from Government service. However, retirement only partial. He became Director of the Australian Institute of International Affairs, and President of the Canberra Esperanto Club. In July of this year he took over the reigns of government of A.E.A.

He is convinced that A.E.A. can have 1000 members and associate members by 1987 when the Esperanto World celebrates its centenary.

At the moment, he is writing in the international language about international law and hopes to publish his

memoirs in Esperanto and an international book of quotations. A current ambition is to improve his golf and his bridge. He feels that there should be an Esperanto translation of the rules.

In the Queen's Birthday Honours of 1980, Ralph L. Harry was named a Companion in the Order of Australia for public service, in particular as a diplomatic representative. This honour is for "eminent achievement and merit of the highest degree in service to Australia or to humanity at large". As an Esperantist, he sought to serve humanity.

Ralph describes himself as an idealist, ideas man and wordsmith, rather than an organiser; but he is a worker who believes that goodwill and energy are not bad substitutes for system. He excels as an occasional speaker — often in verse with sparkles of wit. Here are two stories he told me as we breakfasted together during the 1980 Australian Esperanto Congress. We were in the People's Palace, where Ralph seemed quite at home, though he must have become accustomed to palaces of quite a different sort:

(1) Picture the scene: A very narrow street in an Oriental city. Ralph proceeding in his huge ambassadorial limousine complete with flag. In the other direction, a limousine at least as huge, complete with a royal flag. A stalemate. Ralph's driver refuses to reverse. His master was far too important a man to go back. The other driver, afraid that his master would lose face, refused too. Heated argument. Ralph got out. So did the occupant of the other car. Immediate recognition. "Good morning, Your Highness. I'll tell my driver to go back". "Oh, no, Your Excellency, I insist. I'll tell my driver to go back". Finally, the cars crawled past each other, with the proverbial inch to spare.

(2) A Mongolian official who spoke English: "Your Excellency, I do not understand. You said you have millions of "sheeps" in Australia, but the country is so dry you have not water to sail them on!" We may expect a lot from a man who hands out gems like these.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2603

Sekretario: S-ro F. J. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. ELLIOTT, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

Kasisto: S-ino I. FALLU, 10 Sumersett Avenue, Oakleigh South, Vic., 3167

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 183/184 (263/264)

MELBOURNE

Decembro, 1980

KRISTNASKA MESAĜO DE LA PREZIDANTO

Por multaj homoj la monato decembro havas specialan signifon. Kristanoj celebras la naskiĝon de la Savanto Jesuo Kristo. Nordaduoŝferaj paganoj notis la plilongiĝon de la tagoj, kaj ricevis novan esperon de printempo. Tial eĉ nekristanoj en nia socio faras el "Kristnasko" festosezonon.

Por Esperantistoj Decembro estas ankaŭ la monato kiam ni festas la naskiĝtagon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, iniciatinto kaj komponinto de la fundamento de Esperanto. Ĉie en la mondo Esperantistoj organizas vesperojn honore al "La Majstro", dignajn vesperojn kun muziko, deklamado, prelegoj. Zamenhof-vesperoj estas okazoj por ĉiuj Esperantistoj — por regulaj membroj kaj ankaŭ por Esperantistoj kies fido bezonas plifortigon, eĉ revivigon, por spertuloj kiuj deziras esprimi sian dankemon, kaj por komencantoj, kiuj celas certigi, ke Esperanto ne estas nur temo de lecionoj sed funkcia, vivanta komunikilo. Mi esperas, ke ĉiu Esperantisto en Aŭstralio partoprenas en almenaŭ unu tia vespero en 1980.

Por ni Decembro estas ankaŭ la monato de la Libro, kiam oni aĉetas almenaŭ unu Esperantan libron. Ni en Aŭstralio havas bonegan Libroŝervon

kun tre varia stoko. Ĉiu AEA-ano ricevis la katalogon. Ĉiu numero de AE enhavas recenzojn. Do, mi esperas, ke en Decembro, 1980 (aŭ en januaro 1981, se vi prokrastis) Tom Elliott vendos almenaŭ 300 librojn.

Decembro estas ankaŭ la fino de la jaro, kiam ni pripensas niajn farojn kaj misfarojn de la pasintaj monatoj kaj skribas bonajn decidojn por la nova jaro.

Mi invitas ĉiun membron de nia Asocio fari kun mi, antaŭ la fino de 1980, la jenajn decidojn pri 1981:

Mi plibonigos mian scion kaj spertecan pri Esperanto, per studado kaj legado, per uzado en la klubo kaj per korespondado kun almenaŭ 3 eksterlandanoj.

Mi pretos instrui aŭ helpi pri la organizado de la movado en mia urbo, kaj eventuale en mia ŝtato kaj lando.

Mi subtenos la movadon per aniĝo kiel individua membro de A.E.A., U.E.A. kaj la internacia organizaĵo de mia fako. Mi abonos almenaŭ unu internacian gazeton, aldone al la organo de U.E.A., ekzemple, "Heroldo" aŭ "Monato", aŭ mi kunpagos en klubo

Send 48 del,

Mi acetos almenaŭ 3 librojn dum la jaro, aŭ kontribuos al la kluba biblioteko, per mono aŭ laboro.

Mi parolos kun miaj familianoj kaj amikoj pri eventoj en Esperantujo kaj la utileco de la internacia lingvo.

Mi portos la verdan stelon kaj stimulos iun societon akcepti paroladon pri Esperanto. Se ne estas iu pli kompetenta mi mem parolados.

Mi enskribos min por la Tutaŭstralia Kongreso en Adelajdo kaj preparos, kune kun miaj samklubanoj erojn por la programo — muzikon, prelegon, deklamadon, teatraĵoj, skeĉon, almenaŭ bonan ideon por la aferkunsido.

Mi kontribuos laŭ miaj financaj eblecoj, al la fonduso "Stipendio" por ebligi al niaj junuloj partopreni pli plene en la vivo de nia Asocio.

Fine mi menciuj du decidojn kiujn mi faris kiel Prezidanto:

(1) Se iu Esperantisto en Aŭstralio ne fariĝis ano aŭ ĉesis esti ano de AEA nur pro manko de mono, kaj se la organizaĵo en la koncerna ŝtato ne povas aranĝi helpon, mi iel trovos la necesan monon. Estas neakceptebla, ke iu ne estu membro de nia Asocio nur pro malriĉeco. Mi petas la prezidantojn

Tre plaĉas al ni prezenti la jenan artikolon de S-ro William Auld nuna Prezidanto de la Akademio de Esperanto. En letero al la redaktoro, S-ro Auld skribis: "Estas aparta plezuro

de la diversaj kluboj, societoj kaj federacioj informi min antaŭ la fino de januaro se tia persono troviĝas en ilia regiono.

(2) Se iu Esperantisto en Aŭstralio ne fariĝis AEA-ano aŭ ĉesis esti ano pro iu alia kialo, kaj se la koncerna organizaĵo post klopodoj ne sukcesis persvadi la Esperantiston aniĝi, tiam mi estas preta skribi personan leteron. Kompreneble multe helpus min se oni sendus al mi sufiĉe da detaloj, por ke mi verku trafan leteron.

Sed nun alproksimiĝas la sezono de paco kaj bonvolo kaj mi deziras saluti ĉiun membron. En la nomo de la Estraro mi sendas al vi kaj al viaj familioj tutkorajn bondezirojn por Zamenhof-festo, por la Monato de la Libro, por Kristnasko, kaj por la Nova Jaro!

—RALPH HARRY.

Vojaĝanto en Irlando vagadis en kampara vilaĝo. Aŭskultante muzikon de orgeno, li haltis ekster preĝejo kie okazis funebra solenaĵo. Li demandis al homo staranta apude: "Kiel nomiĝas tiu bela himno?" La homo respondis: "Safoj povas pace sinpaŝti." "Bele", murmuris la vizitanto, "kaj diru al mi, kiu mortis?" Respondis la alia: "La loka buĉisto."

verki por la 'AE', pro tio ke jam de jaroj ĝi estas unu el la malmultaj revuoj, kiujn mi ricevas seninterrompe. Estu certa, mi ĉiam legas ĝin kun atento kaj ofte plezuro."

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Kiel la plimulto el ni, mi fariĝis Esperantisto pro la hazardo. Tamen mi estas certa, ke iam-tiam mi estus ĉi-okaze trovinta kaj lerninta la lingvon. Kiel 12-jara knabo mi obsediĝis de la enigmo: kiamaniere homo povas pensi per du lingvoj? Mi ne scias, ĉu la fakto, ke mia avino parolis angle kaj gaele (kaj sekve mi ofte aŭdis du lingvojn) influis mian scivolon. Tial mi vizitadis bibliotekon en Glasgovo, kiu specialiĝis pri fremdaj lingvoj, kaj prunteprenis sinsekve lernolibrojn de plej diversaj lingvoj: la pola, la flinna, la germana,

k t.p. (—sed ne la gaela, efektive!). Cetere, en mia lernejo, iom escepte mi lernis la latinan, sed nenian modernan lingvon, eĉ ne la francan (tio venis poste). Estas hodiaŭ al mi klare, ke mia lokusta interesiĝo devenis pli el scivolo pri la ĝenerala fenomeno **lingvo** ol el serioza interesiĝo pri unu aparta lingvo: mi ekhavis ian nebulan komprenon pri lingvaj karakterizoj.

En tiu tempo mi estis ankaŭ fervora skolto kaj abonis la nacian skoltan gazeton. En ĝi presiĝis serio: la skoltaj

moto kaj leĝoj en diversaj lingvoj. Foje ili aperis ankaŭ en Esperanto. Al mi plaĉis la moto: Estu preta. Ĝi ŝajnis al mi tute rumana (jes, ankaŭ rumanan lernolibron mi trarigardis!). En alia skolta libro "Boy Scout Tests and How to Pass Them" mi trovis kvarpaĝan lecionon de tiu Esperanto. Mi demandis mian trupestron pri la lingvo. Li donacis al mi ekzempleron de "Step by step" kaj mi kaptiĝis. Mi tralegis la tuton, kaj iel akiris "Edinburgh"-vortaron. Sed eĉ ne venis al mi en la kapon serĉi kontakton kun aliaj esperantistoj. La lingvo restis mia privata intereso — ĝis 16-jara mi sciigis mian amikon John Francis pri ĝi, kaj ankaŭ li "lernis" ĝin.

Inter ni ni kreis iun strangan dialekton de Esperanto. Memoru, ke absolute nenium kontakton ni havis kun esperantistoj. Sed ni estis amantoj de la latina lingvo, kaj Esperanton ni skribis — ŝajnas al mi, ke ni malmulte parolis ĝin — kvazaŭ ĝi posedus absolutan ablativon, ktp! Tiutempe mi verkis poemojn en "Esperanto"; ili kuŝas ie en mia subtegmentejo, sed mi ne volas ilin revidi . . .

Militservo. Dum kvar jaroj akompanis min tra tri kontinentoj mia Butler kaj mia "Edinburgh". Unu fojon mi eĉ instruis "Esperanton" al kelkaj kolegoj. Sed neniam mi kontaktiĝis kun lokaj esperantistoj. Foje iu oficirkolego fajfis por mi "la Esperon", kiun li lernis de sia fratino, sed la melodion mi kompreneble ne rekonis.

Reveninte al la hejmlando post la militfino mi skribis al la Brita Esperanto-Asocio, abonis al "Esperanto Internacia" kaj al nova revuo "Esperanto en Skotlando" kaj mendis laŭ la librolisto tri librojn: "La vojo returne", "La Tragedio de l' Homo" kaj "Infero". Ĉion mi diligente legis, kaj fine alorbis iom el la vera spirito de la lingvo. Mi iris en librovendejon en Glasgovo, kaj trovis tie ekspozicion de esperantaj libroj! Dum monatoj mi iris regule en tiun vendejon kaj ĉiufoje aĉetis librojn, tute hazarde, nenion sciante pri la esperanta literaturo. Strangan sortimenton mi akiris. Ĉion mi tuj tralegis, sendistinge.

Iun tagon la butikisto prezentis al mi alian klienton John Rattray, kiu tuj flue alparolis min en Esperanto: mia unua konversacio en "vera" Esperanto. Pro tiu renkontiĝo mi (kaj Francis)

aliĝis al du kluboj: la Glasgova Societo, kaj la Laborista Grupo. Belaj tagoj!

"Esperanto en Skotlando" presigis mian tradukon "Non sum qualis eram bonae sub regno Cynarae" de Ernest Dawson, kaj tio konatigis min kun Reto Rossetti, kiu komencis eduki min pri Esperanto kaj kuraĝigis mian novican verkadon.

Restis ankoraŭ unu etapo: plenakirado. Francis kaj mi renkontiĝadis unu-du fojojn ĉiusemajne por studi kaj babilu. Inter ni, ni parolis nur Esperanton, eĉ admonis en Esperanto la arbitran ĉe futbalaj ludoj. Kiel universitata studento mi prinotis en Esperanto la prelegojn, kaj verkis en Esperanto miajn tezojn antaŭ ol traduki ilin en la anglan por prezentado al miaj mentoroj. Mi verkadis poemojn kaj poemtradukojn kaj legis pli da esperantaj libroj ol da anglaj. Mi ne povas diri, ke tio akcelis mian laikan karieron. . .

Sed venis finfine la tago, kiam mi solvis propraserte tiun malnovan enigmon: kiaman're homo povas pensi per du lingvoj.

—WILLIAM AULD.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Oktobro, 1980.

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ain ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko "Presejoj, kiuj ne posedas la

literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh ĵh, sh, u".

—Prezidanto: W. Auld
Sekretario: D-ro A. Goodheir

VIRINOJ EN NIA SOCIO

Jacqueline Walker (Perth)

Dum ĉi tiuj lastaj okdek jaroj la rolo de virinoj en nia okcidenta socio multe ŝanĝiĝis. Je la komenco de la dudeka jarcento la viroj ne permesis al virinoj voĉdoni. Nun, je la komenco de la naŭa jardeko de ĉi tiu jarcento kaj la dua duono de la "jardeko por virinoj" de Unuiĝintaj Nacioj, registaroj aprobis kaj aprobas leĝojn, kiuj celas malebligi seksan diskriminacion. Sed, oni ankoraŭ ne ofte vidas viron kiu prizorgas infanojn aŭ virinon kiu praktikas inĝenierarton aŭ medicinon, ĉar, nia socio instruas nin, kiam ni estas en infaneco, ke viroj kaj virinoj faras malsaman laboron, ekzemple, patro laboras en la urbo dum patrino prizorgas en familio. Tiuj malsamaj okupoj "la seks-roloj" estas necesaj sed ili ankaŭ povas limigi la disvolvigon de la potencialo de la individuo.

En fruaj malgrandaj socioj, difinitaj seks-roloj necesis por la sukcesa evoluo de la familio kaj de la tuta socio. Ekzemple, la Primitiva Socio en Aŭstralio. La pli forta viro serĉas kaj mortigas bestojn por manĝaĵo. La virino eble naskas infanon kaj ĝin prizorgas, ŝi helpas serĉi akvon, radikojn kaj manĝeblajn plantojn. Infano lernas lertecon laŭ sekso. Ne necesas ke iu infano lernu la lertecon de la alia sekso — oni malsparus tempon.

En la plejmulto el la socioj oni supozis ke virinoj estis malsuperaj ĉar ili estas pli malfortaj fizike ol viroj — oni supozis ke ili estis ankaŭ pli malfortaj mense kaj morale, ke ili ne povus esti respondecaj aŭ bonaj gvidantoj. En multaj socioj kiaj tiu de Antikva Grekujo kaj la barbaraj triboj de la "Mallumaj Epokoj" virinoj estis sklavinoj. Dum la Mezepoko kaj la jarcentoj ĝis la dudeka jarcento virinoj ne plu estis sklavinoj sed oni ne donis al ili la privilegiojn kiujn viroj ricevis. Ekzemple, virinoj ricevis tre malmultan edukon, la plejparto el tiu estis hejmtasko: multaj verkistinoj de la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj uzis pseŭdonimojn

ĉar oni ne aĉetus la librojn, se oni sciis ke virino verkis ilin.

Sed la plej granda ekzemplo de tiu ĉi subpremo estis en la Ordinara Leĝo de Anglujo kiel prezentita en "Raportoj pri la Leĝoj de Anglujo" (Commentaries on the Laws of England). Laŭ la leĝo, virino perdis la personecon post edziniĝo; virino ne povis gardi siajn infanojn aŭ proprietatojn; en Anglujo virino ne povis eniri universitaton aŭ praktiki leĝon aŭ medicinon; kaj en eĉ la tiel-nomataj demokratiaj nacioj virinoj ne povis voĉdoni, ili devis obei la leĝojn kiujn registaro de viroj kreis — registaron de viroj ili ne povis elekti.

Virinoj nur komprenis ke la viroj subpremas ilin kiam virinoj laboris por la Abolicia Movado. Ili laboris por liberigi duaklasajn civitanojn, kiuj tute ne havis rajtojn, kaj renkontis diskriminacion mem, tiam ili komprenis ke ankaŭ ili estas duaklasaj civitanoj. Tiam virinoj komencis propagandi por la rajtoj, kiujn ili ne ricevis. La plej bonkonata movado estis tiu de la Aktivilinoj pri Virina Voĉdonrajto. Post jardekoj da protestoj, virinoj en la plejparto el la Eŭropaj Nacioj povis voĉdoni. La virinoj tiam ne haltis. Ili daŭrigis batali ĝis nun. La plej intensa periodo de aktiveco estis dum la fino de la 1960-a jardeko, kaj la komenco de la lasta jardeko. Dum tiu periodo virinoj gajnis multajn rajtojn. Ekzemple, oni traktas egale virojn kaj virinojn laŭ la ekstedzigaj leĝoj de tiu lando; virinoj povas esti membroj de la parlamento; ĉia okupo estas disponebla por ili. Sed la milito ankoraŭ ne finiĝas. Ĉia okupo vere ne estas disponebla kaj multaj rajtoj sin prezentas por la estonteco.

La problemoj estas en la sinteno de nia socio. La vojoj estas malfermaj sed io ankoraŭ malebligas ke multaj virinoj sekvu ilin. Estas multe da ekzemploj de tio en Aŭstralio. En niaj universitatoj estas pli da viroj ol virinoj, speciale en la fakultatoj de inĝenierarto, scienco, medicino kaj dentistaro.

En la "Laboro Havebla"-kolumnoj de la ĵurnalo, estas duoble pli da anoncoj en la "Viroj kaj Knaboj"-sekcio ol en la "Virinoj kaj Knabinoj"-sekcio ankaŭ la "Ĝeneralo: Viroj kaj Virinoj"-sekcio estas tre mallonga. Pli multe da diversaj okupoj estas anoncigitaj en la "Viroj kaj Knaboj"-kolumno. Virinoj

kaj knabinoj povas esti nur tajpistinoj, komizinoj kaj tavernaj servistinoj! Oni anoncas multajn okupojn en la "Viroj kaj Knaboj"-sekcio kiujn ambaŭ seksoj facile povus fari.

La viroj superregas ankaŭ politike. Estas multe pli da viroj ol virinoj en la Senato kaj la Stataj Parlamentoj. Neniu virino estas membro de la "House of Representatives". Eble neniu virino baldaŭ iĝos ĉefministro, aŭ ĉefministro de ŝtato aŭ ĉe estro de politika grupo. En lando kie estas proksimume egala nombro de viroj kaj virinoj, devus esti simila proporcio en instituto kiu, oni supozas, reprezentas la popolon!

Estas la virinoj kiuj estas la viktimoj por la senlaboreca krizo. Oni proponis ke ili devus forlasi la taskojn por krei dungon por la senlabora junularo. Oni ankaŭ eksigas multajn virinojn, kiuj faras neordinaran laboron—por virino.

Kial oni agas tiamaniere? Oni edukas nin kredi ke "la ĝusta ejo por virino estas la hejmo". Tio ĉi estas vera ĉar la tasko de virinoj estas naski infanojn kaj prizorgi ilin. Sed tiu ne estas la sola tasko de virinoj. Estas ankaŭ grave por virino, ke ŝi faru rekompencan laboron kiu ŝi ĝuas. Por multaj virinoj la mastrumado ne povas esti sufiĉe rekompensa kaj stimula.

Oni devas komenci pensi pri viroj kaj virinoj kiel egalaj homoj kun egala potencialo. Oni devas juĝi ilin nur pro ilia kapablo ne pro ilia sekso. Virinoj ne estas aparta sekso malsupera kaj oni devas doni al ili la samajn oportunojn, kiajn oni donas al viroj.

Mi esperas ke en Esperantujo oni evitos sekcan diskriminacion, kaj ke la limigita nombro da virinoj en la komitato de U.E.A. kaj du en la Akademio ne dependas de antaŭjuĝo kontraŭ la rajtoj de virinoj.

(Prelego de 16-jarulino ĉe la 22-a Aŭstral'ia E-Kongreso en Sidnejo)

DANKON!

Mi deziras danki al ĉiuj samideanoj kiuj helpis min aranĝi elstare kontentigan ferion por miaj bonaj amikoj, Gesinjoroj Ru kaj Katrien Bossong el Nederlando. Ru registris 165 speciojn

de birdoj, la plimulton el kiuj li neniam antaŭe vidis. Tiuj estas pli ol unu kvinono el ĉiuj bird-specioj en Aŭstralio. Tio estas dank' al la gastamo de samideanoj en Newcastle Mylestem, Brizbano, Sunbrila Marbordo, Toowoomba, Orange, Healesville, Melburno, kaj Kanbero.

La vizito klare montris, ke Esperantistoj estas vere "Unu granda rondo familia".

Mi ne deziras mencii nomojn, sed al ĉiuj samideanoj, kiuj helpis fari elstaran sukceson el la vizito, MULTAJN DANKOJN! —Wre. Chandler.

PROVIZORE BLINDA

Mi ĉiam intencis fariĝi kuracisto sed post unu jaro ĉe la Miĉigana Universitato, mi devis forlasi la kurson por perlabori iom da mono. Mi intencis foresti dum nur unu jaro, sed tiu jaro baldaŭ fariĝis tri, kaj kiam ĝi fariĝis kvin, mi troviĝis en Alasko, kie mi laboris en orminejo.

Unu vesperon dum severa ŝtormo batita ŝalupo alkajiĝis ĉe nia ĝeto, kaj du ĉifonaj nerazitaj homoj frapis sur mia kabana pordo, kaj petis ŝirmon por la nokto. Mi malmulte ŝatis ilian aspekton, sed kion fari! Poste mi trovis, ke ili estas multe pli bonaj ol ili aspektis, kaj baldaŭ ni partoprenis vigan konversadon. Kiam unu elprenis sian horloĝon, mi ekvidis Havardan insignon, kaj demandis al mi, kie tiu vagabondo ĝin trovis.

Responde al mia takta demando, li klarigis, ke Harvarda Universitato ĝin donis al li, kaj aldonis: "Incidente ili donis al mi ankaŭ kelkajn diplomojn sed mia kunulo el Jala Universitato posedas nur unu; li estas profesoro de la greka lingvo".

Tiam mi konstatis, ke mi mem ankoraŭ portas miajn laborajn vestojn, kaj ankoraŭ restas nerazita. La tento estis tiel granda, ke mi komencis deklami versojn el la Odiseo. La efiko estis magia, kaj ni baldaŭ fariĝis bonaj amikoj. Mi baldaŭ eltrovis, ke ili partoprenas libertempan vojaĝon.

La sekvintan tagon la vetero estis ankoraŭ malmilda, do mi invitis ilin

resti, ĝis la vetero pliboniĝos. Post la vespermanĝo okazis frapo sur la pordo, viro envenis kaj kolapsis sur la planko. Dum la serĉo por oro kelkaj eksplodaĵoj eksplodis en lia vizaĝo. Preskaŭ blinda li devis marŝi dek du kilometrojn antaŭ ol atingi mian kabanon. Li urĝe bezonis kuraciston, sed la plej proksima estis kvardek kilometrojn for trans furioza maro ankoraŭ netranspasebla. Mi klarigis al li ke mi ne estas kuracisto, nur medicina studento, sed mi farus mian eblon, se li konsentus. Li konsentis.

Feliĉe mi posedis iom da kokaino en mia amatora medicina ekipaĵo. Zorge mi mezuris la ĝustan dozon, kaj gutigis ĝin en lian okulon per fontpluma gutigilo. Dum tio gajnis efikon, mi boligis iom da akvo por steriligi la pinton de mia poŝtrancilo, kaj helpe de lupeo mi eligis la pecojn de kupro kiuj sufiĉe profundigis en la surfaco de la okulo, dum miaj kunuloj prizorgis la fajron kaj kaldronon, por ke mi havu sufiĉe da bolanta akvo en okazo de bezono. Fine mi kovris liajn okulojn per boraksa kompreso.

Dum la sekvintaj tri tagoj ni tri siavice renovigis la kompreson, kaj, kiam mi forprenis la bandaĝojn, mi trovis, ke la naturo jam helpis min, kiel ĝi nun faris jam milfoje por mi kiel kuracisto. Mi estis ege dankema, ke ekzistas nenia infekto, kaj restas neniaj pecoj da kupro en la okuloj. La sukceso de mia kirurgio konstatis min, ke mi jam malŝparis tro multe da tempo, antaŭ ol reveni al la universitato.

Kiam la ŝtormo finiĝis kaj ĵurnalo alvenis, mia paciento ektrovis, ke li povas ankoraŭ bone legi, kaj komencis danki min pro tio, ke mi redonis al li la vidon.

La alia universitata studento el Yale severe min riproĉis dirante, ke ili alte taksas la ŝirmon kaj manĝon, kiujn mi donis al ili, sed ili opinias, ke jam estas tempo, ke mi revenu al la universitato por fini mian studadon por gajni mian diplomon kuracistan.

Unu iaron poste mi denove estis ĉe la Miĉigana Universitato, kie, post pluaj kvar jaroj mi sukcese finis miajn studojn kaj gajnis tiun diplomon.

Hodiaŭ pendas super mia kamentabulo kupra kandelingo manfarita de

mia iama paciento en Alasko, sed mi ŝuldas al tiu homo multe pli ol li ŝuldas al mi. Mi eligis kupron el liaj okuloj, sed li malfermis la miajn.

El la angla tradukis Ken G. Linton.

RECENZOJ

HISTORIO DE ESPERANTO, de D-ro K. Beckmann, eld. Aŭstria Esperanto-Instituto.

Ĉiuj seriozaj esperantistoj devas studi la historion de la movado; tiamaniere ni scipovas, ke la pioniroj devis fronti ne-mageblajn malfacilaĵojn. Tamen ili sukcesis heredigi al ni la nunan movadon vivipova.

Antaŭ ol mi tralegis ĉi tiun broŝuron, mi ne konsciis pri la fakto "kvankam la provoj realigi la internacilingvan ideon havis jam konsiderinde longan, spertoran historion. Esperanto kreiĝis tute sen ia scio pri ĝi." Kredeble tio ne malhelpis. Oni aŭdas pri sciencisto, kiu zorge analizis la anatomion kaj fiziologion de la burdo, kaj pruvis decidige, ke la burdo ne povas flugi. La burdo neniam tralegis la tezon de la sciencisto, kaj ĝis nun ĝi daŭre flugas, senzorge.

Al Esperanto "komenca sukceso mirindas des pli ke la lingvo internacia frontis unue la konkurencon de Volapük." Kiel kutime inter niaj verkistoj, la kompilinto de ĉi tiu historio kritikis Volapük-on kvazaŭ "fortimige strangan-spekta". Ĉu prave? Oni ne timas en Britio vorton kiel "Knightsbridge", en Pollando "Przemysl" aŭ en Aŭstrio "Bischofshofen", kaj la pioniroj de internaciaj lingvoj devenis el tiaj landoj. Certe, tiaj arroj da konsonantoj terurigos lingvo naivan Japanon aŭ eĉ Italon. Oni devas serĉi aliajn kialojn por ekspliki la disfalon de la Volapuka movado.

Estas bone, ne kaŝi la konkurantojn aŭ eĉ la krizojn. Necesas disputoj kaj argumentoj en vivpova movado; ĉiu vigla partio aŭ religio povas enteni multajn diversajn opiniojn, paco troviĝas finfine en la morto. Sufiĉe da informo pri tiuj aferoj, de la Ido-skismo ĝis la NEM-krizo, oni trovas en ĉi tiu libreto.

Ne eblas kritiki la lingvan nivelon aŭ la stilon, tute mankas preseraroj, kaj

laŭaspekte la broŝuro estas alloga, kvankam malmultekosta; ĝi estas nepre aĉetinda por ĉiuj. —ROBI

(9 aŭstriaĵn ŝilingojn aŭ proks. 80 cendojn).

LA SOVAĜA ORSERĈISTO

"Back to the Goldfields!" (Reen al la orkampoj!) nomiĝis la fanfarone aranĝita popolfesto, por kies partopreno la orurbo "Kalgoorlie" en Okcidenta Aŭstralio invitis la orserĉistojn de la "tuta mondo".

Mi atingis, kelkajn tagojn antaŭ la festo tiun urbon kaj oni petatakis min por resti kaj partopreni. "Milionoj da orserĉistoj el ĉiuj mondpartoj venos" progroziis la urbestro, "Unika iluminado, vetkurado, festproceso, amuzbazaroj kaj arta piroteknikaĵo", diris la poliestro. "Ho, Sinjoro, vi nenie kaj neniam povus revidi tiaŝpecan popolfeston kia la unua "Back to the Goldfields!" fanfaronis la poŝestro kaj ĉiu Kalgurliano, kiu ŝatas sian hejmurbon, provis interesi min por la unika festo. Ĉu mi ne estis devigata atendi la 4 aŭ 5 tagojn? —Jes, mi atendis—sed ne kiel simpla mondvojaĉanto—kiel festgasto de la mondkonata orurbo "Kalgoorlie".

La grandaj tagoj venis kaj pasis, sed la atenditaj gastamasoj tute ne estis videblaj kaj en la festurbo nenio ŝanĝiĝis. Nur kelkaj oficialaj domoj estis iomete dekoritaj kaj komencis vespere lumini; tamen jam post du horoj oni finis ankaŭ tion, kaŭze de la mokado de la publiko. La amuzbazaroj donis nur al la infanoj ian oportunon por plezuri. La anoncigitaj piroteknikaĵoj kaj vetkurado ne okazis kaj en la "solena festproceso" marŝis anstataŭ milionoj da orserĉistoj el ĉiuj mondpartoj nur la sola eksterlanda festgasto, la simpla mondvojaĉanto, kies vojo hazarde kondukis lin tra la orurbo. 30 aŭ 40 aŭstrialiaj Feliĉasistoj, alvokitaj de la senpaga trinkaĵo aŭ de iu ajn parenco, kompletigis la urbanan procesieton. Orfaj kaj malgajaj balanciĝis la larĝaj pendantaj aŭtoŝoj en la ĉefstrato verŝajne ili hontis montri "Bonvenon" kaj "Back to the Goldfields!".

Ne necesas diri, ke mi uzis la maloftan okazon por des pli bone propa-

gandi Esperanton, ĉar tio ja estis la celo de mia mondmigrado. La 3 gazetoj de "Kalgoorlie" kaj de la najbara "Boulder City" raportis en longaj artikoloj pri mi kaj mia memelektita tasko, kio estis varbi por Esperanto kaj mi estis baldaŭ la "leono de la tago", ĉiam kaj ĉie ĉirkaŭita de scivolemuloj.

Ĉe la vespero de la unua festotago invitis min kelkaj amikoj al rinkejo, sed kaŭze de la festo oni plilongigis la trinkpermeson ĝis la 10-a horo vespera anstataŭ ĝis la sesa. "Ĉu vi estas Sinjoro Esperanto?", proksimiĝis al mi robusta orserĉisto aŭ kamparulo, kies aspekto estis tiel sovaĝa, ke oni ne sopiris ekkoni ĝin kun li. "Esperanto", li daŭrigis, kvankam mi nur lakone jesis lian demandon, "Esperanto—mi supozas ke mi jam aŭdis tian mal-vorton". "Vi aspektas kiel lertulo, Sinjoro", mi tuj respondis. "Certe vi eklernis multajn lingvojn, eble ankaŭ la mondhelpingvon Esperanto." "Ne, tute ne", interrompis min la sovaĝulo kun ne priskribebla malbeno. "Ho nun mi ankaŭ scias, kie mi aŭdis tiun ĉi vorton, estis en "Red Hill" Camp apud "Northam". Certe vi estis la homaĉo, kiu tranoktis en la tendaro de s-ro Newcastle, ĉu ne?" —"Sinjoro Newcastle?—Ho jes mi bone memoras. Estis gaja societo en la orserĉista kampo kaj tute konforma vivo". "Fermu la buŝon", interrompis min la ĉagrenulo denove. "Vi do estis la frenezulo, kiu instruis la papaganojn ofendi honestajn homojn!" —"Ho, jes Sinjoro", mi laŭtridis nun, "mi estis la frenezulo kaj instruis la ĉarman "Jack" paroli simplan frazon, tamen ne por ofendi honestajn homojn kiel vi sendube estas." "Silentu!", kriis al alia, "kaj sciu, ke mi juris je Dio kaj Diabolo disrompi viajn tutajn ostojn, se mi kaptos vin!" —"Tre interesa", mi respondis ridante, "sed mi kredas tio estas danĝera entreprenado. Ĉu vi estas asekurita?" —"Mi" ridaĉis la sovaĝulo, "ĉu mi estas malsana?" —"Ĝis nun eble ne, tamen, povas okazi, ke viaj ostoj disrompiĝos pli frue ol la miaj!" —"Malbenita kreitaĵo!, kriegis la entreprenemulo kaj provis ataki min, sed mi kaptis fulmrapide lian dekstran manon, turnis ĝin malantaŭen kaj devigis lin forĉeti sian batringon.

"Kio okazis", intermiksitis sin kelkaj aliaj ĉeestantoj inter kiuj troviĝis e-

la poliestro. "Malgranda ŝerco", mi respondis, liberigante mian kaptulon, kiu nun ne plu estis danĝera kaj mi rakontis. "Antaŭ 3 semajnoj mi forlasis "Northam" marŝinte inter la fervojlinio kaj la granda akvotubo "Kalgoorlie". Jam je la dua vespere mi atingis "Red Hill Camp" (la ruĝa montet-kampo), kie S-ro Newcastle kun kamaradaro serĉis oron. Memkompreneble ke viaj afablaj samlandanoj invitis min por tranokti kaj donis al mi bonan kamp-liton kaj ĉian komfortaĵon. Mi rekom-pencis la gastigantojn rakontinte pri miaj diversaj aventuroj en diversaj mondpartoj. Malfrue mi ekdormis kaj intencis ripozi longe.

Tamen, la vigla kuiristo, restinte en la sama tendo, vekigis kiel kutime tre frue en la mateno. Serĉante li alportis por mi la favorulon de la kompanio t.e. parolanta papago "Jack". "Have a drink, or stay an ass" (Prenu trinkaĵon aŭ restu azeno!), diris "Jack" ĉe ĉia ebla kaj malebla okazo. Kvankam mi estis ankoraŭ tre laca, mi sidigis en la lito kaj ludis ŝercis kaj parolis kun la ĉarma birdo. "Esperanto!" mi instruis ĝin. "Esessantooo!", li ripetis. "Esperanto, Esperanto, lernu Esperanton!" mi daŭrigis dum 2 aŭ 3 horoj, kun la sukceso ke "Jack" fine parolis "Lernu Esperanton or stay an ass!" (lernu Esperanton aŭ restu azeno!).

"Nu, estimataj sinjoroj, mi demandas vin, ĉu tio estas ofendo por honestaj homoj, kiel ekzemple tiu sinjoro?" Sed kie estis nia atakemulo? Li forŝtelis sin silente el la gaja societo, kiu min kompreneble senkulpigis kaj volonte aŭskultis miajn plurajn klarigojn pri nia kara lingvo.

Tio okazis komence de aŭgusto 1927 dum la unua renkontiĝo de la orserĉistoj en "Kalgoorlie", Okcidenta Aŭstralio. —Edmund Zscheile.

(S-ro Edmund Zscheile estis germana esperantisto, kiu dum la depresio travagis la mondon ĉefe piede, kaj survoje multe propagandis Esperanton.—Red.)

NI GRANDIGU NIAN TREZORON Wal'er Francini (San-Paŭlo Brazilo)

La Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, grandega industria urbo en Brazilo, organizis antaŭ nelonge sian Unuan Internacian Konkurson pri Troboj (Kvarversoj). La organizintoj ricevis 802

trobojn en la nacia lingvo (portugala) pri la temo "amikeco" kaj 52 en Esperanto pri la temo "frateco". Tiuj en la portugala venis el Brazilo kaj Portugalujo; tiuj en Esperanto venis el Kanado, Pollando, Ĉilio, Portugalujo kaj Brazilo.

Oni povas difini "trobon" jene: poemeto konsistanta el kvar versoj oksilabaj en kiuj la unua rimigas kun la tria, kaj la dua kun la kvara; krome, la versoj prezentas ĉefakcentojn sur la tria kaj sepa silaboj aŭ sur la kvara kaj sepa. Ekzemple: ĉefakcentoj sur la tria kaj sepa, pri la temo "Esperanto":

Por la venk' de Esperanto
iru ni al la labor'.
Sur la lipoj — varma kanto,
firma kredo — en la kor'.

Ĉefakcento sur la kvara kaj sepa silaboj, pri la temo "Sankta Nikolao":

Ho! Sankta Niĉjo, tardigas
la poŝta servo al vi . . .
Multaj leteroj perdiĝas . . .
Multaj povrujoj sen i' . . .

La vorto "trobo" ne estas oficiala, tamen konvena neologismo por nomi tiun specialan kvarverson, kiu per si mem konsistigas poemeton. En Brazilo kelkaj esperantaj poetoj preferas la formon "trivo". Pri tio decidis la tempo. Kiel ajn, ĉu sub la nomo "trobo", "truvo" aŭ "kvarverso" tiu poemeto estas malofita en la Esperanto-literaturo. Per sia konkurso, kiu espereble okazos ĉiujare, San-Paŭla Esperanto-Asocio celas interalie disvastigi tiun mallongan poezian formon, tre popularan en la brazila kaj portugala literaturoj, kaj indan je atento pro simpleco, koncizeco, klareco, populareco kaj esprimovo. Ke tiu formo estas tre populara en Brazilo pravas la fakto ke en 1979 okazis en tiu lando pli ol 30 naciaj konkursoj nur pri troboj.

La organizintoj baldaŭ diskonigos la rezultatojn de la Unua Internacia Konkurso pri Troboj kaj esperas, ke ankaŭ la literaturamantoj en Aŭstralio interesiĝos pri tiu poezia formo kaj partoprenos la venontajn konkursojn de San-Paŭla Esperanto-Asocio. Tute certe tio pliriĝigos nian originalan literaturon kaj estos plia pruvo pri la ekzisto kaj vivantezo de la Esperanto-kulturo.

(La aŭtoro estas UEA-Delegito kaj Fandeleĝito pri edukado por San-Paŭlo kaj tre eminenta preleganto ĉe sud-amerikaj Esperanto-kongresoj.—Red.)

The Australian Esperantist

N-ro 184 (264)

Decembro, 1980

Ĉi tuj ekstraj 8 paĝoj venas al vi pro la malavaraj donacoj de 102 esperantistoj kaj Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la "Subten-Fonduso" de nia gazeto.

CORRESPONDENCE COURSES:

During the past 3 years (well, almost; up to Oct. 1980) we have sold 189 courses (just over one a week). The best seller, BONAN TAGON, 103—means 103 new people introduced to Esperanto! Then come: JEN NIA MONDO 30 "Esperanto Teacher" 27 Step by Step 20, and Dek Kvin Paŝoj 9.

NSW heads the STATES with 76 courses bought; next come: QLD 37, VIC 32, and WA with 28 close behind. SA 9 ACT 2, TAS 3, and Singapore 2 courses, makes it more than Australia-wide.

Thanks go to our patient tutors who have enabled and encouraged new students to learn further (at least 2 have already gone right through to Course 5), to the Clubs and Federations who have helped with publicity, and the Editors who always find space for us; and not least to our good customers, the learners of Esperanto, who have made it all possible.

And, speaking to customers, many experienced Esperantists wanting a "brush up" have found our "Esperanto Teacher" course the ideal "refresher" before starting on the more advanced "Progressive" with "Step by Step". Now due for a reprint, the price of the "Esperanto Teacher" course (and others) must rise soon, but while stocks last, is still at the old price, \$10 (for 20 lessons!) a real bargain. Excellent value and a chance to save money, so get your order in, "tuj!"

— JOHN MOORE.

UZADO Aŭ POLURADO? de "REVANTO"

Antaŭ t'el longe, ke ŝajnas esti okazinte en antaŭa vivo, mi aĉetis m'an unuan aŭton. Tiu estis uzita "Austin 7". Samtempe, amiko mia, Morrie, aĉetis

sian unuan aŭton. Morrie estas filo de tre riĉa komercisto. Li pruntehavis de sia patro la prezon de nova "Rolls Royce". Semajnfine, Morrie kaj mi ofte iris tendumi en la kamparo. Pli ofte ni ĉeestis la preĝejon. Ni kutime iris al la kamparo en mia "Toby", la hundido, sed veturigis niajn amatojn al la preĝejo en "Dulcie", la dolĉa veturilo.

Ĉiusabate, krom kiam ni foriris tendumi, ni gvidis "Dulcie"-on sur la straton antaŭ la domo de Morrie kaj tie sinmonte lavis kaj poluris ĝin prepare por viziti la preĝejon la venontan tagon. Tiel okazis ke en la unua jaro, ni veturis iom pli ol sesmil mejlojn per "Toby", sed malpli ol tricent per "Dulcie".

Morrie estis Aŭto-poluranto; mi estis aŭto-uzanto.

Hodiaŭ mi estas Esperanto-uzanto; ekzistas ankaŭ Esperanto-polurantoj. Ekzemple, Trevor Steele (A.E. p.p 306) demandas, "Ĉu iu leganto sukcesos (traduki "poddy calf")? Utile, jes, mi certe sukcesos fari tion; polurite, kredeble ne. Mi uzas Esperanton por transdoni m'ajn konceptojn al aliaj mensoj. Tiucele iu ajn uzas iun ajn lingvon. Mia koncepto pri "poddy calf" estas bovido nutrata per likvido en sitelo aŭ trogo. Mi simple uzas "sitelnutrata bovido"-n aŭ eĉ pli simple "sitel-bovido"-n. Estas neverŝajne ke iu miskomprenus, aŭ ne komprenus la koncepton Komprenable, la lingvo-polurantoj protestus, ke sitelo ne estas nutraĵo. Oni devas uzi "persitelnutrata". Sed tiu vorto aspektas iom t'inge. Ĉiu komprenas "Sitel-bovido"-n. Ne pliklarigus la koncepton uzi tiun konsternigan vortadon.

Same, mi ofte devas mencii "On-site caravan". Mi uzas "sidanta Ruldomo"-n. Denove, protestas la lingvo-polurantoj. "Ruldomo ne povas sidi; mankas al ĝi sidilo". Mi konsentas. Tamen, "sidi" signifas resti en unu loko. Tre mal-

multaj personoj ne komprenus, aŭ miskomprenus "sidanta ruldomo"-n.

Mi estas literatur-amanto. Mi ja kredas ke "polurita Esperanto" estas bona lingvo. Tamen, la celo de Esperanto samkiel de ĉiuj aliaj lingvoj, estas transpreni konceptojn de unu menso al aliaj. Neniu rajtas postuli ke ni uzu "poluritan Esperanton".

Antaŭ iom pli ol kvindek jaroj, aperis en "La Suda Kruco" polemiko per kiu du eminentuloj disputis la relativajn meritojn de "insularo" kaj "arhipelago" kaj de "veturplano" kaj "itinerio". Estis aliaj, sed ilin mi nun forgesas. La lingvo-poluranto insistis ke oni uzu "arhipelago"-n kaj "itinerio"-n la lingvo-uzanto aprobis "insularo"-n kaj "veturplano"-n.

Persone, mi ne malaprobis poluritan Esperanton sed mi certe ne insistus ke ĉiu uzu tion. La celo de Esperanto estas transdoni konceptojn al aliaj kies sola lingvo, komuna kun ni estas Esperanto. Pro tio, mi uzas en ĝenerala konversacio la plej simplajn esprimojn, kiel "sitel-bovido"-n kaj "sidanta ruldomo"-n. Kiam mi verkas artikolon por, ekzemple, "Telopeo" aŭ "Monda Karuselo", mi uzas "poluritan Esperanton".

Ni ne forgesu ke la celo de Esperanto estas transdoni konceptojn; ke retoriko estas nur poluraĵo.

ESPERANTO EN LA SVISA RADIO INTERNACIA

La uzo de la internacia lingvo en la Svisa Radio Internacia havas jam longan tradicion. Ĝi komenciĝis en la jaro 1946, kiam d-ro Edmond Privat, kiu en Genevo mem estis estinta radiopioniro povis konvinki la unuan direktoron de la kurtonda radio, Paul Borsinger, ke Esperanto estas utila instrumento en radiostacio, kiu volas turni sin al la ekstera mondo.

Edmond Privat ricevis do anguleton de 5 minutoj, dum kiuj li prelegis eĉ sen manuskripto — tion li kapablis fari estante tiel elstara oratoro. La decida jaro tamen nur estis 1947, ĉar tiam okazis en Bern la 32-a Universala Kongreso de Esperanto kaj la juna ĵurnalisto d-ro Arthur Baur ricevis la taskon fari dum la kongreso 10-minutan elsendon. Kvankam mankis la tempo por sufiĉe frue disvastigi la informon pri la okazigo de tiuj elsendoj, la reago de la esperantista publiko estis sufiĉe impona por persvadi la direkcion de la kurtonda radio pri la valoro de la internacia lingvo. Ekde la 6-a de oktobro 1947 d-ro Arthur Baur estis komisiita

fari apud Edmond Privat duan elsendon de 5 minutoj.

Post kelkaj jaroj oni elsendis ĉiun kronikon dufoje en la semajno, sed la aŭskultantoj daŭre plendis, ke la programoj estas tro mallongaj. Efektive tio ankaŭ por la parolistoj estis tre malagraba, ĉar ili troviĝis en la dilemo, ĉu prezenti kronikon kun malmulte da enhavo parolante malrapide, ĉu prezenti kiel eble plej multe parolante rapide kaj per tio riskante, ke la aŭskultantoj ne bone komprenas.

En 1962 Esperanto ricevis pli da tempo, kaj ŝajnas, ke la plej multaj aŭskultantoj trovas la daŭron de 10 minutoj akceptebla, des pli ke la elsendoj nun estas dufoje ripetataj tiel ke oni povas elekti la plej konvenan tempon por si aŭ reaŭskulti, se oni ne bone komprenis pro perturboj aŭ ĝenoj, kiuj bedaŭrinde estas oftaj en la skalo de la kurtaj ondoj.

En la historio de la Esperanto-elsendoj en la Svisa Radio la Universalaj Kongresoj markas gravajn datojn. Tio do validas ne nur por 1947, sed ankaŭ por 1979. Dum la kongreso de Lucerno d-ro Arthur Baur denove ricevis la taskon ĉiutage raporti dum 10 minutoj. Estis disponigita por tiu celo la studio de la regiona radio de centra Svislando, kiu troviĝas en la domego de la trafikmuzeo. Ĉi-foje estis eble sufiĉe frue informi la publikon, kaj kiel certigas tion la multaj leteroj de aŭskultantoj, la ĉiutagaj raportoj kaj intervjuoj estis tre ŝatataj de la esperantistoj, kiuj ne povis mem partopreni la kongreson. La elsendoj okazis okfoje, ĉiutage je la 19-a kaj 23-a horoj.

En persona rilato la jaro 1963 signifis grandan ŝanĝon, ĉar tiam profesoro Edmond Privat devis, estante 73-jara, ĉesigi sian kunlaboradon pro malsano. Transprenis lian taskon d-ro Charles Ecabert, gimnazia profesoro de Neuchatel, sed la morto forrabis lin post kelkaj monatoj en la aĝo de 49 jaroj. Feliĉe oni trovis kapablan anstataŭanton en la persono de Claude Gacond—ankaŭ li ano de la kantono de Neuchatel — kiu ĉis hodiaŭ plenumas la heredaĵon de Edmond Privat.

La esperantistaro devas ĉiam konscii, ke la esperantlingvaj programoj en radio ne estas io memkomprenebla. Ilia ekzisto kaj daŭrigo plene dependas de la reago de la aŭskultantoj. Tial estas ege grave, ke oni ne nur aŭskultas sed ankaŭ sciigas tion al la koncerna radiostacio. Ĉiu reago estas valora—ĉu laŭda

ĉu mallaŭda—sed **tre danĝera estas la s.lento**. Ni ne povas ripeti en ĉiu elsendo ke oni bonvolu skribi al ni, tial ni presigas tion nun kaj substrekas nian adreson. **Evisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15.**

Seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto

17-22 aŭg., 1981 en Kastelo Gresillon, Francio

Celo: Enkonduki kursgvidantojn en la arton gvidi Esperanto-kursojn, kiujn karakterizas amuzo, ĝuo kaj sukceso, same por la instruanto kiel por la lernantoj.

Programo: Dum la 1-a tago okazos prezento de, kaj diskuto pri, la aparta apliko de rekt-metoda lingvo-instruado en la Baza Kurso en Esperanto, far Audrey C. E. Childs-Mee. Sekvos prezento de la kursmateriale kun aparta atento al la metodo prepari sin por instrui per ĝi. Dum 4 tagoj la materiale estos detale studata kaj aktive uzata. Antaŭ la fino de seminario, ĉiu kandidato por atesto preparos kaj prezentos provlecionon.

Praktikaj detaloj: La seminario estos malfermata al tiuj, kiuj celas gvidi rektmetodajn kursojn en Esperanto, ĉu profesie ĉu ne-profesie, kaj kiuj jam altgrade kompetencas en la lingvo. La seminario daŭros proks. 30 horojn, po 5 horoj tage, en la kadro de la "Tria Periodo" de la kulturaj aranĝoj de Gresillon.

Sinanoncojn faru rekte al:

Esperantista Kulturdomo
Kastelo Gresillon
F-49150 Bauge, Francio

Frua sinanonco estas rekomendita pro limigitaj eblecoj de loĝado ĉe la kulturdomo. —Audrey C. E. Childs-Mee.

**AŬSTRALIA-
=KRONIKO**

● **BRISBANE:** La jarkunveno okazis la 24-an de novembro kaj la estraro por 1981 estas: Prez: Trevor Steele; Vic-Prez: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Cath Sullivan; 2-a Sek. Bev Allatt; Kasi to: Terry Anderson; Libro-Peranto: Edna Jullie; Biblioteko: Ruth Morrison; Annie Spencer; Redaktoro "Babilado": Peggy Ross; Publikaj Rilatoj: Cliff Bailey. Post la kunveno okazis komunikado el la novkompilita kantlibro.

De 23-a ĝis 29-a de nov. ni starigis

E-budon kaj partoprenis la Hobio-Ekspozicion, ĉijare en hortikultura halo en la Ĉefa Ekspoziciejo. Tie ni alparolis kelkcent spektantojn kaj disdonis pli ol 500 flugfoliojn kaj broŝurojn al interesatoj; espereble la rikolto, multaj komencantoj, atingos nin frue en 1981. Niaj klasoj denove komenciĝos la 2-an de januaro en la nova jaro.

—Ray Ross.

● **SYDNEY:** F-ino Sija van Wijngaarden, kiu laboras ĉe UEA en Rotterdam vizitis nin je 13/10. Ŝi rakontis pri sia laboro ĉe UEA kaj montris belajn lumbildojn de Nederlando. Semajnon poste Ges-roj R. kaj K. Bossong el Eindhoven gvidis nin per diapozitivaj tra diversaj partoj de Nederlando.

Volo Gueltling (27/10) prelegis pri energio kaj je 3-a de novembro S-ino Chaldecott enkondukis novan ludon, kiu similas la anglan "Housie".

Je 10/11 Wre Chandler parolis pri pingvenoj, ĉefe pri tiuj de la insulo "Phillip", interesaj birdoj, kiuj ne flugas en la aero, sed por la formo de siaj sternumoj "flugas" sub la akvo. Laŭ fosilioj trovitaj la plej granda kaj peza pingveno estis 2-metrojn alta.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** Ĉiumarde (okt.-nov.) niaj 3 kursoj daŭris en la Vespera Lernejo, kun meznombro 18 ĉeestantoj.

Je 11/11 S-ino Kay Morrison parolis al kursanoj pri sia lastatempa vizito al Ĉinio. Elstara travivaĵo estis ŝia renkontiĝo kun ĉinaj esperantistoj, kiuj varme bonvenigis ŝin. En Suchow 10 junaj samideanoj vizitis ŝian hotelon por saluti ŝin, kaj en Pekino venis 3 jurnalistoj de la gazeto "El Popola Ĉinio". Survoje por vagonaro al la "Granda Muro", Kay renkontis grupon de 24 japanaj esperantistoj, gvidataj de S-ino Y. Isobe. La aŭstraliaj vojaĝantoj kun Kay ege interesiĝis pri la reciproka kompreniĝo inter Kay kaj la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj. Sekve de la bona impreso kelkaj el la grupo lernos nian lingvon. Aperis longa artikolo en "Manly Daily" pri nia entreprenema amikino.

Je 18/11 la estro de la Vespera Lernejo disdonis al studentoj de ĉiuj kursoj la nova leteron de la lernejo, kiu enhavis raporton pri nia agado kaj eksterlandaj kontaktoj.

Atingiĝis 65 la nombro de 4-minutaj dulingvaj skeĉoj verkitaj de niaj anoj Margaret Liston kaj Helen Stone por FM Radio-elsendo. Plua informo haveblas ĉe la iniciatinto Roger Springer.

Box 415 Manly, 2095.

—Marjorie Duncan.

● **MELBOURNE:** Je 6/10 Henry Rosengren priskribis sian punadon post malsukcesa provo eskapi el germana militkaptitejo kaj sian planon por la dua provo "Aspektoj de 2 urboj 'Hamilton' (Viktorio kaj Nov-Zelando)" estis la temo de prelego de David Rocknell (13/11). Semajnon poste, Harry Beechey plue informis nin pri "Bioritmo" kaj montris bio-ritman komputeron.

La ĉefa evento de la jaro estis la vizito de F-ino Sija van Wijngaarden, kiu laboras en la UEA-oficejo en Rotterdam kaj kiu alvenis en Melburno je la 26/10. Nia gasto loĝis dum 7 tagoj en la hejmo de la prezidanto de la Melburna E-Societo, (s-ro S. Kanaĉki) kaj dum unu nokto gastis ĉe Ges-roj J. Fallu. Je 27/10 la gasto prelegis en la Esperanto-Domo pri Nederlando. Ĉestis ankaŭ Ges-roj Bossong el Eindhoven (Nederlando), kiuj alvenis per la aŭtomobilo de S-ro W. Chandler (Sydney). Du tagojn poste, F-ino S. v. Wijngaarden alparolis klubanojn de la "Oakleigh"-grupo en la hejmo de Ges-roj Fallu.

Je 31/10 F-ino Wijngaarden vizitis la bestrezervejon en Healesville kaj poste estis gasto ĉe la kampa hejmo de Ges-roj G. Tumman, kune kun aliaj Melburnaj esperantistoj.

● **TASMANIO:** De 3-a ĝis 5-a de novembro F-ino S. v. Wijngaarden vizitis Launceston, kie ŝi estis gasto de Ges-roj M. Le Fevre. La lokaj esperantistoj montris al ŝi la ĉirkaŭajn vidindaĵojn.

Je 6/10 F-ino Wijngaarden alvenis en Hobarto, kie Ges-roj Loorits kaj Strohbach kaj s-ro Kam Lee, kun la helpo de aliaj Hobartaj esperantistoj zorgis pri la eksterlanda gasto. Striko de flughavena personaro malhelpis ke ŝi forflugu laŭplane je 7/11 kaj necesis ke ŝi restu pluajn 6 tagojn.

La loka taggazeto "Mercury" publikigis longan artikolon, kun foto, pri Esperanto kaj la viziton de la nederlanda gasto.

● **ADELAIDE:** La konata dana Esperanto-verkisto Poul Thorsen vizitis nin kaj ni aranĝis neformalan renkontiĝon kun li je 18-a de novembro.

Nia monata kunveno en la Universitato okazis je 24/11. Ni parolis pri Poul Thorsen, kiu ja alportis al nia societo freŝan venton el Esperantujo. Ni diskutis pri niaj kursoj kaj pri la venonta kongreso en nia urbo. Tiu kunveno estis la lasta en 1980, ni okazigos

la Zamenhofan Feston en la ĝardeno de S-ino T.v.d. Boogaard je la 13/12.

—Bob Felby.

"THE AUSTRALIAN ESPERANTIST" en 1980

Dum la ĵus pasinta jaro, 9 eksterlandaj kaj 25 aŭstraliaj esperantistoj kontribuis artikolojn al nia gazeto. La prezidanto de la Akademio (S-ro William Auld) honoris nin per artikolo, same kiel la konata verkistino kaj Akademiano Marjorie Boulton. Ni povis prelegi prelegojn de D-ro Arthur Baur (Svisa Radio Internacia) kaj de D-ro Karl Beckmann Aŭstria Kurtonda Servo). Eminentaj Esperanto-jurnalisto Bernard Golden (Hungarujo) kontribuis plurajn artikolojn. S-ino Audrey C. M. Childs-Mee (Rotterdam) estas nova kunlaboranto kaj el malproksima Brazilo venis artikoloj de S-ino Elvira Fontes kaj S-ro Walter Francini.

Regulaj aŭstraliaj kunlaborantoj estis nia Prezidanto Ralph Harry kaj Vic-Prezidantoj Prof. R. Robertson kaj Ken Linton. S-ro Arthur Cocking daŭrigis sian serion "Kiu estas Kiu en Aŭstralia Esperanto" kaj S-roj Trevor Steele, Alan Towsey kaj Wre Chandler kontribuis tre utilajn artikolojn. De transmaraj Esperanto-kongresoj raportis D-ro T. Einihovici kaj S-ro Les Scott.

Apartan dankon meritas niaj fidelaj Klub-raportistoj Margaret Chaldecott, Marjorie Duncan, (S-ino) M. Ellyard, Eunice Graham, Robert Felby, Jean Lehane, Eino Loorits, John Moore kaj Ray Ross. La teksto de la gazeto estis konsciencie kontrolita de S-ino Fay Koppel, sed spite de ŝia laboro enŝteliĝis, de tempo al tempo ŝajne neeviteblaj eraroj.

Por kvietigi la timon de 2-3 membroj, kiuj kredis ke okfoja eldono de presita gazeto eble bankrotigos la financojn de AEA, la redakcio lanĉis "Subten-Fonduson" por nia gazeto. La intenco estis kolekti \$1000 en 2 jaroj, sed jam post 10 monatoj nia legantaro malavare kontribuis \$1079 (Pluaj donacetoj estus plezure akceptitaj). Pro tiuj malavaraĵoj donacoj ni povas eldoni 9 numerojn ĉi-jare, sed ni observis la sugeston de nia kaskisto, ke por ŝpari proks. \$35-afrankon ni aperigu 16-paĝan gazeton anstataŭ ekstran eldonon.

Per siaj malavaraĵoj donacoj nia legantaro atestis ke ili ŝatas nian gazeton, sed samtempe ni ricevis ankaŭ gratulon de la eminenta Esperanto-periodaĵo de U.E.A. ("Esperanto"), kiu en sia marta eldono diris, i.a.: "The Australian Esper-

antist" delonge vicigas inter la plej bonaj landaj Esperanto-periodaĵoj."

Ni esperas kaj bonvenigas vian daŭran kunlaboron en 1981.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO**

Antaŭe raportita	\$1035.10
"Roko" Rockhampton	20.00
Alice Longson, Perth	19.00
Jacqueline Walker, Perth	5.00
	<hr/>
	\$1079.10

**FONDUSO POR
ESPERANTO-STIPENDIO**

Antaŭe raportita	\$569
E. C. Thomas, Toowoomba	25
R. F. Stephens, Perth	5
S-ino Turnbull, Perth	20
S-ro M. Franconi, Perth	50
S-ino I. Einihovici, Perth	25
Ges-roj R. Ross, Brisbane	20
S-ino L. Raiter, Perth	20
S-ro M. Eatt, Perth	10
S-ro S. Chew, Perth	100
S-ino F. Lange, Perth	10
S-ro J. S. Sadique, Perth	25
Vera Payne, Perth	20
S-ino S. Franconi, Perth	15
	<hr/>
	\$914

NOVAĴOJ EL JAPANIO

Unu el la plej aktivaj regionaj organizaĵoj, estas KLEG, la **Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj** (situita en la regiono de Osaka, Kyoto kaj Kobe). La Ligo estas konata pro siaj celtrafaj aranĝoj.

Fine de majo okazis en la urbo Ŭzi, Kioto, la KLEG-Kongreso kun partopreno de 251 personoj. En publika prelego S-ro T. Iwakura raportis pri la 340-paĝa fotoalbumo "Hirosima-Nagasaki", kies ĉefrespondeculo li estis. Tiu libro aperis en 6 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Sammonate, en la Junulara Domo de Nagoya, okazis la kongreso de la esperantistoj en la regiono **TOKAI**. S-ro K. Kurisu prelegis pri la ĉina E-movado kun diversaj novaj kaj interesaj informoj.

En **Tokio** okazis en junio la 29-a Kongreso de la E-Federacio de la Kanto-Regiono Pli ol 100 esperantistoj partoprenis. Germana esperantisto, S-ro W. Schmid, prelegis pri la nederlanda E-movado kaj S-ro K. Hutatugi pri konataj japanaj kaj alilandaj poetoj.

En la domo de la **Japana E-Instituto** en Tokio okazis en junio la Regula Jara Kunveno de lokaj reprezentantoj de la Instituto. I.a. oni diskutis planon por la centjara jubileo de Esperanto en 1987, tutlandan organizaĵon de prelegkunvenoj kaj kursoj, kaj eldono de novaj informiloj pri Esperanto.

En majo mortis **S-ro Ŝ. Mijake** iama direktoro de la Japana E-Instituto, membro de la Akademio de Esperanto, kaj aŭtoro de unu el la plej vaste uzataj E-vortaroj por japanoj.

Oni nun preparas **novan japanan-Esperantan vortaron**, ĉar la ekzistantaj estas aŭ malnovaj aŭ tro koncizaj. La eminenta verkisto **MIYAMOTO Masao** jam de longe kompilis la vortaron, kiu estas eĉ pli ampleksa ol PIV, kun pli ol 60,000 kapvortoj. Tiu vortaro estas kaj fakterminaro kaj sinonimaro kaj frazeologia studaĵo. Parton de la grandegaj eldonkostoj kolektas la Japana E-Instituto en la nomo de "specialaj moneroj". 2840 esperantistoj jam kontribuis proks. 7 milionoj da enoj (proks. \$30,000). Ĝis nun oni kompostis unu trionon de la vortaro.

PENSOJ PRI ESPERANTO-CENTJARO

Ĉu A.E.A. planas propagandfestojn por la centjara datreveno de Esperanto en la jaro 1987? Ŝojnas al mi, ke oni devus baldaŭ pripensi tion.

Mi proponas ke la Asocio forte sugestu al la ĉefoj de la Aŭstralia Poŝtoŝeficejo, ke tiu presigu specialajn poŝtmarkojn por vendi ekde aŭgusto 1987 — cent jarojn post la publikigo de la lingvo. Tion oni devos fari tre frue, por ke oni havu sufiĉan tempon por desegni kaj presi la poŝtmarkojn. Ĉu ni havas spertan pentriston en la movado, kiu povus desegni taŭgajn poŝtmarkojn?

Mi sugestas portreton de Zamenhof, kiel li aspektis en 1887 kaj klarigon "L. L. Zamenhof — kreinto de Esperanto: Internacia Helplingvo por la tuta mondo: Jarcento 1887-1987", aŭ ion similan. Eble 2 poŝtmarkoj malsamaj — unu kun Esperanto-teksto por arapŝto eksterlanden kaj alia por poŝto enlanda kun angla teksto.

Kion aliaj esperantistoj proponas?
—Donald Rogers Melbourne

(La poŝta administrejo havas grandan stabon da oficialaj fotografistoj kaj pentristoj, kiuj certe desegnos la poŝtmarkojn, kiujn Don Rogers proponas. La

grava demando nur estos ĉu la prezidanto kaj estraro de A.E.A. kapablos persvadi la estrojn de la Aŭstralia Poŝto akcepti la ideon. — Red.)

3-a SOMERA LERNEJO Toowoomba — 12-23 jan., 1981

La Somera Lernejo bezonas vian subtenon.

Trevor Steele gvidos literaturan kurson (Libroj: "Fianĉo de la Sorto", "Baza Literatura Krestomatio", ambaŭ haveblaj de Trevor); Ray Ross, progresantojn ("Paŝoj al Plena Posedo"); Annie Spencer, komencantojn aŭ postkomencantojn ("Forto de l' Vero, se por postkomencantoj). Kompreneble alportu ankaŭ vortarojn. Estos libro-budo ĉe la Somera Lernejo.

Al la tri infanoj, kiuj gajnis premiojn en la esea konkurso, oni proponis stipendiojn, kaj al ĉiuj aliaj samaĝuloj malaltan studkoston de \$45. Tio estas tre laŭdinda ago de la organizistoj de la Somera Lernejo, sed oni bezonas pli da plenaĝuloj por ke la Esperantokursoj estu sukcesplenaj. Studkostoj: \$110; loĝejo kaj nutraĵo: \$140. **Skribu en la angla: Summer School, P.O. Box 100, Toowoomba 4350.**

—Jean Lehane.

SUBTENON AL NOVJORKA OFICEJO

La Novjorka oficejo de UEA (777 UN Plaza New York, NY 10017, Usono), post sia fondiĝo en la fino de 1979, unuafoje en la 1980-a julio eldonis presitan informilon "Esperanto and the United Nations (Esperanto kaj la Unuiĝinta Naciaro). Ĝi grafike bone aranĝita, celas atingi monde influhavajn personojn en kaj ĉirkaŭ UN.

La oficejo, formale nomata "UN-Placa Oficejo de UEA", en 1980 distribuis al ŝahillingvanoj en Novjorko (precipe funkciuloj de ne-registaraj organizoj pri Afriko) la ŝahilan informilon, eldonitan de UEA "Por la defendo de afrikaj kulturoj".

Kiam laboroj komencas marŝi, estas inde subteni la agadon. Estas ebleco aniĝi al la "Amikaro de la UN-Placa Oficejo", pagante 20 guldenojn proks. 9 aŭstraliajn dolarojn jare, aŭ iĝi ĝia subtenanto, pagante 200 gld. (\$90) jare, ĉu rekte al Novjorko ĉu pere de la UEA ĉefdelegito, S-ro K. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, 3163.

(UN kaj Ni, 19),

LA LINGVO EN LA TUTMONDA KONGRESO DE LA SURDULOJ

En ĉiuj internaciaj kongresoj la lingva baro estas grava malhelpo. Nur 2 specoj de internaciaj kongresoj ne sekvas tiun fakton: la Esperantistaj kongresoj, en kiuj ĉiuj parolas en lingvo speciale kreita por facila lernado, kaj la tutmondaj kongresoj de la surduloj, en kiuj oni adoptas internaciajn gestojn.

Tiu kodo de tutmondaj gestoj "Gestuno" estas daŭre perfektigita laŭ la sama spirito kiel Esperanto. La plej nova eldono konsistas el 1500 signoj, kiujn, sub la formo de kartone bindita albumo, oni povas aĉeti en la akceptejoj, tio estas utiliga por ĉiuj partoprenantoj en la venonta tutmonda kongreso en urbo Varna en Bulgario.

Nur kelkaj gestoj estas vere tutmonde komprenataj. Ili estas heredaĵo de sindonema abato De l'Epee, en la 18-a jarcento. La kreis la unuan mimikan lingvon speciale adaptitan al surduloj. Sed aliaj vortoj inspiritaj de nacia lingvo, ne povos esti komprenataj de alilingvanoj. Ekzemple, per la vorto 'virino' oni gestas elvokante hararan rubandon. La modo ŝanĝiĝis, de la 18-a jarcento, sed tiu gesto estas daŭre internacie uzata.

Male, la vorto "verda" estas formata per la gesto 'koloro' plus la litero 'V' (komenco de la vorto 'vert') en Francio sed en Anglio tiu donas la signon 'koloro' plus la literon 'G' (vorto 'green'). La kodo 'Gestuno' aldonas la signojn 'koloro' plus 'herbo', kiuj estas ĉie klaraj.

Nuntempe ekzistas multaj signaj kodoj. Ĉiu skolo kreas novajn vortojn, riĉigas kaj precizigas la gestan liston. Kelkaj landoj, kiel Hispanio kaj Usono, provis unuigi siajn gestajn lingvojn. Estas bone, sed tutmonda unuigo estas ankoraŭ pli bona.

Nia komuna malfeliĉo: La surdeco devus nin alproksimigi, kaj ne apartigi la gestantojn de la parolantoj. La klopodoj asimili tiun libron trovas rekompencon en la rezulto: scipovi 'surdulan Esperanton', interkompreniĝi kun ĉiuj bonvolemaj surduloj, al kiu ajn nacio ili apartenas. Kiam okazos tutmondaj televidaj elsendoj (transmissiitaj pere de artsatelitoj), kies gestoj estos samtempe komprenataj en la kvar mondaj partoj? (El "The Worker Esperantist", trad el la franca 'La Caravelle'.)

TWO SERIOUS EVILS IN THE LOCAL GROUP: THE LEADER WHO DOESN'T LEAD AND THE MEMBERS WHO REMAIN PASSIVE

BERNARD GOLDEN

In every social group there exist complex reciprocal relations between leaders and followers. The former may be authoritarian or democratic. The authoritarian leader stimulates, judges, rules, manipulates, orders, or is simply charismatic (capable of leading by means of affective influence) and omnipotent. On the contrary, the democratic leader explains, coordinates and collaborates. On the basis of these definitions it is obvious that goals can be attained by groups which have either one or the other type of leader. It often occurs, however, that after the departure of a talented and capable leader, the group lacks a suitable successor to take over the reins. The vacuum which afterwards ensues in the society is filled, not by concrete results but by reminiscences of the legendary group-leader. Nevertheless, the group can continue to exist because a third type of leader may make his appearance in the club: the do-nothing leader.

Perhaps the do-nothing leader owes his existence to the fact that he has no competition for the presidency of the club. Or it may be that he has held that office for so many decades that others are reluctant to take his place for sentimental reasons. This type of leader can be more dangerous than the dictatorial one, mainly because he accepts with complacency the passivity of the membership, which in turn becomes accustomed to the do-nothing and tolerates his lack of activity. Because of the prestige of his position and perhaps also for egotistical reasons, the non-entity refuses to resign of his own accord. The existence of such a situation in many Esperanto groups is doubtlessly one of the main reasons for the loss of serious active members who lack the power to carry out constructive changes in the club.

Now with respect to the club members, their most serious problem is pass-

ivity. It is a sort of sickness which, like other diseases, can become contagious, chronic and lethal within the local Esperanto group. One of the most characteristic symptoms of this passivity is the frequency of club programs consisting of lectures, usually illustrated by slides. These programs are the most popular of all because a minimum of linguistic proficiency is required for he two- or three-word commentary about each of several hundred slides, and those who can't understand even that, can simply look at the beautiful colored pictures or, if completely bored doze off in the darkened room.

Since one of the goals of the local group is to provide a means of using Esperanto it is incumbent on the program director to find ways of stimulating increased participation. This means introducing program items which require even the most apathetic members to express themselves in Esperanto. One successful method is the presentation of sketches and short plays, either improvised or written by the members. Also the "Living Newspaper", for a long time a traditional part of group meetings, can serve as a means of giving everybody an opportunity to take part, provided that the editor skilfully distributes assignments on the basis of language ability and interests. On a more advanced level are debates and discussions on specific topics. The more controversial the subject, the more active will be the participation. Furthermore, conversational practice in Esperanto courses can be used as preparation for active participation in club programs.

It is obvious that only a truly energetic leader can successfully undertake the planning and accomplishment of such programs. By endeavouring to eradicate passivity in his organization, he will inject into his followers a very efficacious remedy: the desire to use Esperanto for practical matters.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

TREVOR STEELE

SCHOLAR and WIT

Trevor's earliest recollections go right back to the time he was two. Screaming monsters hurtled overhead in endless procession, so he crouched low to avoid being hit. (This crouching must have had a shortening effect, for Trevor is now only about two metres tall.) The monsters? American bombers on their way to the Battle of the Coral Sea.

Trevor's schooling (near Cairns) was normal — a sadistic classmate's hobby was tearing wings off files—except that he (T) developed an inexplicable interest in foreign languages—in determinedly monolingual surroundings.

In due course Trevor "drifted" (his term) into pedagogy and went as an exchange teacher to Germany, where he spent several years. The best boys get the most difficult jobs, so he became warden of a home for released stateless prisoners from East Bloc countries who, as guests of the Third Reich had spent some time at such "resorts" as Bergen-Belsen. After the War they had committed civil crimes, so were not eligible for repatriation; hence they had to stay—unwanted, homeless and hopeless. Most were alcoholics; many were in and out of prison: rehabilitation was practically nil.

1970 saw Trevor in London where he "taught" (sic) German to East End kids whose real need was remedial English. A fellow teacher started an Esperanto Club which netted a final total of none but "caught" Trevor. A few months after, Trevor was offered a free ride to the Universal Congress in Vienna, the only "price" being an undertaking to speak Esperanto all the way — a price successfully and gladly paid.

Esperanto soon proved to be an absolute necessity, for a move to Valencia forced Trevor to rely wholly on local Esperantists for communication. His job was to teach English — by the direct method — to a cross section of Spaniards who regarded it as the inter-

national language for businessmen. Since love will always find a way, Trevor soon acquired a Spanish girl friend, and since "you **do** need to know the language" he soon became fluent in Spanish.

After another stint in Germany with his "almost no-hopers", and a break to attend the 1971 Univ. Congress in London, he returned to teach once again in sunny Queensland. One fate-laden week end, whilst attending a camp for students of German, he met Edith Fischer, with whom he communicated so well that they married in 1976.

1977 saw them both in "Bona Espero", a remote spot in Brazil caring for underprivileged children who, without special care, would be devoid of hope. Trevor taught and ran the dairy and Edith supervised the huge house and taught the beginners. The conditions were primitive and the work was hard — almost to exhaustion — but our friends experienced an uplifting of the spirit and psychic healing. They are convinced that there is much more to life than what meets the eye.

Nowadays, Trevor, who has a post-graduate award is preparing himself for a university post in history. In pursuit of this, he may have to go back to East Germany next year. For this reason, he declined nomination as President of A.E.A.

Trevor is certainly not a humourless academic; he writes Esperanto plays which sparkle with the zest of good natured (yet, at times mildly mordant) satire. One of his plays—in which he "starred"—was highly commended at the 1980 Drama Konkurso.

At the moment, he lives in Brisbane with his wife and 15-month-old son who — already — says of himself in clear Esperanto. "Jes, bela bebo". Trevor proudly accepts this as a self-evident truth. — **ARTHUR COCKING.**